



**FERENC
MOLNÁR**

LA KNABOJ DE PAŮLO-STRATO

LA KNABOJ DE PAŬLO-STRATO

romano de MOLNÁR Ferenc
traduko de Ladislao SPIERER

(UNUA PARTO)

1. LA KLASO

Je la trikvaronoj post la dekdua, ĝuste en la momento kiam sur la katedrotablo de la naturhistoria ĉambrego post longaj kaj sensukcesaj eksperimentoj finfine, tre malfacile, kiel kompenso de la Bunsen-lampo belega, smeraldverda strio, kiel signo, ke la kemimiksaĵo, pri kiu la sinjoro profesoro volis pruvi, ke ĝi verdigos la famon vere verdiĝis, mi diras: precize uje la trikvaronoj post la dekdua, ĝuste en tiu triumfa minuto, en la korto de la apuda domo eksonis piangurdo, kaj pro tio ĉiu seriozaĵo subite finiĝis. La fenestroj estis larĝe malfermitaj dum la varma marta tago, kaj per la flugiloj de printempa venteto flugis la muziko en la klasĉambron. Estis gaja hungara kanto, kiu aŭdiĝis el la gurdo kvazaŭ marŝo, kaj tiel

bimbambum-maniere, tiom „viene” ĝi sonis, ke la tuta klaso ekdeziris rideti, eĉ troviĝis iuj, kiuj vere ridetis pri ĝi. En la Bunsen-lampo gaje flamis la verda strio, kaj tion ankoraŭ iomete admiris kelkaj knaboj el la vico de la unua benko. Sed la ceteraj elrigardis tra la fenestroj, tra kiuj oni povis vidi la suprojn de la apudaj domoj, kaj malproksime, en la dolĉa ora sunbrilo, la turon de la kirko, sur kies horloĝo la granda montrilo pasis konsole al la dekdua. Kaj dum oni elrigardis tra la fenestroj, ankaŭ aliaj, ne alapartenaj voĉoj venis kun la muziko en la ĉambregon. Trumpetis ĉevaltramveturiloj, en iu koreto kantis servistino, sed ion tute alian, ol kion ludis la gurdo. Kaj maltrankvile sinmovadis la tuta klaso. Kelkaj knaboj komencis serĉadi inter siaj libroj, la pli ordŝatemaj viŝis siajn plumojn. Boka* fermis sian malgrandan poŝinkujon tegitan per ruĝa led, kiu havis tre lertan strukturon, tian,

ke neniam fluis el ĝi la inko, nur kiam oni metis ĝin en la poŝon; Csele* kunmetis la foliojn, kiuj ĉe li anstataŭis la librojn, ĉar Csele estas dando, kaj li neniam portis sub la brakon la tutan libraron, kiel la aliaj, sed nur la bezonatajn foliojn li kutimis porti, ankaŭ ilin zorge dividinte en ĉiuj siaj internaj kaj eksteraj poŝoj; Csónakos* en la lasta benko, oscedis, kvazaŭ enuanta hipopotamo; Weisz* elturnis sian poŝon, kaj faligis el ĝi ĉiujn antaŭtagmezajn panerojn, kiuj restis tie el la korn-bulko, kiun li dum la tempodaŭro de la dekdua ĝis la unua popecete manĝadis el la poŝo; Geréb* glitŝovadis sub la benko siajn plandojn, kvazaŭ volante jam starigi; kaj Barabás* tute senhonte kovris siajn genuojn sub la benko per la vakstolo, metante en ĝin la librojn laŭ grando, kaj poste tiel forte tiris ĝin per rimeno, ke eĉ la benko krakadis, kaj li mem ruĝiĝis pro tio, – mallonge: ĉiu

preparis sin por la foriro, kaj nur la sinjoro profesoro volis ne sciiĝi pri tio, ke post kvin minutoj ĉio finiĝos, ĉar la sinjoro profesoro irigis sian mildan rigardon tra la kapetoj de la knaboj, kaj demandis:

– Kio estas?

- - - - -

[* Boka, Csele (ĉele), Csónakos (ĉonakos), Weisz (veis), Geréb (gereb), Barabás (barabaŝ) estas la nomoj de lernantoj de la klaso.]

2. FINO DE INSTRUTAGO

Estiĝis granda silento. Morta silento. Barabás devis delasi la rimenon, Geréb metis sub sin la piedojn, Weisz returnis la poŝojn, Csónakos kovris sian buŝon per la mano, kaj malantaŭ la mano li finis la oscedon, Csele lasis la „foliojn”, Boka rapide metis en la poŝon la ruĝan inkujon, el kiu tuj komencis flueti la bela blua inko.

— Kio estas? — ripetis la sinjoro profesoro, kaj tiam ĉiu jam sidis sur sia loko senmove. Poste li rigardis al la fenestroj, tra kiuj vigle ĉirpis la gurdonsono, kvazaŭ rimarkigante, ke ĝi ne estas sub la disciplino de la profesoro. Tamen, la sinjoro profesoro severe rigardis en la direkto de la gurdo, kaj diris:

— Csengey*, fermu la fenestrojn. — Csengey, la malgranda Csengey, kiu

estis la „unua de la unua benko”, ekstaris, kaj kun sia serioza, severa vizaĝo iris al la fenestroj por fermi ilin.

En tiu sama momento Csónakos elklinis sin ĉe la rando de la benko, kaj flustris al eta blonda knabo:

– Atentu, Nemecsek!

Nemecsek strabis malantaŭen, poste li rigardis al la planko. Paperbuleto ruliĝis apud lin. Li levis, kaj elfaldis ĝin. Sur unu flanko de la papero estis skribite: „Donu pli al Boka!”

Nemecsek sciis, ke tio estas nur adreso, kaj la letero mem, la vera sciigo troviĝas sur la alia flanko de la papero. Sed Nemecsek estis nepre karakterplena viro, kaj ne volis legi la leteron de aliulo. Do ankaŭ li faris el ĝi buleton, atendis konvenan tempon, kaj tiam elkliniĝis al la strateto inter la benkvicoj kaj flustris:

- Atentu Boka!

Kaj nun Boka rigardis al la planko, kiu estis la konstanta komunikilo de sciigoj. Vere, ruloĝante venis la malgranda paperbuleto. Sur la alia flanko, kiun la blonda Nemecsek ne legis pro ĝentilo estis skribite:

„Posttagmeze je la tria okazos ĝeneralkunveno. Elekto de prezidanto sur la grundo. Publikigu.”

Boka metis la paperon en la poŝon, kaj lastfoje ektiris la librojn jam pakitajn. Estis la unua horo. La elektra horloĝo eksonoris, kaj nun jam ankaŭ la sinjoro profesoro sciis, ke finiĝis la instruhoro. La Bunsen-lampon li estingis, la lecionon fiksis, kaj reiris al la naturhistoria ĉambro, inter la kolektaĵojn, de kie, kiam oni malfermis la pordon, remburitaj bestoj kaj birdoj elrigardis kun malsaĝaj vitro-okuloj, kaj kie en la angulo silente, sed majeste, staris la sekreto de sekretoj, la teruro de teruroj, flaviĝinta homa skeleto.

Kaj la lernantoj de la klaso post minuto jam estis ekster la ĉambrego. En la granda kolonara ŝtuparejo okazis sovaĝaj kuregoj, kiuj nur tiam mildiĝis je rapidado, kiam la alta figuro de iu profesoro miksiĝis inter la tumultan amason de knaboj. Tiam la kurantoj bremsis, estis kelkminuta kvieto, sed kiam la profesoro malaperis ĉe la vojkurbiĝo, tuj rekomenciĝis la „ĉevalkurado” malsupren.

[* Csengey (ĉengei) estas nomo de lernanto en la klaso.]

3. TURKMIELO

La pordego kvazaŭ verŝis eksteren la knabojn. Oni iris parte dekstren parte maldekstren. Se instruistoj iris inter ilin, tiam dekapigis la etaj ĉapeloj. Kaj lace, malsate ili paŝadis ĉiuj sur la sunbrila strato. Iom da duonsveno estis en iliaj kapoj, kiu nur tre malrapide disiĝis je la vido de multaj gajaj vivprezentaj vidindaĵoj, kiujn donis la strato. Kvazaŭ liberiĝintaj malliberuloj en la aero kaj sunbrilo, ŝanceliĝis ili tra ĉi tiu freŝa, brua, vigla urbo, kiu por ili estis nenio krom zigzaga miksaĵo de multaj veturiloj, ĉevaltramoj, stratoj kaj vendejoj, en kiu ili devis trovi la vojon hejmen.

Csele marĉadis sekrete pri turkmielo sub apuda pordego. Nome la turkmielvendanto senhonte altigis la prezojn. Kiel oni scias, la turkmielo en

la tuta mondo kostas unu krejceron. Tiel oni komprenu, ke la turkmiel-vendanto prenas la hakileton, kaj kiom li per unu bato el la granda maso, tiom kostas unu krejzero, tio estas la unuo. Unu krejzeron kostas granda peco da „ursosukero” kaj same unu krejzeron la hordesukero. Eĉ unu krejzeron kostas ankaŭ la nomata „studentfuraĝo”, kiu estas dividita en malgrandaj saketoj kaj kiu estas unu el la plej bongustaj miksaĵoj. Estas en ĝi avelo, sekvinbero, migdalo, strata malpuraĵo, karbopeceto kaj muŝo. unu krejzero studentofuraĝo ampleksas tre multajn industriajn, florajn kaj bestajn produktojn.

Do Csele marĉadis, kio signifas, ke la turkmielisto altigis la prezojn. La konantoj de la komercaj leĝoj bone scias, ke la prezoj altiĝas ankaŭ se la negocado estas riskoplena. Tiel ekzemple, malĉipaj estas tiuj aziaj teoj, kiujn karavanoj ekspedas tra lokoj

loĝataj de rabistoj. Tiujn danĝerojn devas ni pagi, okcidenteŭrpanoj. Kaj tiu turkmielvendisto certe havis komercistan spiriton, ĉar oni volis lin kompatindan forpeli de la lernejo. Li, kompatindulo, bone sciis, ke se oni volas lin forpeli, oni certe ankaŭ faros tion, kaj ke malgraŭ sia granda sukeraĵprovizo, li tamen ne povas tiel dolĉe rideti al la instruistoj, ke li ne rigardu lin malamiko de la lernantoj.

„La infanoj sian tutan monon elspezas ĉe tiu italo”, ili diris. Kaj la italo sentis, ke liaj negocoj ne daŭros longe apud la gimnazio. Do li altigis la prezojn. Se li devas foriri de ĉi tie, almenaŭ li gajnu iom. Li eĉ diris al Csele:

— Antaŭe ĉio unu krejcero. Do nun ĉio du krejceroj.

Kaj dum malfacile li eldiris ĉi tiujn hungarajn vortojn, sovaĝe svingadis en

la aero la hakileton. Geréb flustris al Csele:

– Ĵetu vian ĉapelon inter la sukerojn.

Csele estis ravita pro tiu ĉi ideo. Ho, kia plezuro tio estus. Kiel flugus dekstren-maldekstren la sukeroj! Kaj kiel amuziĝus la knaboj!

Geréb, kvazaŭ la diablo mem, flustris en lian orelon la vortojn de tento:

– Ĵetu tien vian ĉapelon. Li estas uzuristo.

Csele deprenis sian ĉapelon.

– Ĉu tiun ĉi belan ĉapelon? – li demandis.

Mistrafita afero! Geréb malĝuste adresis la belan proponon. Csele ja estas Dando, kaj nur foliojn li portis el la libro.

– Ĉu vi domaĝas ĝin? – diris Csele.

– Sed tamen ne kredu, ke mi estas malkuraĝa. Mi ne estas malkuraĝa, nur

la ĉapelon mi domaĝas. Tion mi povas ankaŭ pruvi, ĉar se vi volas, vian ĉapelon tre volonte mi ĵetos.

Tiaĵon oni ne povis diri al Geréb. Tio estis preskaŭ ofendo. Li eĉ ekkoleris. Li diris:

– Se jam temas pri mia ĉapelo, mi mem ĵetos ĝin tien. Li estas uzuristo. Se vi timas, iru for!

Kaj per movo, kiu ĉe li signifis batalemon, li deprenis sian ĉapelon por disfrapi sur la X-pieda tablo, plenmetita per sukeraĵoj.

Sed iu de malantaŭe kaptis lian brakon. Preskaŭ vire serioza voĉo demandis al li:

– Kion vi faras?

Geréb rerigardis. Boka staris malantaŭ li.

– Kion vi faras? – li denove demandis al li.

Kaj serioze, milde li rigardis lin. Geréb ekmurmuris, kvazaŭ leono, kiam la dresisto rigardas en ĝiaj okulojn. Li humiligis. Li remetis la ĉapelon sur la kapon, kaj levadis la ŝultrojn. Boka mallaŭte diris:

— Lasu tiun homon. Mi ŝatas, se iu estas kuraĝa, sed tio tute ne havas sencon. Venu.

4. SURVOJE HEJMEN

Kaj li donis al li la manon. Lia mano estis nura inkmakulo. La inkujo gaje estis gutverŝinta en lian poŝon la malhelbluan sukron, kaj Boka tute sensuspekte tiris sian manon el la poŝo. Sed ili ne tro zorgis pro tio. Boka ŝmiris sian manon al la muro, kies sekvo estis, ke la mano de Boka ne iĝis pura, sed la muro inkmakuliĝis. La afero pri la inko, tamen, estis finita. Boka brakplektis al Csele, kaj ili ekiris sur la longa strato. Post ili restis la malgranda, belaspekta Csele. Ili ankoraŭ aŭdis, ke kun sufokita voĉo, kun la rezigno de venkita revoluciulo, li diris al la italo:

— Do, se de nun ĉio kostas du krajcerojn, donu por du krajceroj turkmielon.

Kaj li prenis sian belan verdan monerujon. Kaj la italo ridetis, certe pri

tio, kio estos okazonta, se de morgaŭ – ĉio kostus tri krajcerojn? Sed tio estis nur revo. Io simila al la sonĝo de iu, kiu sonĝas, ke ĉiu guldeno valoras centguldenan bankbileton. Li frapis forte per la hakileto sur la turkmielon, kaj la dehakitan spliton li metis en paperon.

Csele amare rigardis lin. Sed ĝi ja estas malpli, ol antaŭe.

La italon nun jam impertinentigis la negoca sukceso. Rikante li diris:

– Do nun pli kare, do nun malpli.

Kaj li jam turnis sin al nova aĉetento, kiu lerninte el tiu ĉi kazo, jam tenis en la mano la du krajcerojn. Kaj li tranĉadis la blankan sukermason per la hakileto kun tiel strangaj movoj, kvazaŭ li estus mezepoka, giganta ekzekutisto, kiu detranĉas la kapojn de etaj, avelkapaj hometoj per malgranda hakilo.

– Fi, - diris Csele al la nova aĉetanto -, ne aĉetu ĉe li. Li estas uzurulo.

Kaj per unu fojo li enbuŝigis la tutan turkmielon, al kiu la duono de la papero algluiĝis, nedeŝireble, sed delekeble.

– Atendu! – li diris al Boka, kaj la aliaj knaboj, kaj kuris post ilin.

Ĉe la angulo li atingis ilin, kaj tie ili flankiĝis en la Pipa-straton en la direkto de Soroksári-strato. Ili triope kunbrakiĝis; meze iris Boka kaj klarigis ion mallaŭte, serioze, kiel kutime. Li estis dekkvar-jara, kaj sur lia vizaĝo, estis nur malmulte da signoj de vireco. Sed se li malfermis sian buŝon, li gajnis kelkajn jarojn. Lia vorto estis forta, milda, serioza. Kaj kion li diris, tio similis al lia voĉo. Malofte li elparolis malsaĝaĵon, kaj tute ne havis emon por stratbubaĵoj. Se inter la knaboj okazis malgrandaj kvereloj, li entute ne miksis sin en la aferon, kaj eĉ se oni petis lin

pri juĝo, li rifuzis. Li jam spertis, ke post la juĝo unu partiulo amare foriras, kaj ĉi tiun amaron li sentas ĉiam kontraŭ la juĝinto. Sed se la kverelo iĝis tre grava, tiom grava, ke ĝi jam preskaŭ necesigis profesoron intervenon, ĉiam intervenis Boka por pacigi. Kaj kiu pacigas, tiun almenaŭ neniu koleras el la partiuloj. Do mallonge: Boka ŝajnis saĝa knabo, kaj li ekiris sian vivon tiel, ke, eĉ se li ne faros tro altan karieron, li almenaŭ plenumos siajn devojn, kiel honesta homo.

La direkto de la hejmeniro postulis, ke el la Soroksári-strato ili flankiĝu en la Köztelek-straton. Sur la senbrua strato dolĉe brilis la printempa suno kaj mallaŭte murmuris la tabakfabriko, kiu okupis unu tutan flankon de la strato. En la Köztelek-strato estis videblaj nur du figuroj. Ili staris meze kaj atendis. Unu estis Csónakos, la forta Csónakos, la alia la eta blonda Nemecek.

Kiam Csónakos ekvidis la tri brakplektitajn knabojn, pro ĝojo li metis siajn du fingrojn en la buŝon kaj ekfajfis laŭtege, kvazaŭ lokomotivo. Cetere ĉi tiu fajfado estis lia specialaĵo. Neniu povis ĝin imiti en la kvara klaso, eĉ en la tuta gimnazio estis nur kelkaj knaboj, kiuj scipovis ĉi tiun veturigistan fajfadon. Entute nur pri Cinder, pri la prezidanto de la „sinperfekta rondo” oni sciis, ke tiamaniere li scipovas fajfi, sed Cinder fajfis nur ĝis oni elektis lin prezidanto. De tiam Cinder ne metis plu la fingrojn en la buŝon. Al la prezidanto de la „sinperfekta rondo”, kiu ĉiumerkreda posttagmeze sidas sur la katedro apud la instruisto pri la hungara lingvo, tio ne estas deca.

Do, Csónakos fajfegis. La knaboj atingis ilin kaj haltigis apud ili, meze de strato.

Csónakos turnis sin al Nemecsek:

– Ĉu vi jam diris al ili?

– Ne, - respondis Nemecsek.

Ĉiuj aliaj demandis samtempe:

– Kion?

Csónakos respondis anstataŭ la blonduleto:

– En la „muzio” hieraŭ denove oni faris *ejnŝtand*.

–Kiu?

– La Pásztor-knaboj. La du Pásztor.
Estiĝis granda silento.

5. EJNŜTAND

Estiĝis granda silento.

Nun oni devas scii, kio estas *ejnŝtand*. Ĝi estas speciala vorto de la knaboj. Se pli fora knabo vidas pli malfortajn vetludi je kugletoj, plumoj aŭ karobgrajnoj, kaj la ludilojn li volas forpreni de ili, li diras: *ejnŝtand*. Tiu ĉi vorto signifas, ke la forta knabo deklaras milittrabaĵo la ludkugletojn, kaj kiu kuraĝas kontraŭstari, kontraŭ tiu li uzos perforton. Do *ejnŝtand* signifas ankaŭ militdeklaron. Samtempe ĝi estas la mallonga, sed konciza deklaro de militjuro, pugnoraĵto kaj piratregado.

Csele ekparolis la unua. Kun teruro diris la delikata Csele:

– Ĉu ili faris ejnŝtand?

– Jes, – diris kuraĝiĝinte la eta Nemecsek, rimarkinte la efikon de la afero.

Nun Geréb ekindignis:

– Tion ne eble toleri plu! Mi diris jam anaŭlonge, ke oni devas fari ion, sed Boka ĉiam faris grimacojn. Se nenion ni faros, ili eĉ batos nin.

Csónakos nun metis la fingrojn en la buŝon por signi, ke nun li fajfos pro ĝojo. Al ĉia revolucio li estis preta ĝoje aliĝi Sed Boka kaptis lian manon.

– Ne surdigu nin –, li diris. Kaj seroze li demandis la blonduleton:

– Kie tio okazis?

– Ĉu la ejnŝtand?

– Jes. Kiam tio okazis?

– Hieraŭ posttagmeze.

– Kie?

– En la muzio.

Tiel ili nomis la ĝardenon de la muzeo.

La malgranda Nemecsek estis ekscitita, kiam li sentis, ke li iĝos la

centro de grava afero. Tio okazis pri li malofte. Nemecsek por ĉiu estis nur aero. Li ne estis prikalkulata, kiel la unuo ne havas rolon en la aritmetiko ĉe la divido kaj multiplikado. Neniu priatentis lin. Li estis sensignifa maldika knabeto, malforta knabo. Kaj eble tio taŭgigis lin, por esti konvena viktimo. Li ekparolis kaj la knaboj kunmetis la kapojn.

– Tiel estis. li diris –, ke post tagmanĝo ni iris en la „muzion”, Weisz kaj mi, kaj Richter* kaj Koltay kaj Barabás. Unue ni volis pilkludi en la Eszterházy** strato, sed la pilko apartenis al la real-lernejanoj kaj ili ne permesis. Tiam diris Barabás: „Ni iru en la muzion, kaj kuglolu ĉe la muro.” Kaj tiam ni ĉiuj iris en la muzion, kaj kugloldis ĉe la muro. Ni ludis tion, ke ĉiu rulas unu kugleton, kaj kies kugleto trafos tian kugleton, kiu jam estas rulita, tiu gajnos ĉiujn kugletojn. Kaj unu post la alia ni

rulis la kugletojn, jam estis ĉe la muro almenaŭ dekkvin kugletoj, inter ili du el vitro. Kaj tiam neatendita Richter krias: „Ve al ni, venas la Pásztor***-knaboj.” Kaj ĉe la angulo jam venis la Pásztor-knaboj, iliaj manoj estis en siaj poŝoj, kaj ili tenis siajn kapojn kline, kaj tiom malrapide ili venis, ke ni ĉiuj tre ektimis. Vane ni estis kvin, ili du estis tiom fortaj, ke eĉ dek ili povus tradraŝi. Kaj oni ne povas nin tiel kalkuli, ke ni estas kvin, ĉar se estas danĝero, tiam Kolnay**** forkuras, kaj ankaŭ Barabás forkuras, do el ni oni povas kalkuli nur tri. Eble ankaŭ mi forkuras, do oni povas kalkuli nur du. Kaj eĉ, se eble ni ĉiuj forkuras, tio valoras nenion, ĉar la Pásztor-knaboj estas la plej bonaj kurantoj en la tuta muzio, kaj ni vane kuras, ĉar ili atingus nin. Do venis la Pásztor-anoj, pli kaj pli proksimen ili venis, kaj tre rigardis la kugletojn. Mi diris al Kolnay: „Jen al ili plaĉas niaj

kugletoj!” Kaj Weisz estis plej saĝa, ĉar li tuj diris: „Ili venas, ili venas el tiu venado estos granda ejnŝtand!” Sed mi pensis, ke ili lasos nin, ĉar ni neniam faris al ili ion malbonan. Kaj komence ili lasis nin, ili nur ĉestaris, kaj rigardis la ludon. Kaj Kolnay flustris en mian orelon: „Nemecsek, ni ĉesigu.” Kaj mi diris al li: „Jes ja! ĝuste nun, kiam ĵus vi rulis kaj ne trafis. Nun estas mia vico. Se mi gajnos, ni ĉesigos.” Dume Richter rulis, sed lia mano jam tremetis pro la timo, kaj duone li okulumis al la Pásztor-oj, kaj kompreneble, ankaŭ li ne trafis. Sed la Pásztor-anoj eĉ ne moviĝis, ili staris tie kun la manoj en la poŝoj. Tiam poste mi rulis kaj trafis. Mi gajnis ĉiujn kugletojn. Kaj mi volis iri por kolekti ilin, estis tie jam preskaŭ tridek kugletoj, sed antaŭ min saltis unu el Pásztor-anoj la pli malgranda, kaj kriis al mi: „Ejnŝtand!” Mi rigardis malantaŭen, kaj Kolnay kaj Barabás jam

kuris, Weisz staris ĉe la muro, kaj paliĝis, kaj Richter ankoraŭ pensadis, ĉu li forkuru aŭ ne. Unue mi provis honeste. Mi diris: „Mi petas, vi ne havas rajton por tio.” Sed tiam la plej aĝa Pásztor jam kolektis la kugletojn, kaj metis ilin en sian poŝeton. Kaj la pli juna kaptis mian jakon ĉe la brusto kaj kriis: „Ĉu vi ne aŭdis, ke Ejnŝtand?” Kompreneble, poste ankaŭ mi silentis. Weisz komencis plori ĉe la muro. Kolnay kaj Kende kaŝe rigardis de la muzia angulo, kio okazas. Kaj la Pásztor-oj prenis ĉiujn kugletojn, ne dirante eĉ unu vorton, ili nur foriris. Tio estis la tuta afero.

— Ne plu torolebla. — indigne diris Geréb.

— Efektiva rabo!

Tion diris Csele. Csónakos fajfis unufoje, por signi, ke eksplodema estas la atmosfero. Boka staris silente kaj

mediitis. Ĉiu atentis lin. Ĉiu estis scivola, kion diros Boka pri ĉi tiuj aferoj, pri kiuj jam multaj plendis de monatoj, kaj kiujn Boka ĝis nun ne opiniis seriozaj. Sed la krianta maljusto de ĉi tiu afero movis ankaŭ Boka-n. Mallaŭte li diris:

— Nun ni iru nur hejmen por tagmanĝi. Posttagmeze ni renkoniĝos sur la grundo. Tie ni priparolos ĉion. Nun ankaŭ mi diras jam, ke tio estas ne tolerebla!

Al ĉiuj plaĉis la deklaro. En tiu ĉi momento Boka estis tre simpatia. Ame lin rigardis la knaboj, ridetante ili rigardis lian saĝan kapon, liajn nigrajn okulojn, en kiuj nun flagris ia batalema fajro. Ili volonte estus kisintaj lin pro tio, ke finfine ankaŭ li indigniĝis.

Ili ekiris hejmen. Gaja sonorilego tintis ie en la Jozefo-distrikto, la suno brilis, kaj ĉio estis bela kaj plena de

ĝojo. La knaboj staris antaŭ gravaj aferoj. Agemo ekmovis sin en ĉiuj, kaj ĉiun ekscitis, kio okazos nun. Ĉar se Boka diris, ke io okazos, nepre okazos io.

Ili iris, iradis al la Üllői-strato. Csónakos postrestis kun Nemecsek. Kiam Boka returnis sin al ili, ambaŭ staris ĉe la kelfenestro de la tabakfabriko, sur kiu en dika tavolo kuŝis la delikata tabakpulvoro.

– Flartabako! – vigle kriis Csónakos, denove li fajfis, kaj plenŝtopis siajn naztubojn per la flava pulvoro.

Nemecsek ridis elkore, la eta simio. Ankaŭ li prenis iom da tabakpulvoro, kaj flarspiris iom el ĝi de sur la pinto de sia gracila fingreto. Ternadante ili iris tra la Köztelek-strato, sentante feliĉan ĝojon pro la trovaĵo. Csónakos forte ternadis, kvazaŭ kanono. Kaj la blondulo nur turnetis, kvazaŭ kuniklo,

kiam oni incitas ĝin. Ili ternadis, ridadis, kuradis, kaj ĉi-momente ĉio estis tiom granda feliĉo, ke eĉ tiun egan maljuston ili forgesis, pri kiu Boka, eĉ Boka, la silentema kaj serioza Boka diris, ke ĝi estas ne tolerebla.

[* Prononcu: riĥter, ** esterhazi, ***pastor, ****kolnai.]

(DUA PARTO)

6. LA GRUNDO

La grundo! Vi belaj, sanaj, vilaĝaj knaboj, kiuj devas fari nur solan paŝon, por veni en la senfinan ebenaĵon, sub la mirinde belan lazuron, kies nomo estas ĉielo, vi, kies okuloj kutimiĝis al la grandaj distancoj, al la rigardado malproksimen, vi, kiuj ne vivas premite inter grandaj domoj, vi ne scias, kio estas por knabo el Peŝt malplena grundo. Por peŝta knabo ĝi estas la ebenaĵo, la kamparo. Ĝi signifas por li la senfinecon kaj liberon. Peceto da tero, kies unu flankon baras kaduka palisaro kaj ĉe kies aliaj flankoj altiĝas al la ĉielo grandaj dom-muroj. Nun ankaŭ sur la Paŭlo-strata grundo estas jam granda, kvaretaĝa domo, plena de loĝantoj, el kiuj eble eĉ unu ne scias, ke tiu

terpeceto signifas la junon de kelkaj kompatindaj peŝtaj lernejknaĵoj.

La grundo mem estis malplena, kiel tio ja decas al malplena grundo. La palisaro etendiĝis laŭlonge de la Paŭlostrato. Dekstre-maldekstre du grandaj domoj baris ĝin kaj malantaŭe... jes, malantaŭe estis tio, kio igis la grundon grandioza kaj interesa. Nome tie estis alia granda grundo. La alian grundon luprenis vaporsega firmao kaj la grundo estis plenplena de steroj (ŝtupoj metitaj kubforme). Laŭ regulaj kubo estis metitaj tie la brulŝtupoj kaj inter la grandegaj kubo troviĝis stratetoj. Vera labirinto. Kvindek-sesdek mallarĝaj stratetoj kruciĝis inter la mutaj, malhelaj steroj kaj ne estis facile orientiĝi en tiu labirinto. Kiu tamen tre malfacile trairis ĝin, tiu venis en malgrandan placon, sur kiu staris dometo. Ĉi tiu dometo estis la vaporsegilejo. Ĝi estis stranga, mistera, timiga dometo. Somere ĝin kovris

sovaĝa vinberujo kaj inter la verda foliaro pafpafis malgranda gracila nigra kamentubo, kiu laŭ horloĝa precizeco en regulaj intertempoj elŝprucis puran blankan vaporon. Oni povis pensi, aŭdante ĝin de malproksime, ke ie inter la steroj lokomotivo penas fortostreĉe, ne povante ekiri.

Ĉirkaŭ la dometo staris malgraciaj lignoportaj veturiloj. De tempo al tempo veturilo estis starigita sub la tegmentan defluilon, kaj tiam aŭdiĝis krakado kaj krakado. Sub la tegmenta defluilo de la dometo estis fenestreto, kaj el la fenestreto etendiĝis lignoglitiga trogo. Kiam veturilo estis starigita sub la fenestreton subite komencis fali el la lignoglitiga trogo la dispecigitaj lignoj, kaj kvazaŭ verŝiĝis en la grandan veturilon, tiom abunde ili elvenis. Kaj kiam la veturilo pleniĝis per la dispecigitaj lignoj, la veturigisto ekkriis. Tiam tuj ĉesis la pafpafado de la

kamentubo, tuj estiĝis granda silento en la dometo, la veturigisto kriis al la ĉevaloj, kaj la ĉevaloj ekiris kun la plena veturilo. Poste alia veturilo stariĝis sub la tegmentan defluilon malsata, malplena, kaj denove ekbruis la vaporo en la nigra fer-kamen-tubo, kaj denove faladis la dispecigitaj lignoj. Kaj tio daŭris depost jaroj. Kiom multe da ligno estis dispecigita per la maŝino en la dometo, same tiom estis portata de grandaj veturiloj sur la grundon. Tiameniere neniam elĉerpiĝis la steroj el la granda korto, kaj neniam ĉesis la bruado de la vaporsegilo. Kelkaj degeneraj morusarboj staris antaŭ la dometo, kaj sub unu el ili, lignokabano estis konflikita. En ĝi loĝis la slovako, kiu nokte gardis la lignon, por ke oni ĝin ne forŝtelu aŭ ekbruligu.

Ĉu oni bezonis pli belan lokon por amuziĝo? Ni, urbaj knaboj tute ne bezonis. Pli belan, pli indianan eĉ imagi

ni ne povis. Belega ebenaĵo estis la Paŭlo-strata grundo, kaj ĝi estis por ni io anstataŭanta la amerikajn stepojn. La malantaŭa parto, la lignoprovizejo estis ĉio cetera: ĝi estis la urbo, la arbaro, la rokplena montara regiono, mallonge: ĉiutaga tio, kio oni nomas ĝin. Kaj tute ne kredu, ke tiu lignoprovizejo estis nedefendata! En la suproj de kelkaj pli grandaj steroj estis konstruitaj fortikaĵoj. Kiun punkton oni devas fortikigi, pri tio decidis Boka. Sed la fortikaĵojn konstruis Csónakos kaj Nemecsek. En kvar-kvin lokoj estis tiaj fortikaĵoj kaj ĉiu fortikaĵo havis sian kapitanon. Kapitano, ĉefleŭtenanto, leŭtenanto. Jen estis la armeo. Senrangulo estis nur unu. Sur la tuta grundo, la kapitanoj, ĉefleŭtenantoj kaj leŭtenantoj ordonis sole al unu nura senrangulo, nur unu senrangulon oni ekzercis, nur unu senrangulon ili punis per fortikaĵa mallibero pro iaj ekscesoj.

Eble eĉ ne necesas diri, ke tiu ununura senrangulo estis Nemecsek, la eta blonda Nemecsek. La kapitanoj, ĉefleŭtenantoj nur gajneglekte salutis unu la alian sur la grundo, eĉ se centfoje ili renkontiĝis dum unu posttagmezo. Nur rapideme ili levis siajn manojn al la ĉapo dirante: „Saluton!”

Nur la kompatinda Nemecsek devis kunmeti la kalkanojn kaj mute, rigide saluti. Kaj kiu ajn preterpaŝis lin, ĉiu kriis al li:

– Kiel vi staras?

– Kunmetu la kalkanojn!

– Streĉu la bruston, entiru la ventron!

– Atentu!

Kaj Nemecsek feliĉe obeis ĉiun. Ekzistas ankaŭ tiaj knaboj, kiajn ĝojigas bele obei. Sed plej multaj knaboj preferas ordoni. Tiaj estas la homoj. Kaj tial estas kompreneble, ke sur la grundo

ĉiu estis oficiro, nur Nemecsek estis senrangulo.

Posttagmeze, je la dua kaj duono, ankoraŭ neniu estis sur la grundo. Apud la lignokabano estis sternita ĉevalkovrilo sur la tero, kaj sur ĝi dormis dolĉe la slovako. La slovako ĉiam dormis tage, ĉar nokte li vagadis inter la steroj, aŭ sidis supre sur iu fortikaĵo, kaj gapis la lunlumon.

7. MALAMIKO SUR LA GRUNDO

Kelkajn minutojn post la dua kaj duono ekknaris la pordeto ĉe la Paŭlostrato, kaj tra ĝi envenis Nemecsek. Grandan pecon de pano li tiris el sia poŝo, ĉirkaŭrigardis, kaj vidinte, ke ankoraŭ neniu estas tie, silente komencis maĉadi la pankruston. Sed antaŭe zorgeme li riglis la pordon, ĉar inter la leĝoj de grundo estis plej grave, ke enveninto devas post si rigli la pordon. Kiu tion preterlasis, tiun oni punis per fortikaĵa mallibero. Entute la soldata disciplino estis tre severa.

Nemecsek sidiĝis sur ŝtonon, manĝis la pankruston, kaj atendis la aliajn knabojn. La grundo promesis hodiaŭ multe da interesaĵoj. La atmosfero sentigis, ke hodiaŭ gravaj aferoj okazos, kaj kial nei, Nemecsek en tiumomento estis tre fiera pri tio, ke ankaŭ li estas

ano de la grundo, ano de la fama societo de la Paŭlo-strataj knaboj. Dum iom da tempo li maĉis la panon kaj poste, pro enuo, ekpromenis al la steroj. En la stratetoj li promenadis, kaj okaze renkontis la grandan nigran hundon de la slovako.

– Hektor! – amike li alkriis ĝin, sed Hektor ne montris eĉ iometan emon por la resaluto. Iomete ĝi elbalancis sian voston, kio ĉe hundoj signifas ion similan al tio, kiam mi rapide eklevas la ĉapelon. Poste ĝi galopis plu, kaj furioze ekbojis. Kaj la blonda Nemecsek kuris post ĝin. Ĝi haltis ĉe stero, kaj bojadis kun granda furiozo. Tiu stero estis unu el tiuj, sur kiuj la knaboj konstruis fortikaĵon. Supre, sur la stero estis ŝirmilo farita el ŝtiplignoj, kaj sur bastono flirtis malgranda ruĝverda standardo. La hundo ĉirkaŭsaltadis la fortikaĵon, kaj senĉese bojis.

— Kio estas tio? — demandis la blonduleto la hundon, ĉar inter la blonduleto kaj inter la hundo estis granda amikeco. Eble, ĉar krom li, Hektor estis la sola senrangulo en la armeo.

Li suprenrigardis al la fortikaĵo. Neniun li vidis supre, sed li sentis, ke iu movetiĝas inter la ŝtupoj. Do li ekiris, kaj grimpis sur la elstaraj finaĵoj de la ŝtupoj. Li jam faris la voj-duonon, kiam klare li aŭdis, ke supre iu metadas-ĵetadas la lignopecojn. Lia koro ekbategis, kaj nun li jam estus prefere retiriĝinta. Sed kiam li rigardis malsupren, kaj tie vidis Hektor-on, li rekuraĝiĝis.

— Ne timu, Nemecsek, — li diris al si mem kaj singarde grimpis plu. Ĉe ĉiu ŝtupo li denove kuraĝigis sin. Konstante li diris:

– Ne timu, Nemecsek. Ne timu, Nemecsek.

Kaj li atingis la supron de la stero . . .

Kaj li atingis la supron de la stero. Tie ankoraŭ li diris laste: „Ne timu Nemecsek”, kaj nun volis transpaŝi la malaltan muron de la fortikaĵo, sed pro teruro, la piedo, per kiu li volis ekpaŝi, restis en la aero.

– Jesuo! – li kriis.

Kaj freneze li grimpis-rampis reen sur la ŝtupoj. Kiam li atingis la teron, lia koro batis laŭte. Li rigardis supren, sur la fortikaĵon. Apud la standardo, metinte sian dekstran piedon sur la muron de la fortikaĵo staris Franĉjo Áts, ilia malamiko, la estro de la botanik-ĝardenuloj. Lian vastan ruĝan ĉemizon flirtigis la vento, kaj li ridetis make. Trankvile li diris al la knabeto:

–Ne timu Nemecsek.

Sed Nemecsek nun jam timis, eĉ kuris. La nigra hundo kuris post li, kaj kune ili kuris zigzage inter la steroj ree al la grundo. Per laflugiloj de la vento flugis post ilin la moka krio de Franĉjo Áts:

– Ne timu, Nemecsek!

Sed kiam de la grundo li rerigardis, la ruĝa ĉemizo de Franĉjo Áts jam ne estis sur la supro. Sed ankaŭ la standardo malaperis de la fortikaĵo. La malgrandan ruĝverdan standardon, kiun kudris la fratino de Csele, li forportis kun si. Li malaperis inter la steroj. Eble li eliris ĉe la Maria-strato, preter la vaporegilejo, sed ankaŭ tio estis ebla, ke ie li kaŝis sin, kun siaj amikoj, kun la du Pásztor-knaboj.

Kaj pro tiu penso, ke ankaŭ la Pásztor-knaboj estas ĉi tie, frostotrakuris la spinon de Nemecsek. Li jam sciis, kion signifas renkonti la Pásztor-

anojn. Sed proksime li nun vidis la unuan fojon Áts Franĉjon. Li tre ektimis lin, sed por esti sincera, al li plaĉis la knabo. Bela, larĝsultra, bruna knabo li estas, kaj tre konvenis al li la vasta, ruĝa ĉemizo. Ĝi donis al lia aspekto ion bataleman. Cetere la botanik-ĝardenuloj ĉiuj portis ruĝan ĉemizon, ĉar ili ĉiuj imitis Franĉjon.

Sur la palisara pordo de la grundo oni frapis regule kvarope. Nemecsek ekspiregis. La kvar frapoj estis la signo de la knaboj de Paŭlo-strato. Li kuregis al la riglita pordo kaj malfermis ĝin. Boka alvenis kun Csele kaj Geréb. Nemecsek volis tuj rakonti al ili la timigan novaĵon, sed tamen li ne forgesis, ke li estas senrangulo, kaj kio estas la devo al la ĉefleŭtenantoj kaj kapitanoj. Do li kunmetis la kalkanojn, kaj streĉe salutis.

8 . N E M E C S E K D E N O V E RAKONTAS

– Saluton! – diris la ĵusvenintoj. –
Kio nova?

Nemecsek frapadis la aeron, kaj ŝatus
rakonti ĉion samtempe, je unu spiro.

– Terure! – li kriis.

– Kio?

– Terurege!

– Vi ne kredos tion!

– Sed kion?

– Franĉjo Áts estis tie!

Nun la aliaj tri knaboj havis la vicon.
Subite ili serioziĝis.

– Ne estas vere! – diris Geréb.

Nemecsek metis sian manon sur la
bruston:

– Je Dio . . .

– Ne ĵuru! – diris al li Boka kaj por ke li donu pli da emfazo al sia voĉo kriis al li:

– Atentu!

Nemecsek kunfrapis la kalkanojn. Boka alpaŝis lin:

– Detale rakontu, kion vi vidis.

– Kiam mi iris tien inter la sterojn – li diris –, la hundo bojis. Mi postiris ĝin, kaj aŭdis krakadon en la meza citadelo. Mi grimpis sur ĝin kaj supre staris Franĉjo Áts en ruĝa ĉemizo.

– Ĉu li staris supre? Sur la citadelo?

– Supre! – diris la blonduleto kaj li jam estis ĵuronta. Jam lia mano estis sur la brusto sed pro la severa rigardo de Boka li forigis ĝin de tie. Kaj li diris:

– Ankaŭ la standardon li forportis.

Csele eksibris:

– Ĉu la standardon?

– Jes.

Ĉiuj kvar knaboj kuris tien. Nemecsek kuris modeste malantaŭe, parte, ĉar li estis senrangulo, parte, ĉar eble ankoraŭ tie sin kaŝas Franĉjo Áts. Antaŭ la fortikaĵo ili haltis. La standardo efektive mankis. Eĉ la tenilo ne estis tie. Ili ĉiuj estis ekscititaj, nur Boka konservis sian trankvilon.

– Diru al via fratino, – li turnis al Csele –, ke por morgaŭ ŝi faru novan standardon.

– Bone, – diris Csele -, sed ŝi jam ne havas verdan ŝtofon. Ruĝan ankoraŭ ŝi havas, sed verdan jam ne.

Boka trankvile decidis:

– Ĉu blankan ŝi havas?

– Jes.

– Do ŝi faru ruĝblankan standardon. De nun ruĝblanka estos nia koloro.

Pri tio ili konsentis. Geréb kriis al Nemecsek:

– Senrangulo!

– Jen.

– Ĝis morgaŭ korektu en la leĝaro, ke de nun ne ruĝverda, sed ruĝblanka estas nia koloro.

– Laŭ via ordono, sinjoro ĉefleŭtenanto.

Kaj Geréb moŝtfavore diris al la streĉe staranta blonduleto:

– Ripozu!

Kaj la blonduleto „ripozis”. La knaboj grimpis sur la fortikaĵon kaj konstatis, ke la tenilon de la standardo derompis Franĉjo Áts. La tenilo estis alnajlita, kaj tiu peco, kiu estis sub la najlo, ankoraŭ tie malgajis.

De la grundo aŭdiĝis krioj:

– Haho, ho! Haho, ho!

Tio estis ilia signalo. Verŝajne, jam alvenis la aliaj knaboj, kaj serĉas ilin. Akre sonis el la multaj infangorĝoj:

– Haho, ho! Haho, ho!

Csele vokis al si Nemecsek-on:

– Senrangulo!

– Jen.

– Respondu al ili!

– Laŭ via ordono, sinjoro leŭtenanto.

Kaj farinte funelon el la manoj antaŭ la buŝo, li kriis per sia infanvoĉo:

– Haho, ho!

Poste ili grimpis ree malsupren kaj ekiris al la ebenaĵo. Meze de la ebenaĵo grupe staris la aliaj knaboj: Csónakos, Weisz, Kende, Kolnay kaj ankoraŭ kelkaj. Kiam ili ekvidis Boka-n, ili ĉiuj kunfrapis la kalkanojn, ĉar li estis la kapitano.

Poste ili grimpis ree malspren, kaj ekiris al la ebenaĵo. Meze de la ebenaĵo grupe staris la aliaj knaboj: Csónakos, Weisz, Kende, Kolnay kaj ankoraŭ kelkaj. Kiam ili ekvidis Boka-n, ili ĉiuj kunfralis la kalkanojn, ĉar li estis la kapitano.

– Saluton! – diris Boka.

Kolnay paŝis el la grupo.

– Humile mi raportas – li diris –: kiam mi envenis, la malgranda pordo ne estis fermita. Kaj laŭ la leĝo la pordo devas esti riglita de interne.

– Boka severe rerigardis al sia sekvantaro. Kaj la aliaj ĉiuj rigardis al Nemecsek. La mano de Nemecsek denove estis sur la brusto, kaj li jam volis ĵuri, ke ne li lasis la pordon malriglita, kiam la kapitano elparolis:

– Kiu envenis lasta?

Estiĝis granda silento. Neniu envenis lasta. Dum momento silentis ĉiuj. Kaj la vizaĝo de Nemecsek sereniĝis. Li parolis:

– Sinjoro kapitano envenis lasta.

– Ĉu mi? – diris Boka.

– Jes,

Li meditis iom.

– Vi pravas – poste li diris serioze:

– Mi forgesis rigli la pordon. Pro tio sinjoro leŭtenanto, skribu mian nomon en la nigran libron.

Li turnis sin al Geréb. Geréb prenis el sia poŝo malgrandan nigran notlibron, kaj per grandaj literoj li enskribis: „Johano Boka”. Kaj por ke li sciu pri kio temas, li notis apude: „pordo”. Tio plaĉis al la knaboj. Boka estis justa knabo. Tiu sinpuno estis tio bela ekzemplo de vireco, kian eĉ dum la latinaj kurshoroj oni ne povis aŭdi, kvankam la latinaj kurshoroj estas plenaj de romiaj karakteroj. Sed ankaŭ Boka estis homo. Ankaŭ Boka ne estis sen homa malforto. Li enskribigis sin, sed poste ...

Li enskribigis sin, sed poste li turnis sin al Kolnay, kiu raportis pri la malfermita pordo:

– Kaj vi, ne denuncu ĉiam. Sinjoro ĉefleŭtenanto, enskribu Kolnay-n pro denunco.

La sinjoro ĉefleŭtenanto denove prenis la teruran notlibron, kaj enskribis la nomon de Kolnay. Kaj Nemecsek, kiu staris malantaŭe, kaŝe dancis pro ĝojo, ke jen foje ne lian nomon oni skribis en la notlibron. Ĉar oni devas scii, ke en la libro oni povis legi nenion krom la nomo de Nemecsek. Ĉiam pro ĉio, oni enskribis nur lian nomon. Kaj la tribunalo, kiu ĉiusabate kunsidis, ĉiam kondamnis nur lin. Kion fari, tio ja estis tiel. Li estis la ununura senrangulo.

Kaj nun estis la vico de gravaj priparoloj. Post kelkaj minutoj ĉiu sciis la novaĵon, ke Franĉjo Áts, la kapitano de la ruĝĉemizuloj, kuraĝis veni ĉi tien, en la koron de la grundo, li grimpis sur la mezan citadelon kaj forportis la standardon. La esprimo de la teruriĝo estis ĝenerala.

La tuta societo ĉirkaŭstaris Nemecsek-on, kiu aldonis ĉiam novajn kaj pli novajn detalojn al la sensacia novaĵo.

– Kaj ĉu li diris ion al vi?

– Jes! – fieris Nemecsek.

– Kion?

– Li alkriis min.

– Kion li kriis?

– Li kriis: „Ĉu vi ne timas, Nemecsek? – Nun glutegis la blonduleto, ĉar li sentis, ke tio ne estis tute vera. Eĉ tio estis tute la malo de la vero. Ĉar tio ŝajnigis, ke li estis sentima, kaj pro tio ankaŭ Franĉjo Áts surpriziĝis kaj demandis al li:

– Ĉu vi ne timas, Nemecsek?

– Kaj ĉu vi ne timis?

– Ne. Mi staris sub la fortikaĵo. Poste flanke li malsuprengrimpis kaj malaperis. Li forkuris.

Geréb interkriis:

– Tio ne estas vera! Franĉjo Áts
neniam ankoraŭ forkuris de iu!

Boka rigardis al Geréb.

– Hej, kiel vi defendas lin! – li diris.

–Nur tial mi diris – iom malpli laŭte
diris Geréb –, ĉar ne estas verŝajne, ke
Franĉjo Áts estis timigita de Nemecsek.

Nun ĉiuj ridis. Vere, ne estas verŝajne.
Nemecsek embarasite staris meze de la
grupo kaj levadis siajn ŝultrojn. Poste
Boka stariĝis en la mezon.

9. ELEKTO DE LA PREZIDANTO

— Ni devas ion fari, knaboj. Por hodiaŭ ni anoncis elekton de prezidanto. Ni elektos prezidanton, eĉ plenpovan prezidanton, kies ĉiujn ordonojn blinde oni devas plenumi. Estas eble, ke pro la afero estiĝos milito kaj tiam ni bezonas iun, kiu preparos la aferojn, kiel dum vera milito. Senrangulo, antaŭen. Atentu. Tranĉu tiom da paperpecetoj, kiomope ni estas, kaj ĉiu skribos sur la paperon ties nomon, kiun li volas elekti prezidanto. La paperojn ni ĵetos en ĉapelon, kaj kiu ricevos plej multe da voĉoj, tiu estos la prezidanto.

— Vivu! — ĉiuj kriis kune ...

— Vivu! — ĉiuj kriis kune kaj Csónakos enbuŝigis siajn du fingrojn, kaj fajfis laŭte, kvazaŭ draŝmaŝino. El notlibroj ili prenis paperojn kaj Weisz prenis sian krajonon. Malantaŭe du

knaboj disputis pri tio, kies ĉapelo estu honorata. Kolnay kaj Barabás, kiuj ĉiam kverelis, jam preskaŭ boksis unu la alian. Kolnay diris, ke la ĉapelo de Barabás ne estas konvena, ĉar ĝi estas grasa. Same Kende asertis, ke la ĉapelo de Koltay estas eĉ pli grasa. Pro tio ili tuj faris grasprovon. Per tranĉilo ili skrapis la internajn ledrubandojn de la ĉapeloj. Sed tion ili jam faris malfrue, ĉar Csele dume donis sian beletan nigran ĉapelon por la komuna celo. Vane, en ĉapelaj aferoj neniu povis superi Csele-n.

Sed Nemecsek, je la plej granda surpriziĝo de ĉiuj, anstataŭ disdoni la paperojn, uzis la okazon, ke la ĝenerala atento estis direktata al li, kaj premante la paperojn en sia malpura maneto, antaŭenpaŝis. Li kunfrapis siaj kalkanojn, kaj tremvoĉe ekparolis.

Li kunfrapis siaj kalkanojn, kaj tremvoĉe diris:

– Mi petas, sinjoro kapitano, tio ne povas esti, ke nur sola mi estas ĉi tie senrangulo ... de kiam ni fondis la societon, ĉiu jam iĝis oficiro, nur mi devas esti ankoraŭ senrangulo, kaj al mi ordonas ĉiuj ... kaj ĉion mi devas fari ... kaj ... kaj ...

Ĉi tie tre kortuŝiĝis la blonduleto, kaj sur liaj vangoj ekfluis dikaj larmoj.

Ĉele aristokrate diris:

– Oni devas lin eksigi. Li ploras.

Malantaŭe alia knabo aŭdigis sian voĉon:

– Li ploraĉas.

Ĉiuj ridis. Kaj tio tute malĝojigis Nemecsek-on. La koro de la kompatinda etulo tre doloris, kaj nun li fluigis libere siajn larmojn. Li ploregis, kaj dum la plorado diris:

Rigardu ... e ... e ... en la nigra libro a ... a ... ankaŭ ĉiam mi estas enskribita ... mi ... mi ... mi estas la hundo.

Boka trankvile ekparolis:

– Se tuj vi ne ĉesigos la ploraĉon, neniam plu povos veni kun ni. Kun suĉinfanoj ni ne ludas.

La vorto „suĉinfano” jam efikis. Nemecsek, malgranda, kompatinda Nemecsek tre ektimis, kaj iom post iom li ĉesigis la ploradon. Kaj la kapitano metis sian manon sur lian ŝultron.

– Se vi bone kondutos, kaj meritigos vin, en majo vi povos fariĝi oficiro. Nun provizore vi restos senrangulo.

La aliaj aprobis tion, ĉar se hodiaŭ ankaŭ Nemecsek fariĝos oficiro, la tuta afero estus ne valora. Al kiu oni povus ja ordoni? Laŭtsonis la voĉo de Geréb:

– Senrangulo, pintigu ĉi tiun krajonon.

Oni metis en lian manon la krajonon de Weisz, kies pinto derompigis en la poŝo inter la kugletoj. kaj la senrangulo obeeme transprenis la krajonon, kun

larmoplenaj okuloj kaj vizaĝo li staris kunfrapinte la kalkanumojn, kaj poste komencis pintigi ĝin, iomete tremtremante, kiel estas kutime post plorejoj, kaj ĉiuj siajn ĉagrenojn, la amarecon de sia koro li enpintigis en tiun Hardtmuth-krajonon.

— Es ... estas ĝi pintigita, sinjoro leŭtenanto.

Li redonis ĝin, kaj elspiregis. Kaj kun tiu spirego li jam rezignis pri rangaltiĝo.

Ili disdonis la papirpecetojn. Ĉiu flankeniĝis, ĉiu iris aparte, ĉar tio estis afero tre grava. Poste la senrangulo kolektis la paperojn, kaj jetis ilin en la ĉapelo de Csele. Kiam li ĉirkaŭportis la ĉapelon, Barabás ekpuŝis Kolnay-n:

— Ĉi tiu estas eĉ pli grasa.

Kolnay rigardis en la ĉapelon. Kaj ili ambaŭ sentis, ke ne estis plu kialo por honti. Se eĉ la ĉapelo de Csele estas grasa jam alvenis la fino de la mondo.

La kolektitajn paperojn Boka laŭtlegis, kaj ĉiujn li transdonis al Geréb staranta apud li. Dekkvar paperoj kolektiĝis. Li legis laŭvice: Johano Boka, Johano Boka, Johano Boka. Kaj foje li legis: Deziderio Geréb. La knaboj interrigardis. Ili sciis, ke tiu paperpeceto apartenis al Boka. Pro ĝentilo li voĉdonis por Geréb. Poste sekvis kelkaj voĉdonoj por Johano Boka. Kaj tiam denove unu por Deziderio Geréb. Kaj fine ankaŭ unu por Deziderio Geréb. Do Boka havis dekunu kaj Geréb tri voĉdonojn. Geréb ridetis embarasite. Nun okazis la unuan fojon, ke malkaŝe li estis rivalo de Boka. Kaj li ĝojis pro la tri voĉdonoj. Sed el la tri al Boka doloris du. Dum momento li pensadis pri tio, kiuj estas tiuj du, al kiuj li ne plaĉas, sed poste li trankviliĝis.

– Do vi elektis min prezidanto.

Denove ili aklamis kaj Csónakos denove fajfis. La okuloj de Nemecsek

ankoraŭ estis larmoplenaj, tamen kun grandega entuziasmo li akklamis. Li amegis Boka-n.

Kaj la prezidanto mansignis, ke oni silentu, ĉar li volas paroli.

Kaj la prezidanto mansignis, ke oni silentu, ĉar li volas paroli.

– Ni dankas, kanaboj – li diris–, kaj tuj ni eklaboru. Mi pensas, vi vidas ĉiuj klare, ke la ruĝĉemizuloj volas de ni forpreni la grundon kaj la sterojn. Jam la Pásztor-oj hieraŭ forprenis kugletojn de la knaboj, kaj hodiaŭ Fraĉjo Áts ŝteliradis ĉi tie, kaj forprenis nian standardon. Finfine ili venos ĉi tien, por forpeli nin. Sed ĉi tiun lokon ni defendos.

Csónakos interkriegis:

– Vivu la grundo!

Kaj suprenflugis la ĉapeloj. Ĉiu plengorĝe, entuziasme kriis:

– Vivu la grundo!

Ili ĉirkaŭrigardis la belan grundon kaj la sterojn, kiujn plenradiis la dolĉa suno de la printempa posttagmezo. Estis videbla sur iliaj okuloj, ke ili amas ĉi tiun peceton da tero, kaj, ke ili batalus por ĝi, se tio estus necesa. Tio ĉi estis speco de patriamo. Tiel ili kriis. „Vivu la grundo!” kvazaŭ ili krias „Vivu la patrio!” Kaj brilis iliaj okuloj, kaj ĉies koro estis plena.

Kaj Boka daŭrigis:

– Antaŭ ol ili venos ĉi tien, ni iros al ili, en la botanik-ĝardenon!

Alitempe de tia kuraĝa plano la knaboj retirus sin. Sed la horo de entuziasmo kore-anime ĉiuj kriis:

– Ni iros tien!

Kaj ĉar ĉiu kriis: „Ni iros tien”, ankaŭ Nemecsek kriis:

– Ni iros tien! – Li, la kompatindulo certe iros malantaŭe, kaj portos la jakojn de la sinjoroj-oficioj.

Kaj vinodora voĉo ankaŭ venis el inter la steroj. Tiu ankaŭ kriis:

– Ni iros tien! – Ili rigardis tien. La slovako estis tie. Tie li staris, kun pipo en la buŝo, rikanante. Apud li estis Hektor. La knaboj ridis. Kaj la slovako imitis ilin: li ĵetis en la aeron sian ĉapelon kaj kriegis:

– Ni iros tien!

Kaj per tio finiĝis la oficialaj aferoj. Sekvis pilkludo. Iu kriis fiere:

– Senrangulo, iru en la magazenon, kaj alportu la pilkon!

Kaj Nemecsek kuris en la magazenon. La magazeno estis sub iu stero. Li rampis sub ĝin, kaj elprenis la pilkon. Apud la stero staris la slovako, apud la slovako staris Kende kaj Kolnay. En la mano de Kolnay estis la ĉapelo de la slovako, kaj pri ĝi ili faris grasprovon. Sendube la ĉapelo de la slovako estis la plej grasa.

Boka iris al Geréb.

– Ankaŭ vi ricevis tri voĉojn – li diris al li.

– Jes – fiere respondis Geréb, kaj fikse rigardis en liajn okulojn.

(TRIA PARTO)

10. AVENTUROJ EN LA BOTANIK- ĜARDENO 1

La sekvan tagon posttagmeze, post la stenografia kurshoro la militplano jam estis preta. La stenografia kurshoro finiĝis je la kvina kaj sur la stratoj oni jam ekbruligis la lampojn. Veninte el la lernejo Boka diris al la knaboj:

— Antaŭ ol ataki ilin, ni pruvos, ke ankaŭ ni estas tiom kuraĝaj, kiom ili. Mi prenos kun mi niajn plej kuraĝajn kamaradojn, kaj iros kun ili en la botanik-ĝardenon. Ni penetros en ilian insulon kaj najlos ĉi tiun paperon sur arbon.

Kaj li montris pecon da ruĝa papero, sur kiu per majuskloj estis skribite:

ĈI TIE ESTIS LA KNABOJ DE PAŬLO-STRATO

La aliaj emociite rigardis la paperon. Csónakos, kiu ne lernis stenografion, sed kiun la scivolemo venigis tien, faris rimarkon:

– Ankaŭ ion neĝentilan ni devus skribi sur la paperon.

Boka nee skuis la kapon.

– Ne estus dece. Eĉ ni agus, kiel agis Franĉjo Áts, kiam li forportis la standardon. Ni nur montros al ili, ke ni ne timas ilin, kaj ke ni kuraĝos iri en ilian regnon, kie ili okazigas la kunvenojn kaj kie ili gardas la batalilojn. Tiu ĉi peceto da papero estas nia vizitkarto. Ĉi tion ni lasos tie por ili.

Ankaŭ Csele ekparolis:

– Mi petas – li diris –, mi aŭdis, ke ĉi tie, vespere ili estas tie sur la insulo, kaj kutimas ludi „rabisto-kaptiston”.

– Ne grave. Ankaŭ Franĉjo Áts venis, en tiu tempo, pri kiu ili sciis, ke ni estas sur la grundo. Kiu timas, tiu ne venos kun mi.

Sed neniu timis. Eĉ Nemecsek sendube montriĝis kuraĝa. Estis videble, ke li volas akiri meritojn por la rangaltiĝo. Fiere li paŝis antaŭen:

– Mi iros kun vi!

Oni devas scii, ke ĉi tie, antaŭ la lernejo ne estis devigate stari kun kunfrapitaj kalkanoj, kaj saluti soldate, ĉar nur sur la grundo estis validaj la leĝoj. Ĉi tie ĉiu estis egala. Nun Csónakos paŝis antaŭen:

– Ankaŭ mi!

– Sed promesu, ke vi ne fajfos!

– Mi promesas. Nur nun . . . lasu ankoraŭ unufoje, lastfoje fajfi!

– Do fajfu!

Kaj Csónakos fajfis. Tiom bonguste, vere laŭplaĉe, ke sur la strato la homoj turnis sin.

– Por hodiaŭ nun mi fajfis sufiĉe, – li diris feliĉe.

Boka turnis sin al Csele:

– Ĉu vi ne venos?

– Kion mi faru? – diris Csele malgaje
– Mi ne povas iri, ĉar je la kvina kaj duono mi devas esti hejme. Mia patrino tre bone scias, kiam finiĝis la stenografia studhorro. Kaj mi timas, se nun mi malfruiĝos neniam plu ŝi permesas al mi iri ien.

Kaj li tre ektimis ĉe tiu penso. Ĉio finiĝus: la grundo, la ĉefleŭtenanteco!

– Nu do, restu. Mi iros kun Csónakos kaj Nemecsek. Kaj morgaŭ matene en la lernejo vi sciigĝos pri ĉio okazinta.

Ili manprenis. Boka ekmemoris pri io:

– Diru, ĉu Geréb hodiaŭ ne ĉeestis la stenografian kurshoron?

– Ne.

– Ĉu li estas malsana?

– Mi ne kredas. Tagmeze kune ni iris hejmen. Li estis tute sana.

Al li ne plaĉis la konduto de Geréb. Geréb plej altgrade estis suspektinda. Hieraŭ tiom strange, tiom multsignife li rigardis en liajn okulojn, kiam ili disiĝis. Estis videble sur la knabo, ke li sentis: dum Boka apartenos al tiu ĉi societo, li neniom povos prosperi. Li estis ĵaluza je Boka. En li estis multe pli da sango, pli da kuraĝo; la sama silenta, saĝa, serioza naturo de Boka ne plaĉis al li. Li opiniis sin pli valora.

– Dio scias – li diris mallaŭte, kaj ekiris kun la du knaboj. Csonakos iris serioze apud li, Nemecsek estis gaja, kaj ĝojegis, ke fine tiom malmultope li

povas partopreni interesan aventuron. Li estis tiom gaja, ke Boka eĉ riproĉis lin:

— Ne stultu, Nemecsek. Aŭ ĉu vi pensas, ke ni iros por amuziĝi? Tiu ĉi ekskurso estas multe pli danĝera, ol vi opinias! Nur rememoru pri la Pásztoroj!

Ĉi tiu vorto tuj ĉesigis la gajon de la blonduleto, Ĉar Franĉjo Áts estis terura knabo, laŭfame oni eĉ eksigis lin el la real-lernejo. Li estis fortega kaj nekredeble kuraĝa knabo. Sed estis en siaj okuloj io afabla kaj simpatia, kio mankis en la okuloj de la Pásztor-oj. Tiuj ĉi iris ĉiam kun klinitaj kapoj, rigardis malgaje kaj penetre, ili estis sunbrunigitaj knaboj, kaj ankoraŭ neniu vidis ilin ridi. La Pásztor-ojn oni povis timi. Kaj la tri etaj junuloj rapide iris tra la senfina Üllői-strato. Nun jam iĝis tute mallume, frue venis vespero. Jam ĉiuj gaslampoj brulis sur la stratoj, kaj tiu nekutima tempo maltrankviligis la knabojn. Posttagmeze ili kutimis

amuziĝi. Ĉi-tempe ili ne kutimis iri sur la stratoj, sed hejme ili sidadis apud siaj lernolibroj. Mute ili iris unu apud la alia, kaj post kvaronhoro ili atingis la botanik-ĝardenon. Trans la ŝtonmuroj timige montris sin grandaj arboj, kiuj nun komencis iĝi foliaj. La vento muĝis inter la freŝa foliaro, estis malhele, kaj dum antaŭ ili sinetendis la grandega botanik-ĝardeno, kun sia mistera, fermita pordego, iliaj koroj ekbatis. Nemecsek volis sonorigi sur la pordo.

– Pro Dio, ne sonorigu! – diris boka.
– Ili ekscios, ke ni estas ĉi tie! Aŭ ni renkontos ilin survoje ... ja cetere, oni ja ne malfermos por ni la pordegon!

– Sed kiamaniere ni eniru?

Boka okule signis al la muro.

– Ĉu trans la muron?

– Jes, trans la muron.

– Ĉu tie ĉi en la Ŭllői-strato?

– Tute ne! Ni ĉirkaŭiros la ĝardenon. Malantaŭe multe pli malalta estas la muro.

Kaj ili eniris malhelan strateton, kie la ŝtonmuro post kelkaj paŝoj ŝanĝiĝis al palisaro. Tie ili trotpaŝadis preter la palisaro, serĉante konvenan lokon, kie estus eble transgrimpi la muron. Ie, kien ne penetris la lumo de la strata lampo, ili haltis. Interne de la palisaro, tute apud ĝi staris granda robinio.

– Se ĉi tie ni suprengrimpos, - flustris Boka, - sur tiu robinio facile ni povos malsuprengrimpi. Ankaŭ tial estos bone, ĉar de sur la arbo ni povos vidi malproksimen, kaj povos observi, ĉu ili estas en la proksimo, aŭ ne.

Ĉi tion ankaŭ la aliaj aprobis. Kaj en la posta sekundo ili eklaboris. Ĉsónakos ekkaŭris, kaj per siaj manoj li apogis sin al la palisaro. Boka singarde starigis sur liaj ŝultroj kaj rigardis trans la barilon;

ili estis tre silentaj; neniŭ eĉ flustris. Post kiam Boka konvinkiĝis, ke neniŭ estas en la proksimo, li mansignis. Kaj Nemecsek flustris al Csónakos:

– Levu lin!

Kaj Csónakos levis la prezidanton trans la palisaron. La prezidanto grimpis sur la supron de la palisaro, kaj tiam ekkrakis sub li la putriĝinta kadukaĵo.

– Saltu malsupren! Flustris Csónakos.

Aŭdiĝis ankoraŭ kelkfoja krakado, kaj en la sekvinta minuto mallaŭta, obtuza sono. Boka troviĝis meze de plantbedo. Post li engrimpis Nemecsek, poste Csónakos. Sed Csónakos antaŭe grimpis sur la robinion, li tre lerte povis grimpi sur arbon, ĉar li estis vilaĝa knabo. La du aliaj de malsupre demandis:

– Ĉu vi vidas ion?

Obtuza voĉo respondis de la arbo:

– Tre malmulte, ĉar estas malhele.

– Ĉu vi vidas la insulon?

– Ĝin mi vidas.

– Ĉu iu estas tie?

Csónakos atente kliniĝis dekstren-maldekstren inter la branĉoj, kaj longtempe rigardis tra la mallumo al la lago.

– Sur la insulo mi povas vidi nenion pro la arboj kaj arbetoj . . . sed sur la ponto . . .

Li eksilentis. Li grimpis pli supren je unu branĉo. De tie li daŭrigis:

– Nun jam bone mi vidas. Sur la ponto staras du figuroj.

Boka diris mallaŭte:

– Ili estas tie. Tiuj sur la ponto estas la gardantoj.

Poste denove krakadis la branĉoj. Csónakos malsuprengrimpis desur la arbo. Silente ili staris tie triope kaj meditadis, kion ili faru. Ili ekkaŭris

malantaŭ arbetoj, por ke neniu rimarku ilin, kaj tie mallaŭte komenciĝis la priparolo.

– Estus plej bone – diris Boka –, se tie laŭlonge de la arbetoj, iamaniere ni povus atingi la fortikaĵ-ruinon. Ĉu vi scias? . . . tie estas fortikaĵ-ruino konstruita apud monteto.

La du aliaj mute kapjesis, ke ili konas tiun lokon.

– Singarde ni povos atingi la fortikaĵ-ruinon, kaŭrante inter arbetoj. Tie ni grimpos sur la monteton kaj ĉirkaŭrigardos. Se ni vidas nenion, ni kuŝiĝos ventren, kaj rampos malsupren desur la monteto. La monteto kondukas rekte al la lago. Tie ni kaŝiĝos inter la karikoj kaj decidus, kion fari.

11. AVENTUROJ EN LA BOTANIK-ĜARDENO 2

Du brilantaj okulparoj atentis al Boka. Por Csónakos kaj Nemecsek ĉiu lia vorto estis kvazaŭ sankta skribo.

Boka demandis:

– Ĉu bone?

– Bone! – kapsignis la du aliaj.

– Do antaŭen! Ĉiam venu post mi. Ĉi tie la vojoj estas konataj de mi.

Kaj mane-piede li ekrampis inter la malaltaj arbetoj. Apenaŭ liaj du sekvantoj ekkaŭris, kiam longa, akra fajfo aŭdiĝis el la malproksimo.

– Ili rimarkis nin! – diris Nemecsek, kaj li stariĝis.

– Reen! Reen! Kuŝiĝu ventren! – donis la ordonon Boka, kaj ili kuŝiĝis ventren en la herbo. Kun retenita spiro

ili atentis, kio nun okazos. Ĉu vere oni rimarkis ilin?

Sed neniu venis. La vento muĝis inter la arboj. Boka flustre diris:

– Nenio.

Sed tiam denove akra fajfo fendis la aeron. Denove ili atendis, sed denove venis neniu. Nemecsek tremante diris ĉe trunko de arbeto:

– Ni devus ĉirkaŭrigardi desur arbo.

– Vi pravas. Csónakos grimpu sur ĉi tiun arbon!

Kaj Csónakos kvazaŭ kato, jam denove estis sur iu granda robinio.

– Kion vi vidas?

– Sur la ponto moviĝas figuroj . . . nun ili estas kvarope . . . nun du reiras sur la insulon.

– Do ĉio estas en ordo, –diris Boka trankviliĝinte. – Venu malsupren. La

fajfo signifas, ke sur la ponto oni ŝanĝas la gardantojn.

Csónakos venis malsupren de la arbo, kaj ili ekiris lerte man-piede al la monteto. En la granda mistera botanik-gardeno nun regis granda silento. La vizitantoj jam hejmeniris je la sonorilsono, kaj tie ne restis plu fremduloj krom tiuj, kiuj intencas ion malbonan, aŭ krom tiuj, kiuj okupas sin pri militaferoj, kiel tiuj tri malgrandaj, malhelaj figuroj, kiuj kaŭrante iris de arbeto al arbeto. Eĉ ne unu vorton ili diris unu al la alia, tiom grave ili sentis sian devon. Nun, por paroli sincere, iom da timo obsedis ilin. Oni devas havi ja grandan kuraĝon por riski la eniron en la armitan fortikaĵon de la ruĝcemizuloj, en la insulon estantan meze de la lago, dum sur la ununura ligna ponto, kondukanta al la insulo, staras gardantoj. „Kaj eble la Pasztor-oj” – pensis Nemecsek, kaj li ekmemoris pri

la belaj, koloraj kugletoj, inter kiuj estis ankaŭ vitrokugletoj, kaj eĉ nun li ankoraŭ koleris pro la penso, ke ĝuste tiam aŭdiĝis la terura vorto „Ejnŝtand”, kiam li rulis, kaj tiujn multajn belajn kugletojn li estus eble gajninta . . .

– Ve! – kriis Nemecsek.

La du aliaj ektimiĝinte ĉesis la rampadon.

– Kio okazis?

Neelpreninte la fingron el sia buŝo li respondis:

– Mi paŝis sur urtikon per mia mano.

– Suĉu, nur suĉu, paĉjo – diris Csónakos –, sed li estis saĝa, kaj siajn manojn volvis en poŝtukojn.

Ili rampis-grimpis plu, kaj baldaŭ atingis la monteton. Tie, apud flanko de la monteto, kiel ni jam scias, artefarita konstruaĵo estis starigita, kian oni ofte konstruas en la ĝardenoj de grandsinjoroj, zorge imitante la stilon de

malnovaj fortikaĵoj kaj garnante la interspacojn de la ŝtonego per artefarita musko.

– Jen la fortikaĵ-ruino, - klarigis Boka. – Ĉi tie ni devas atenti, ĉar mi aŭdis, ke la ruĝĉemizuloj kutimas fari ekskursojn ĉi tien.

Ankaŭ Csónakos ekparolis:

– Kia fortikaĵ-ruino ĝi estas? En la historio ni ne lernis, ke en la botanik-ĝardeno estis fortikaĵo . . .

– Ĝi estas nur ruino. Oni konstruis ĝin estiel ruinon.

Nemecsek ekridis:

– Sed, se oni konstruis, kial ne konstruis novan fortikaĵon? Post cent jaroj per si mem ĝi ja estus iĝinta ruino .

– Hej, kiom bonan humoron vi havas!– riproĉis lin Boka. – Certe se la Pásztor-oj rigardos en viajn okulojn, vi ne havos emon por ŝerci.

Vere, la eta Nemecsek tuj iĝis malĝojmiena. Li estas tia knabo, kiu ĉiumomente forgesas, ke li troviĝas en malbona situacio. Oni ĉiam devis lin memorigi pri tio.

Kaj ili ekgrimpis sur la ruinaĵon, inter la sambukarbetaĵoj. Nun Csónakos iris antaŭe. Subite, tiel, kiel li estis, manepiede li haltis. Li levis sian dekstran manon. Poste li turnis sin, kaj kun timigita voĉo diris:

— Iu pasadas ĉi tie.

Ili faligis sin en la altan herbon. La herbo bone kovris iliajn malgrandajn figurojn. Nur iliaj okuloj brilis en la densaĵo. Ili atentis.

— Metu vian orelon sur la teron, Csónakos, — donis flustre la ordonon Boka. — La indianoj kutimas tiel aŭskulti. Tiel oni povas facile aŭdi, se iu paŝadas en la proksimo.

Csónakos obeis. Li kuŝiĝis ventre sur la tero iuloke, kie ne kreskis herbo, metis sian orelon sur la teron. Sed tuj li relevis ĝin.

– Ili venas, -li flustris terurite.

Nun jam sen la indiana metodo oni povis aŭdi, ke iu trotadas inter la arbetoj. Kaj ĉiu tiu mistera estaĵo, pri kiu ili provizore ne sciis, ĉu ĝi estas besto aŭ homo, venis rekte al ili. La knaboj ektimis, kaj ankaŭ siajn kapojn klinis en la herbon. Nur Nemecsek ekparolis per mallaŭta, ĝema voĉo:

– Mi deziras hejmeniri.

– Premu vin al la tero, paĉjo.

Sed ĉar Nemecsek eĉ por tio ne estis kuraĝa, Boka elmetis sian kapon en la herbon, kaj kolerbrilaj okuloj diris al li, kompreneble flustre, por ke oni ne rimarku ilin:

– Senrangulo, premu vin en la herbon.

Tiun ordonon oni devis obei. Nemecsek premis sin al la tero. La mistera estaĵo senĉese trotadis, sed nun aŭdiĝis, kvazaŭ ĝi ŝanĝis la direkton, kaj ne venos al ili. Boka denove stariĝis piedpingre, kaj ĉirkaŭrigardis. Li vidis malhelan figuron, kiu nun malsupreniris de monteto, kaj batadis la arbitaĵon per bastono.

– Li foriris, – diris Boka al la knaboj ventre kuŝantaj sur la herbo. – Estis gardisto.

– Ĉu la gardanto de la ruĝĉemizuloj?

– Ne. La gardisto de la botanik-gardeno.

Ili ekspiris. Plenaĝulon ili ne timis. Jen, ekzemple la ruĝnaza patri-defendanto en la muzeogardeno, li povis fari al ili nenion. Ili daŭrigis la rampadon. Sed tiam verŝajne la gardisto ekaŭdis ion, ĉar li haltis, kaj aŭskultadis.

– Oni rimarkis nin, – balbutis Nemecsek. Nun ambaŭ rigardis al Boka, kaj atendis liajn ordonojn.

– Ni eniru en la ruinaĵon! – ordonis Boka.

Ĉiuj tri freneze rampis malsupren de la monteto, sur kiun nelonge tiom singarde ili rampis. La ruinaĵo havis malgrandajn fenestrojn. Konsternite ili vidis, ke la unuan fenestron kovras ferkadro. Ili ŝteliris al la dua, ankaŭ sur tiu estis ferkadro. Fine iuloke inter ŝtonoj ili trovis tiom grandan fendon, tra kiu ili povis rampi en la ruinaĵon. Ili rampis en la malhelan niĉon, kaj eĉ la spiradon retenis. La figuro de la gardisto preterpasis la fenestron. De tie ili vidis, ke nun li tute foriris al la Üllői-strata parto de la ĝardeno, kie estas lia loĝdomo

– Danke al Dio, – ekparolis Csónakos –, ni jam estas trans ĉio.

Kaj ili ĉirkaŭrigardis en la malhela niĉo. Malseka, mucida estis tie la aero, kvazaŭ ili estus en la kelo de vera fortikaĵo. Dum la palpepaŝado Boka subite haltis. Li surpaŝis ion. Li sinklinis kaj ĝin levis. La du aliaj saltis apud lin kaj ĉe la malforta lumo de la krepusko ili vidis, ke ĝi estas – tomahaŭko. Tia hakileto, per kiu, laŭ la romanoj, la indianoj batalas. La tomahaŭko estis farita el ligno kaj tegita per arĝenta papero. Timige ĝi brilis en la malhelo.

– Ĝi apartenas al ili! – Sentoplene diris Nemecsek.

– Jes certe – faris Boka rimarkon –, kaj se ĝi estas ĉi tie, devas esti ankaŭ pluraj. Ili komencis serĉadi kaj trovis ankoraŭ sep. El tio facile divenneblis, ke estas ok ruĝĉemizuloj. Verŝajne, ĉi tiu loko esas ilia sekreta arsenalo. La unua penso de Csónakos estis, ke la ok

hakiletojn ili devus forporti estiel militakiraĵon.

– Ne, – diris Boka –, tion ni ne faros. Tio estus ordinara ŝtelo.

Csónakos ekhontis.

– Nun parolu, paĉjo, – kuraĝigis lin Nemecsek, sed Boka malforte ekpuŝis lin, kaj li eksilentis.

– Ni ne perdu senutile tempon. Ni elkrampu eksteren, kaj supreniru la monteton! Mi ne volas, ke ni atingu la insulon, kiam jam neniuj estos tie.

Tiu kuraĝa penso denove donis al ili emon por la aventuro. La hakiletojn ili disĵetis sur la tero, por ke oni vidu, ke iu estis ĉi tie. Poste ili elrampis tra fendo, kaj nun jam kuraĝe rapidis sur la supron de la monteto. De la monteto oni povis vidi malproksimen. Ili haltis unu apud la alia, kaj ĉirkaŭrigardis. Boka prenis pakaĵon el sia poŝo. Li malvolvis

gazetpaperon kaj malgrandan perlamot-lorneton prenis el ĝi.

— Ĝi estas la teatra lorneto de la fratino de Csele, — li diris, kaj rigardis tra ĝi. Sed ankaŭ sen ĝi oni povis vidi la insulon. Ĉirkaŭ la malgranda insulo brilis lageto, kie oni kulturadis akvokreskaĵojn, kaj sur kies bordo dense kreskis kariko kaj kano. Inter la foliaraj arboj kaj altaj arbetoj de la insulo briletis malgranda lumpunko. Vidante tion la tri knaboj serioziĝis.

— Ili estas tie, — diris csónakos kun sufokita voĉo.

Al Nemecsek plaĉis la lampo: — Ankaŭ lampon ili havas!

12. AVENTUROJ EN LA BOTANIK- ĜARDENO 3

La malgranda lumpunkto moviĝis sur la bordo. Iu portis tien kaj reen la lampon.

– Kiel mi vidas ... – diris Boka, kiu eĉ por momento ne forprenis de siaj okuloj la lorneton, – kiel mi vidas, ili preparas sin por io. Aŭ ili faras vesperan ekzarcadojn ... aŭ ...

Li subite eksilentis .

– Nu? – demandis maltrankvile la du aliaj.

– Granda Dio! – diris Boka konstante rigardante tra la lorneto –, tiu, kiu portas la lampon ...

– Nu, kiu li estas?

– Konata figuro ... ĉu vere ...

Li iris pli supren, por vidi pli bone, sed tiam la lampa brilo malaperis malantaŭ

arbeto. Boka prenis la lorneton de siaj okuloj.

– Li malaperis, - li diris mallaŭte.

– Sed kiu li estis?

– Tion mi ne povas diri. Mi ne vidis lin bone kaj ĝuste, kiam mi volis pririgardi lin, li malaperis. Kaj dum mi ne scias certe, nenium mi volas suspekti . . .

– Ĉu iu el la niaj?

Malĝoje respondis la prezidanto:

– Jes, mi opinias.

– Sed tio estas perfido! – ekkriis Csónakos, forgesinte, ke li devas esti silenta.

– Silentu! Se ni atingos tiun lokon, ni ekscios ĉion. Ĝis tiam havu paciencon.

Nun jam vere pelis ilin la scivolo. Boka ne volis diri. al kiu similis la fuguro portanta la lampon. Ili provis diveni, sed tion la prezidanto malpermesis, kun tiu rimarko, ke ne

estas dece suspekti iun ajn. Ekscitite ili rapidis de la monteto kaj poste denove mane-piede daŭrigis la iradon en la herbo. Nun jam ili tute ne rimarkis, se sur dornon, urtikion, aŭ akran stoneron ili „manpaŝis.” Ili rapidis, mute rampis pli kaj pli proksimen al la ordo de la mistera lageto.

Ili atingis ĝin. Tie ili povis ankaŭ stariĝi, ĉar la densaj karikoj, kanoj kaj bordaj arbetoj estis tiom altaj, ke ili kovris iliajn malgrandajn figurojn. Boka morttrankvile donis la ordonon:

– Ie, ĉi tie devas esti boato. Mi iros kun Nemecsek dekstren laŭ la bordo, kaj vi, Csónakos, iros maldekstren por serĉi la boaton. Kiu pli frue trovos ĝin, tiu atendos la alian.

Tuj silente ili ekiris. Sed apenaŭ ili faris kelkajn paŝojn, Boka inter la kanaro ekvidis la boaton.

– Ni atendu – li diris.

Ili atendis, ĝis Csónakos tute ĉirkaŭiros la lagon, kaj de la kontraŭa bordo revenos ĉi tien. Ili sidiĝis sur la bordo, kaj dum iom da tempo rigardis la stelplenan ĉielon. Poste ili atentis, ĉu ne aŭdiĝas parolo de la insulo. Nemeĉek volis esti saĝa.

– Aŭdu – li diris–, mi metos mian orelon sur la teron.

– Nur lasu vian orelon trankvila, – diris Boka –, ĝin vane vi klinus sur la teron apud la bordo. Sed se ni kliniĝus super la akvon, tie ni pli bone aŭdos. Mi vidis ĉe la Danubo, la fiŝkaptistojn, kiam kliniĝante super la akvon ili parolis unu kun la alia. Vespere la akvo tre bone transportas la voĉon.

Ili kliniĝis super la akvon, sed ne aŭdis kompreneblajn vortojn. Nur flustro, movetado aŭdiĝis el la insuleto. Dume alvenis Csónakos kaj malbonhumore li raportis:

- Nenie troviĝas la boato.

- Ne malĝoju, paĉjo - konsolis lin Nemecsek -, ĝi jam estas trovita.

Kaj ili ekiris malsupren al la boato.

- Ĉu ni eniros ĝin?

- Ne ĉi tie ni eniros ĝin -, diris Boka. - La boaton unue ni trenos ĝis la bordo kontraŭa al la ponto, por ke ni ne estu proksime al la ponto, se oni rimarkus nin. Ĉe la plej malproksima punkto de la ponto ni transremos, por ke oni devu multe ĉirkaŭiri, se ili volas kuri post nin.

Ĉi tiu antaŭvida saĝo plaĉis al la du aliaj. Kuraĝigis ilin la scio, ke ilia estro estas tiom saĝa knabo kaj tiom lerte povas kombini. Kaj la estro ekparolis:

- Kiu havas ŝnuron?

Csonakos havis ĝin. En la poŝo de Csónakos troviĝis ĉio. Ne ekzistas tia bazaro, en kiu estis tiom da aĵoj, kiom en la poŝo de Csónakos. En ĝi troviĝis tranĉilo, ŝnuro, kugleto, kupra anso,

najlo, ŝlosilo, ĉifono, notlibro, ŝraŭbilo kaj nur Dio scias, ankoraŭ kio. Li elpoŝigis la ŝnuron, kaj Boka ligis ĝin sur la ringeto, kiu estis ĉe la antaŭo de la boato. Kaj tiel laŭ la bordo ili trenis tre malrapide, singarde la boaton, ĝis la bordo, estanta ĉe la alia flanko de la insulo. Dum ili trenis ĝin, konstante ili atentis la insulon. Kaj kiam ili atingis tiun lokon, kie ili volis eniri la kadukan kalfatraĵon, denove ili aŭdis la antaŭ nelonge aŭditan fajfadon. Sed nun ili jam ne ektimis. Ili sciis bone, ke tio signifas la gardanto-ŝarĝon sur la ponto. Kaj krome ili ne plu timis, ĉar ili sentis, ke ili estas entuziasmaj por la milito. Tiaj estas ankaŭ la veraj soldatoj en la veraj militoj. Dum oni ne vidas soldatojn, oni ektimas pro ĉiu arbitaĵo. Sed kiam la unua kuglo estas pasinta preter iliaj oreloj, tiam ili kuregas al la morto.

La knaboj eniris la boaton. La unua eniris Boka, la dua Csónakos. Nemecsek timeme paŝadis sur la ŝlima bordo.

- Venu, venu, paĉjo - instigis lin Csónakos.

- Mi venas, paĉjo -, diris Nemecsek, poste li ekglitis, pro timo li ekkaptis maldikan kantrunkon, kaj senvorte falis en la akvon. Ĝis la kolo li subakviĝis, sed li ne kuraĝis krie. Tuj li stariĝis en la malprofunda akvo, kaj li aspektis tre ridinda figureto, kiam sur li la akvo defluis, kaj en sia mano li ankoraŭ fortege premis la kantrunkon kvazau plumingon.

Csónakos ne povis reteni, kaj li ekridis:

- Ĉu vi trinkis, paĉjo?

- Mi ne trinkis - diris kun timiĝinta vizaĝo la blonduleto, kaj malseke, kotkovrite li eniris la boaton. Ankoraŭ li estis pala pro la ektimo.

- Mi ne estus kredinta, ke hodiaŭ mi ankoraŭ banos min - li diris mallaŭte. Sed ili ne havis tempon por perdi. Boka kaj Csónakos ekpremisis la remilojn, kaj forpuŝis la boaton de la bordo. La peza boato malrapide tranĉis la akvon, kaj ondigis la lageton ĉirkaŭ si. Senbrue ili manumis la remilojn, kaj tiom granda estis la silento, ke klare estis aŭdebla, kiel dentklakadis la eta Nemecsek en la antaŭa parto de la boato. Post kelkaj momentoj la boateto albordiĝis sur la insulo. La knaboj rapide elboatiĝis, kaj tuj kaŭriĝis malantaŭ arbeto.

- Nu, ankaŭ ci tien ni alvenis - diris Boka, kaj mallaŭte, singarde li ekrampis sur la bordon. La du aliaj sekvis lin.

- Ho - diris la prezidanto, sin turnante -, la boaton ni ne lasos sola. Se oni rimarkos ĝin, ni ne povos rifuĝi el la insulo. Sur la ponto staras gardantoj. Restu ĉe la boato, ĉar ja via nomo estas Csónakos. Kaj se iu rimarkos la boaton,

metu viajn fingrojn en la buŝon, kaj fajfu laŭte kiel vi povas. Tiam ni rekuros, saltos en la boaton, kaj vi forpuŝos ĝin de la bordo.

Csónakos repaŝis al la boato, kaj sekrete jam ĝojis, ke eble estos okazo laŭte fajfi, kiel povas.

Kaj Boka rampis plu kun la blonduleto laŭborde de la akvo. Kie la arbetoj estis pli altaj, tie ili starigis kaj tiel ŝteliris antaŭen. Ĉe iu alta arbeto ili haltis. Tie ili disigis la foliaron. Ili povis vidi en la mezon de la insulo, kie estis maldensejo, kaj jen, ili ekvidis la timigan trupon de la ruĝemuloj. La koro de Nemecsek ekbatis. Li premis sin al Boka.

- Ne timu - flustris en lian orelon la prezidanto. En la mezo de la maldensejo estis granda ŝtono, kaj sur la ŝtono estis la lampo. Ĉirkaŭ la lampo kaŭris la ruĝemuloj. Vere, ĉiu havis ruĝan

ĉemizon. Apud Franĉjo Áts kaŭris la du Pásztor-knaboj kaj apud la pli juna Pásztor kaŭris iu, kiu ne havis ruĝan gimnastikĉemizon . . .

Boka sentis, ke Nemecsek ekstrems apud li.

- Ĉu . . . - diris Nemecsek, sed nur tion li povis diri -, ĉu . . .

Poste li aldiris: - Ĉu vi vidis?

- Jes, mi vidas - diris malgaje Boka.

Tie, apud ruĝĉemizuloj kaŭris Geréb. Do li ne eraris, kiam de la momento li rigardis al ĉi tiu direkto. Vere, estis Geréb, kiu antaŭ nelonge iradis tien, kaj reen kun la lampo. Nun kun atento ili observis la trupon de la ruĝĉemizuloj. La lampo strange lumigis la malhelvizaĝajn Pásztor-ojn, kaj la ruĝajn ĉemizojn de la aliaj. Ĉiu silenis, nur Geréb parolis mallaŭte. Ion li parolis, kio tre multe interesis la aliajn, ĉar ĉiu klinis sin al li kaj tre atente

aŭskultis lin. En la granda vespera silento ankaŭ la du knaboj de Paŭlo-strato audis la vortojn de Geréb.

Li diris:

- La grundon oni povas eniri de du lokoj. . . . Oni povas enire ĉe la Paŭlo-strato, sed tie malfeliĉe, ĉar ekzistas leĝo, laŭ kiu la lasta enirinto devas post si rigli la pordon. La alia elirejo estas ĉe la Maria-strato. Tie la granda pordego de la vaporsegilejo ĉiam estas malfermita, kaj de tie inter la steroj oni povas atingi la grundon. Nur pro tio estas iom malfacile, ĉar en la stratetoj inter la steroj estas fortikaĵoj . . .

- Mi scias - interrompis Franĉjo Áts profundvoĉe, kiu tremigis la knabojn de Paŭlo-strato.

- Vi povas scii, vi ja estis tie - daŭrigis Geréb. - En la fortikaĵoj estas gardantoj, kaj ili tuj donas signalon, se iu

proksimiĝas inter la steroj. Mi ne konsilas, ke vi venu de tie . . .

Do temis pri tio, ke la ruĝĉemizuloj venos sur la grundon . . .

Geréb parolis plu:

- Plej bone estus se antaŭe ni priparolos, kiam vi venos. Tiam la grundon mi eniros la lasta, kaj lasos malfermita la pordon. Mi ne riglos ĝin.

- Bone - diris Franĉjo Áts - , tio estas ĝusta. Mi ne volas okupi la grundon, kiam neniu estas tie. Laŭregule ni militiros kontraŭ ili. Se ili sukcesos defendi sian grundon, bone. Se ili ne povos defendi, ni okupos ĝin kaj alfiksos la ruĝajn standardojn. Ni faros tion ne pro AVINDO [?], tion ja ni scias . . .

Nun ekparolis unu el la Pasztor-oj:

- Ni faros tion, por havi pilkludejon. Ĉi tie ni ne povas ludi, kaj en la Esterházy-strato oni ĉiam devas batali

pri la loko . . . Ni bezonas pilkludejon - kaj punkto!

Jen, ĝuste pro tia kaŭzo ili decidis la militon, pro kia la veraj soldatoj militas. La rusoj bezonis maron, tial ili militis kontraŭ la japanoj. La ruĝĉemizuloj bezonis pilkludejon, kaj ĉar alimaniere estis neeble, per milito ili volis akiri ĝin.

- Do tiel okazos - diris Franĉjo Áts, la estro de la ruĝĉemizuloj -, ke laŭ la priparolo vi forgesos fermi la Paŭlostratan pordeton.

- Jes! - diris Geréb.

Sed nun jam la koro de la eta Nemecsek tre ekdoloris. Li staris tie, en tute malseka vesto, kun larĝe malfermitaj okuloj, kaj rigardis la ruĝĉemizulojn sidantajn ĉirkaŭ la fajro kaj inter ili la perfidulon. Tiel doloris la koro, kiam el la buŝo de Geréb aŭdiĝis tiu "jes", kiu signifis, ke Geréb intencas perfidi la grundon, ke li ekploris. Li

ĉirkaŭbrakis la kolon de Boka, ploradis mallaŭte, kaj diris nur:

- Sinjoro prezidanto . . . sinjoro prezidanto . . . sinjoro prezidanto . . .

Boka bonkore ŝovis lin for de si:

– Nun plorado ne utilas.

13. AVENTUROJ EN LA BOTANIK- ĜARDENO 4

Sed ankaŭ lian gorĝon sufokis io. Estis tre aflikta afero, kiun faris Geréb ĉi tie.

Sed nun subite je la signo de Franĉjo Áts, stariĝis la ruĝĉemizuloj.

- Nun iros ni hejmen - diris la estro. - Ĉu havas ĉiu sian batalilon? - Jes - diris ĉiuj, kaj ili prenis de la tero la longajn ligno-lancojn, sur kies finoj estis ruĝaj standardetoj.

- Antaŭen - komandis Franĉjo Áts -, inter la arbetojn, metu piramidforme la batalilojn!

Kaj ĉiuj ekiris, gvidante de Franĉjo Áts, al la centro de la insuleto. Ankaŭ Geréb foriris kun ili. La malgranda placo restis malplena, en ĝia mezo la ŝtono, sur la ŝtono la lampo. Iliaj paŝoj aŭdiĝis, dum ili malproksimiĝis, pli kaj

pli irante en la densaĵon, por kaŝi la lancojn.

Boka ekmoviĝis.

- Nun - li flustris al Nemecsek, kaj elpoŝigis la ruĝan paperon, tra kiu jam estis pikita desegnonaĵlo. Li disigis la branĉojn de la arbetaĵo, kaj diris al la blonduleto:

- Atendu ĉi tie! Eĉ ne moviĝu!

Kaj li saltis en la maldensejon, kie antaŭ iom da tempo ankoraŭ sidis la ruĝĉemizuloj. Nemecsek retenis eĉ la spiron, tiel li rigardis post lin. La unua ago de Boka estis, ke li saltis al la granda arbo, kiu staris ĉe la rando de la maldensejo, kaj kiu per sia foliarkrono, kvazaŭ granda ombrelo, kovris la tutan insulon. Dum momento li fiksis la ruĝan paperon al la arbotrunko, kaj poste ŝteliris al la lampo. Li malfermis la fenestron de la lampo, kaj blovis en ĝin. La kandelo estingiĝis, kaj en tiu

momento Nemecsek perdis Boka-n el la vido. Sed ankoraŭ liaj okuloj ne al kutimiĝis al la mallumo, kaj jam Boka estis apud li, li ekprenis lian manon:

- Kuru post mi, kiel nur vi povas!

Kaj ili ekkuris al la bordo de la insulo, al la boato.

Kiam Csónakos ekvidis ilin, li saltis en la boaton, etendis la remilon al la bordo, por ke ĉiumomente li estu preta ekiri. La du knaboj saltis en la boaton.

- Ni povas ekiri - spiregis Boka.

Csónakos streĉis la remilon al bordo, sed la boato ne ekiris. Veninte tro impete ili alkuris la bordon, kaj nun la boato duone estis sur la bordo. Iu devis elboatiĝi, por levi kaj elpuŝi ĝin en la akvon. Sed de la maldensejo jam aŭdiĝis voĉoj. La ruĝĉemizuloj revenis el la arsenalo, kaj la lampon ili trovis estingita. Komence ili pensis, ke la vento estingis ĝin, sed kiam Franĉjo Áts

rigardis ĝin, li vidis, ke ĝia fenestreto estas malfermita.

- Iu estis ĉi tie! - li kriegis obtuzite kaj tiom laŭte, ke tion aŭdis ankaŭ la knaboj sidantaj en la boato.

Ili ekbruligis la lampon, kaj tiam ĉiuj rimarkis la okulfrapan ruĝan paperon fiksitan sur la arbo.

- Ĉi tie estis la knaboj de Paŭlo-strato!

La ruĝĉemizuloj interrigardis. Franĉjo Áts ekkriis:

- Do, se ĉi tie estis, ankoraŭ nun ili ĉi tie devas esti! Ni kuru post ili!

Li fajegis. De la ponto venis la gardistoj, kaj raportis, ke tra la ponto neniu povis veni sur la insulon.

- Ili venis per boato - diris la pli juna Pásztor.

Kaj la tri knaboj penantaj pri la boato, terurite aŭdis la laŭtan kriegon al ili rilatantan.

- Ni kuru post ili! – Kaj ĝuste, kiam tiuj ĉi vortoj aŭdiĝis, sukcesis Csónakos puŝi la boaton sur la akvon, kaj mem salti en ĝin. Tuj ili ekprenis la remilojn, kaj tutforte remis al la bordo. Franĉjo Áts kriege donis la ordonojn:

- Wendauer, grimpu sur la arbon, kaj rigardu post ili! Pásztor-oj, kuru al la ponto, kaj de dekstre-maldekstre ĉirkaŭkuru sur la bordo de la lago!

Nun jam ŝajnis, ke ili estas ĉirkaŭfermitaj. Ĝis ili faros, tiujn kvar-kvin embatojn, kiuj portos ilin al la bordo, la rapidkurantaj Pásztoroj ĉirkaŭkuros la lagon, kaj poste nek dekstren nek maldekstren estas eble rifuĝi. Sed eĉ se ili atingos la bordon antaŭ ol la Pásztor-oj, la gardanto sendita sur la arbo observos ilin kaj diros, kien ili rifuĝas. El la boato ili vidis, kiel Franĉjo Áts kun la lampo en la mano kuris tien kaj reen sur la bordo de la insulo. Poste aŭdiĝis bruo de bruoj:

nun trakuris la Pásztor-oj la lignoponton

...

Sed ĝis la gardanto grimpis sur la arbon, ili jam atingis la bordon.

- Nun ili albordiĝas! - kriegis voĉo de la arbo. Kaj tuj ĝin respondis la profunda voĉo de la estro:

- Ĉiu kuru post ili!

Sed la tri Paŭlo-strataj knaboj nun jam kuregis senspire.

- Ni kuregu, por ke ili ne atingu nin - diris Boka kuregante. - Ili estas pli multaj ol ni! Ili kuregis plu, tra vojoj kaj herbejoj, antaŭe Boka, post li la du aliaj

Ili kuris rekte al la vitrodomo.

- Ni kuru en la vitrodomon! - spiregis Boka, kaj ili kuris al la pordeto de la vitrodomo. Feliĉe la pordeto de vitrodomo ne estis fermita. Ili enŝteliĝis kaj kaŝiĝis malantaŭ la grandaj cipresoj. Ekstere regis silento, Versajne la persekutantoj perdis la postsignojn.

La tri junuletoj nun iome ripozis. Ili ĉiriaŭrigardis en la stranga konstruaĵo, kies vitrotegmenton, vitromurojn trapenetrus la malhela lumo de la vespera urbo. Stranga, interesa loko estis tiu vitrodomo. Ili estis ĉe la dekstra flanko kaj trans ĝi estis la meza parto de la konstruaĵo, kaj ĉe la fino estis la maldekstra flanko. De la komenco ĝis la fino en rekta linio staris grandfoliaj, diktrunkaj arboj en grandaj verdaj barelkuvoj. En longaj kestoj adiantoj kaj mimozoj kreskis. Kaj sub la granda kupolo de la meza parto ventumilfoliaj palmoj etendiĝis supren kaj el tropikaj kreskaĵoj vera arbareto staris tie. En la mezo de la arbareto troviĝis orfiŝa bazeno, apud la baseno staris benko.

Ankaŭ estis tie laŭroj oranĝarboj, grandegaj adiantoj. La kreskaĵoj estis fortaj kaj sufokigaj, kiuj per spicodoro plenigis la aeron. Kaj en la vitrohalo, hejtita per vaporo, konstante gutverŝiĝis

la akvo. Ekfrapetadis la gutoj sur la grandaj, dikaj folioj, kaj kiam ek-ekfrapis grandaj palmofolioj, la knaboj imagis vidi ian strangan tropikan beston, kiu tie kuras en tiu varma, malseka arbareto, inter la verdaj barelkuvoj. Ili sentis sin en sendanĝera loko kaj ekmeditis, kiam ili liberiĝos de tie.

– Nur oni ne ŝlosu la pordon de la vitrodomo – flustris Nemecsek, kiu lace sidis ĉe la trunko de granda palmo, kaj kiun tre kontentigis la hejtita ejo, ĉar li estis malseka ĝis la haŭto.

Boka trankviligis lin:

– Se oni ĝis nun ne ŝlosis ĝin, poste certe oni ne faros tion.

Do ili sidadis kaj aŭskultadis. Nenia voĉo aŭdiĝis. Neniu pensis pri tio, ke oni serĉu ilin ĉi tie. Poste ili stariĝis, kaj komencis palpe pasadi inter la altaj bretoj, kiuj estis plenplenaj de verdaj arbetoj, bonodoraj herboj, grandaj

floroj. . . . Csónakos puŝiĝis al iu beto kaj ŝanceliĝis. Nemecsek volis esti servema.

– Atendu – li diris –, mi faros lumon.

Kaj antaŭ ol Boka povis lin malhelpi, li elpoŝigis alumeton, kaj ekbruligis ĝin. La alumeto ekflamis, sed en la sekvonta minuto ĝi jam estingiĝis, ĉar Boka batis ĝin el la mano de la blonduleto.

– Simio! – li diris kolere al li. – Ĉu vi forgesas, ke vi estas en vitrodomo! La muroj de ĉi tiu domo ja ankaŭ estas el vitro . . . certe ili ekvidis la lumon!

Ili haltis kaj aŭskultadis. Vere, Boka pravis. La ruĝĉemizuloj rimarkis la eklumon, kiu dum momento lumigis la tutan vitrodomon. Kaj en la sekvinta momento jam aŭdiĝis iliaj krakantaj paŝoj sur la ŝtonetoj. Ankaŭ ili kuris al la pordo de la maldekstra flanko. Ili aŭdis, kiel Franĉjo Áts denove kriegis:

– Pásztor-oj tra la dekstra pordeto – li kriis –. Szebenics tra la meza pordo, kaj ni tra ĉi tie!

La knaboj de la Paŭlo-strato dum momento kaŝis sin. Csónakos ventre kuŝis sur breto. Kaj Nemecsek-on pro tiu motivo, ke li jam estas malseka, oni irigis en la orfiŝan basenon. La blonduleto ĝismentone kuŝis en la akvo, kaj sian kapon li kaŝis sub granda adiant-folio. Boka nur havis jam tempon, por kaŝiĝi malantaŭ la malfermita pordo.

Kaj Franĉjo Áts kun sia sekvantaro enmarŝis tra la pordo, kun lampo en sia mano. La lumo de la lampo tiel lumigis la vitropordon, ke Boka povis vidi Franĉjon Áts, sed ĉi tiu ne povis vidi Boka-n kaŝiĝintan malantaŭ la pordo. Kaj Boka bone observis la estron de la ruĝĉemizuloj, kiun nur unufoje li vidis el proksimo en la muzeoĝardeno. Bela knabo estis Franĉjo Áts kaj nun brilis

liaj okuloj pro la militavido. Sed tuj li malaperis de antaŭ li. Kun la aliaj li transiris la vojojn, kaj en la dekstra flanko ili rigardis eĉ sub la bretojn. Neniu pensis pri tio, ke ili serĉu en la baseno, kaj Csónakos nur tiel saviĝis de la malkaŝo, kiam sub lian breton oni volis rigardi, ke tiu knabo, kiun Franĉjo Áts nomis Szebenics, diris la jenon:

– Ili antaŭ longe eliris tra la pordo de la dekstra flanko . . .

Kaj ĉar la fervora serĉado li ekiris al tiu direkto, ankaŭ la aliaj iris post li. Ili kuregis tra la vitrodomo, kaj kelkaj obtuzaj sonoj pruvis, ke ankaŭ ili ne tre indulgis la florujojn. Poste ili elliris, kaj denove iĝis silento. Csónakos malkaŝis sin la unua.

– Paĉjo – li diris –, florujo falis sur mian kapon. Mi estas plena de tero . . .

Kaj fervore li elŝprucadis la teron, per kio estas plenaj buŝo kaj oreloj.

Nemeček, la dua, kvazaŭ akvomonstro rampis el la baseno. De sur la kompatindulo denove fluis la akvo, kaj kiel kutime li plendis plorvoĉe:

– Ĉu dum mia tuta vivo mi devas esti en akvo? Kio mi estas? Ĉu rano?

Li skuis sin, kvazaŭ hundo surverŝita per akvo.

– Ne ploradu – diris Boka al li. – Kaj nun ni ekiru, por ke jam finiĝu tiu ĉi vespero . . .

Nemecsek ekĝemis:

– Vere mi jam dezirus esti hejme!

Kaj li ekmemoris, kiel oni akceptos lin hejme, se oni vidos lian malsekan vestaĵon. Do li korektis, kion li diris:

– Tamen mi ne tre dezirus esti hejme.

Ili rekuris al la rubinujo, kie ili transgrimpis la ŝanceliĝintan palisaron. Post kelkaj minutoj ili atingis ĝin. Csónakos grimpis sur la arbon, sed antaŭ la momento kiam li surpaŝis la

supron de la palisaro, tiam li rerigardis al la ĝardeno. Ektiminte li diris:

– Ili venas tie!

– Reen sur la arbon! – diris Boka.

Csónakos regrimpis sur la arbon, kaj helpis apud sin siajn du kunulojn. Ili grimpis tiom alten, kiom la branĉo nur povis teni ilin. Kolerigis ilin la penso, ke nun ili estus kaptitaj, kiam ili jam preskaŭ rifuĝis.

La trupo de la ruĝĉemizuloj brue alvenis sub la arbon. Supre la knaboj mute kaŭris inter la densa foliaro, kvazaŭ tri grandaj birdoj. . .

Denove tiu Szebenics ekparolis, kiu ankaŭ en la vitrodomo erarigis la trupon:

– Mi vidis, kiam ili transsaltis la palisaron.

Ŝajnis, ke tiu Szebenics estis la plej malsaĝa el ili. Kaj ĉar ĉiam la plej malsaĝa estas la plej kriema, do li ĉiam kriis. La ruĝĉemizuloj, kiuj estis lertaj

gimnastikantoj, dum momento transsaltis la palisaron. Per tiu sama robinio li surgrimpis la palisaron, Franĉjo Áts restis la lasta, kaj kiam li transgrimpis la palisaron, li estingis la lampon. Per tiu sama akcio li surgrimpis la palisaron, sur kies supro nestis la tri birdoj. Eĉ de Nemecsek, kiu ankoraŭ estis malseka, falis kelkaj dikaj gutoj sur lian kolon.

– Pluvas – kriirs Franĉjo Áts: li viŝis sian kolon, kaj poste saltis sur la straton.

– Tie ili iras – sonis de la strato, kaj ĉiuj ekkuris, por signi, ke Szebenics denove eraris. Boka faris eĉ rimarkon:

– Se tiu ĉi Szebenics ne ekzistus, jam antaŭ longe ni estus kaptitaj . . .

Nun jam ili sentis, ke ili certe rifuĝis de la ruĝĉemizuloj. Ili vidis, kiel tiuj kuras post du knaboj, kiuj pace promenis en la malgranda strato. La du knaboj ektimis ilin kaj ekkuris. Estiĝis

granda kriego, kaj la ruĝĉemizuloj sovaĝe kuregis post ilin. La bruo formortis en iu malgranda strato de la Jozefo-distrikto.

Ili grimpis desur la palisaro, kaj ekspiris, kiam ili denove sentis la stratan pavimon sub siaj piedoj. Maljunulino trotpaŝadis en la strato, poste venis aliaj preterirantoj. Ili sentis, ke ili denove troviĝas en la urbo, kaj ĉi tie povas okazi nenio malbona al ili. Ili estis lacaj, malsataj. En la proksima orfejo, kies fenestroj amike lumis en la malhela nokto, oni sonorigis por vespermanĝo.

Nemecsek frostotremis.

— Ni rapidu hejmen — li diris.

— Atendu — diris Boka —, iru hejmen per ĉeval-tramo. Jen mi donas monon.

Li ŝovis sian manon en la poŝon, sed liaj manoj rigidiĝis. La prezidanto havis nur tri krejcerojn. Krom la tri krejceroj kaj la delikata inkujo, el kiu gaje fluis la

blua inko, nenio troviĝis en lia poŝo. Li elprenis la tri krejcerojn inkmakulitajn, kaj donis ilin al Nemecsek.

– Nur tion mi havas.

Ankaŭ Csónakos havis unu. Kaj feliĉe ankaŭ blonduleto havis unu. Entute estis ses krejceroj. Kaj li sidiĝis sur ĉeval-trama veturilo.

Boka haltis sur la strato. Ankoraŭ lia koro estis plena per la afero de Geréb. Li staris malĝoje kaj silente. Sed Csónakos ankoraŭ sciis nenion pri la afero, do li estis gaja.

– Atentu, paĉjo! – li diris, kaj kiam Boka alrigardis lin, li enbuŝigis du fingrojn, kaj fajfis surdige. Kiel nur li povis. Poste li ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ per tiu fajfo li satiĝis.

– Dum la tuta vespero mi retenis ĝin – li diris gaje –, sed nun ĝi jam volis nepre veni el mi, paĉjo!

Li brakplektis al Boka, kaj post tiom da
ekscito ili lace ektrotis sur la longa
Ŭllóli strato . . .

(KVARA PARTO)

14. MALKAŜO DE LA MASTIKO-KLUBO

En la lernoĉambro la horloĝo denove batis la unuan, kaj la knaboj prenis siajn librojn. Sinjoro Profesoro Rácz fermis la libron, kaj stariĝis sur la katedro. La servema Csengey, la unua de la unua benko, saltis al la prpfesoro, kaj helpis al li surmeti la surtuton. La Paŭlo-stratuloj el la diversaj benkoj interrigardis, atendente la ordonojn de Boka. Ili sciis, ke hodiaŭ posttagmeze okazos kunveno sur la grundo, ĉar la trimembra esplortrupo raportos pri la botanik-ĝardeno travivaĵo. Ĉiu sciis, ke ili sukcesis en la ekskurso, kaj la prezidanto de la Paŭlo-strato kuraĝe redonis la viziton al la ruĝĉemizuloj. Sed ili estis scivolaj pri la detaloj, pri la aventuroj, pri la danĝeroj, kiujn travivis la knaboj. El Boka eĉ per najlo-tirilo oni

ne povis elpreni vorton. Csónakos parolis ĉion miksite, kaj, Dio pardonu lin, multe li mensogis. Li parolis eĉ pri sovaĝaj bestoj, kiujn ili renkontis inter la fortikaĵoj de la botanik-ĝardeno . . . Ke la ruĝĉemizuloj sidis malantaŭ terura ŝtuparo . . . Sed li parolis ĉion intermiksite, kaj ĝuste la gravajn aferojn li forgesis. Kaj estis neeble finaŭskultian parolon, ĉar li preskaŭ surdigis la aŭskultantojn per la konstantaj fajfoj.

Kaj Nemecsek sentis sian rolon tiom grava, ke tre serioze li protestis. Se oni demandis lin, li respondis:

– Nenion mi povas diri.

Aŭ li diris: – Demandu al la sinjoro prezidanto.

La aliaj tre enviis pri Nemecsek, kiu, senrangulo, povis partopreni tiom belan aventuron. La leŭtenantoj kaj ĉefleŭtenantoj sentis, ke per tio ili malgraviĝas, apud la senrangulo, eĉ

estis kelkaj, kiuj jam disvastigis la famon, ke la blonduleton certe oni rangaltigos al oficiro, kaj tiam neniam senrangulo plu restos sur la grundo, krom Hektor, la nigra hundo de la sovako . . .

Antaŭ ol sinjoro profesoro Rácz eliris la klason, Boka levis siajn du fingrojn por la Paŭlo-stratanoj, por signi, ke je la dua okazos la renkonto. La aliaj knaboj, kiuj ne apartenis al la Paŭlo-stratanoj, tre enviis ilin, kiam post la signo de Boka ĉiuj salutis, per tio montrante, ke ili sciiĝis pri la signo de la prezidanto.

Kaj ili volis jam ekiri, kiam okazis io.

Sinjoro profesoro Rácz haltis sur la ŝtupo de la katedro.

— Atentu — li diris.

La sinjoro profesoro elpoŝigis paperpeceton. Li surmetis la okulvitrojn kaj el la papereto legis la sekvantajn nomojn:

– Weisz!

– Jen – diris Weisz timige.

La sinjoro profesoro daŭrigis:

– Richter! Csele! Kolnay! Barabás!
Leszik! Nemecsek!

Ĉiu orde respondis:

– Jen!

Sinjoro profesoro Rácz enpoŝigis la papereton, kaj diris: – Vi nun ne iros hejmen, sed venos kun mi en la profesorán ĉambron. Mi havos aferon kun vi.

Kaj li ekiris, ne klarigante la kaŭzon de tiu ĉi stranga invito, li rapide eliris la ĉambregon.

Iĝis grandaj murmurado kaj zumado.

– Kial li vokas nin?

– Kial ni restos ĉi tie?

– Kion oni volas de ni?

Tiel demandis la invititoj unu al la alia. Kaj ĉar ĉiuj estis Paŭlo-stratuloj ili ariĝis ĉirkaŭ Boka.

– Mi ne scias, kio povas esti tio – diris la prezidanto. – Nur eniru, kaj mi atendos vin sur la koridoro.

Kaj li turnis sin al la aliaj:

– Do ne je la dua ni renkontiĝos, sed je la tria. Intervenis malhelpo.

La granda koridoro de la lernejo iĝis homplena. Ankaŭ el la aliaj klasoj elkuris la knaboj, tumulto, rapido, ŝovpaŝado ekregis en la grandfenestra koridoro, kiu alitempe ĉiam estis silenta. Ĉiu rapidis.

– Ĉu vi estas malliberigitaj? – demandis knabo al la malgaja grupo, kiu nigris antaŭ la pordo de la profesora ĉambro.

– Ne – diris Weiss fiere.

La knabo forkuris. Envie ili rigardis post lin. Li jam povas hejmeniri. . . .

Post kelkminuta atendado malfermiĝis la pordo de la profesora ĉambro, kaj malantaŭ la laktovitra pordo aperis la alta, maldika figuro de sinjoro profesoro Rácz.

– Envenu – li diris, kaj iris antaŭe.

La profesora ĉambro estis malplena. Ĉirkaŭ longa, verda tablo stariĝis la knaboj en morta silento. La lasta fermis la pordon estimplene. Sinjoro profesoro Rácz eksidis sur la honoran lokon de la tablo, kaj ĉirkaŭrigardis:

– Ĉu vi ĉiuj ĉeestas?

– Jes.

Malsupre, sur la korto aŭdiĝis la feliĉa bruo de la knaboj rapidantaj hejmen. La sinjoro profesoro fermis la fenestron, kaj nun iĝis timiga silento en la granda biblioteka ĉambro. En morta silento ekparolis sinjoro profesoro Rácz:

– Pri tio temas, ke vi fondis ian klubon. Mi sciiĝis pri tio. Mi aŭdis pri ia

nomata mastiko-klubo. Tiu, per kiu mi sciigis, transdonis al mi ankaŭ la nomaron de la anoj de la klubo. La anoj de la klubo estas vi. Ĉu vere?

Neniu respondis. Ĉiu staris kun klinita kapo, por signi, ke la akuzo estas vera.

La sinjoro profesoro daŭrigis:

– Ni traktu laŭvice. Antaŭ ĉio mi volas scii, kiu fondis la klubon, malgraŭ mia decida deklaro, ke mi permesas la fondon de nenia klubo. Kiu fondis ĝin?

Granda solento.

Timema voĉo ekparolis:

– Weiss.

Sinior profesoro Rácz severe alrigardis Weiss-on:

– Weiss. Ĉu vi mem ne povas anonci vin?

Humile sonis la respondo:

– Jes, mi povas.

– Kiel do vi ne faris tion?

Tion denove ne respondis la kompatinda Weiss. Sinjoro profesoro Rácz ekbruligis cigaredon, kaj la fumon li blovis en la aeron.

– Do ni traktu laŭvice – li diris. – Unue diru al mi, kio estas mastiko?

Anstataŭ respondo Weiss elpoŝigis grandan pecon da mastiko, kaj metis ĝin sur la tablon. Dum iom da tempo li rigardis ĝin, poste tiom mallaŭte, ke apenaŭ oni povis aŭdi, li diris:

– Tio estas mastiko.

– Kaj kio estas tio? – demandis la profesoro.

– Tio estas gluaĵo, per kio la vitraĵistoj fiksas la vitrojn al la fenestro. La vitraĵisto ŝmiras ĝin tien, kaj oni elgratas ĝin per la ungoj.

– Kaj ĉu vi elgratis tion ĉi?

– Ne, mi petas. Tio ĉi estas la kluba mastiko.

La sinjoro profesoro malfermegis la okulojn:

– Kio? – li demandis.

Weiss nun iom kuraĝiĝis:

– Ĉi tion kolektis la anoj – li diris –, kaj la komitato donis al mi, por ke mi gardu ĝin. Ĉar antaŭe ĝin gardis Kolnay, ĉar li estis la kasisto, sed ĝi sekiĝis ĉe li, ĉar li neniam maĉis ĝin.

– Ĉu oni devas ĝin maĉi?

– Jes, ĉar male ĝi malmoliĝas, kaj ne eblas premadi ĝin. Mi maĉis ĝin ĉiutage.

– Kial ĝuste vi?

– Ĉar laŭ la statuto la prezidanto devas maĉi ĝin almenaŭ unufoje ĉiutage, ĉar male malmoliĝas . . .

Kaj jen Weiss ekploris. Li aldiris ploretante:

– Kaj nun mi estas la prezidanto . . .

Serioza estis la humoro. La profesoro kriis severe:

– De kie vi prenis ĉi tiun grandan pecon da mastiko?

Iĝis silento. La profesoro rigardis al Kolnay:

– Kolnay! De kie vi prenis ĝin?

Kolnay respondis rapidege, kvazaŭ volonte per la sincera konfeso helpi sian situacion:

– Ni havas ĝin jam de monato. Mi maĉis ĝin dum semajno, sed tiam ĝi estis malpli granda. La unuan pecon portis Weisz, kaj tial ni fondis la klubon. Li veturis kun sia patro en fiakro, kaj li gratis ĝin el la fenestro. Liaj ungoj fariĝis tute sangaj. Poste la fenestro rompiĝis en la kantoĉambro, kaj postagmeze mi venis ĉi tien, dum la tuta posttagmezo mi atendis, ĝis venis la vitrajisto, kaj mi alparolis lin, ke li donu al mi iom da mastiko, sed li ne povis respondi, ĉar lia buŝego estis plena per mastiko.

La sinjoro profesoro severe sulkigis la frunton:

– Kiajn vortojn vi uzas? Buŝegon havas la ĉevalo.

– Do, lia buŝo estis plena. Poste mi iris al li, kaj petis lin, ke li permesu al mi la rigardon, dum li enmetas la vitron. Kaj li mansignis, ke tion li permesas. Kaj kiam li foriris, mi iris al la fenestro, kaj gratis el ĝi la mastikon, kaj forportis ĝin. Sed mi ŝtelis ĝin ne por mi, sed por la klubo . . . por la . . . klu . . . bo. – Kaj li ekploris.

– Ne ploru – diris profesoro Rác.

Weisz ĉifis la randon de sia jako, kaj en sia embaraso li opiniis necesa la rimarkon:

– Li tuj ploraĉas . . .

Sed Kolnay nur ploradis, li ploradis korŝire. Weisz flustris al li:

– Ne ploraĉu!

Kaj ankaŭ li ekploris. La forta plorado kortuŝis sinjoron profesoron Rácz. Li forte fumadis. Kaj tiam el la vico elpaŝis Csele, fiere li ekstaris antaŭ la profesoro, decidante, ke nun ankaŭ li estos romia karaktero, kiel Boka estis antaŭ kelkaj tagoj sur la grundo. Kun decida tono li diris:

– Mi petas, sinjoro profesoro, ankaŭ mi portis mastikon por la klubo.

– De kie?

– Hejme –diris Csele –, mi rompis la birdobanujon, kaj mia patrino riparigis ĝin, kaj mi tuj elprenis la mastikon. La tuta akvo fluis sur la tapison kiam la birdeto banis sin. Kial bezonas banon tia birdeto? La paseroj neniam banas sin, tamen ili estas puraj.

Sinjoro profesoro Rácz klinis sin antaŭen sur la seĝo. Li diris minace:

– Vi havas bonan humoron Csele, mi zorgos, ke vi perdu ĝin! Daŭrigu, Kolnay!

Kolnay timtremis. Li viŝis sian nazon:

– Kion mi daŭrigu?

– De kie vi prenis la ceterajn mastikojn?

– Tion ja ĵus diris Kolnay. . . . Kaj la klubo foje donis al mi sesdek krajcerojn por ke ankaŭ mi akiru.

Tio jam ne plaĉis al sinjoro profesoro Rácz.

– Ĉu eĉ por mono vi aĉetis ĝin?

– Ne – diris Kolnay. – Sed mia patro estas kuracisto, kaj antaŭtagmeze li veturadas per fiakro, kaj foje li kunportis min, kaj el la fenestro de la fiakro mi elprenis la mastikon, kaj ĝi estis tre bona mastiko, kaj la klubo donis al mi sesdek krejcerojn, ke mi sola sidiĝu en fiakron, kaj mi sidiĝis en ĝin, kaj mi per ĝi veturis ĝis la Oficista

Kolonio, kaj tiam piede mi revenis de la kolonio.

La profesoro rememoris pri tio:

– Ĉu tio okazis, kiam mi renkontis vin ĉe la Ludovika Akademio?

– Jes.

– Kaj mi alparolis vin. . . Sed vi ne respondis.

Kolnay klinis sian kapon, kaj respondis malĝoje: – Ĉar mia buŝego estis plena per mastiko.

Kaj Kolnay denove ekparolis. Weisz denove ekscitiĝis, denove li ĉifis sian jakon, denove li diris en sia embaraso:

– Li tuj ploraĉas . . .

Kaj ankaŭ li ekploris. La sinjoro profesoro promenis en la ĉambro tien kaj reen. Li balancis sian kapon:

– Bela klubo. Kaj kiu estas la prezidanto?

Je tiu demando Weisz subite forgesis sian ĉagrenon. Li ĉesigis la ploradon, kaj diris fiere:

– Mi.

– Kaj kiu estis la kasisto?

– Kolnay.

– Donu la monon, kiu restis.

– Jen.

Kaj Kolnay elpoŝigis sian monon. Ankaŭ lia poŝo ne estis pli malgranda, ol tiu de Csónakos. Li serĉadis en ĝi, kaj laŭvice ĉion metis sur la tablon. Li prenis el ĝi unu florenon kaj kvardek tri krajcerojn, du pecojn da kvinkrajceraj poŝmarkoj, unu fermitan poŝtkarton, du unukronajn dokumentmarkojn, ok novajn plumojn kaj unu kolorigitan vitrokugleton. La sinjoro profesoro kalkulis la monon, kaj poste serioziĝis:

– De kie vi akiris la monon?

– El kotizoj. Ni ĉiuj pagis ĉiusemajne dek krajcerojn.

– Kaj por kio vi bezonis la monon?
– Nur por ke estu pagita la kotizo.
Weisz rifuzis akcepti la prezidantaj
salajron.

– Kiom ĝi estis?
– Kvin krajceroj semajne. Mi alportis
la poŝmarkojn, Barabás la poŝtkarton kaj
Richter la dokumentmarkon. Lia
patro . . . De sia patro li . . .

La profesoro interrompis lin:

– Ĉu li ŝtelis ĝin? Nu? Richter!

Richter stariĝis antaŭen, kaj fermis la
okulojn.

– Ĉu vi ŝtelis ĝin?

Li mute kapsignis, jese. La sinjoro
profesoro balancis sian kapon:

– Kia senmoraleco. Kio estas via
patro?

– D-ro Ernesto Richter publik- kaj
kambi-advokato. Sed la klubo reŝtelis la
markon.

– Kiamaniere?

– Ĉar mi ŝtelis ĝin de mia patro, kaj poste mi timis, kaj la klubo donis al mi unu kronon, kaj mi aĉetis alian markon, kaj mi reŝtelis ĝin en la skribo-tablon. Kaj paĉjo min surprizis, ne kiam mi ŝtelis, sed kiam mi reŝtelis ĝin. Kaj li tradraŝis mian kolon . . .

Kaj pro la severa rigardo de la profesoro li korektis:

– Li batis kaj krom tio ankaŭ vangofrapis min, ĉar mi remetis ĝin, kaj li demandis, kie mi ŝtelis ĝin, kaj mi ne volis diri tion, ĉar denove li estus min frapinta, do mi diris, ke mi ricevis ĝin de Kolnay, kaj tiam li diris: „Tuj redonu al Kolnay, certe li ŝtelis ĝin.” kaj mi reportis ĝin al Kolnay, kaj tial nun havas la klubo du markojn.

Sinjoro profesoro Rácz enpensiĝis:

– Sed kial vi aĉetis novan markon, vi ja estus povinta remeti la malnovan”

– Tio jam ne povis esti – anstataŭ li respondis Kolnay –, ĉar sur ĝia dorsa flanko estis la stampo de la klubo.

– Ĉu ankaŭ stampilon vi havas? Kie estas la stampilo?

– Barabás estas la stampilgardanto.

*

15. LA MASTIKO-KLUBO PLU VIVOS

Nun Barabás havis la vicon. Nun li paŝis antaŭen. Mortige li rigardis al Kolnay, de kiu vi havis ĉiam malagrablaĵon. Ankoraŭ estis memorata la ĉapela afero sur la grundo. . . . Sed nenion alian li povis fari, do li metis la stampilon sur la verdan profesoran tablon, kun la al ĝi apartenanta inkokusena ladskatolo. La profesoro rigardis la stampilon. Estis skribite sur ĝi: Mastikon Kolektanta Klubo, Budapeŝto, 1889. Profesoro Rácz sufokis en si la rideton, kaj denove balancadis la kapon. Pro tio kuraĝiĝis Barabás. Li etendis la manon al la tablo, kaj volis repreni la stampilon. Sed sinjoro profesoro Rácz metis sian manon sur ĝin.

— Kion vi volas?

– Mi petas – diris Barabás –, mi ĵuris, ke eĉ per mia vivo mi defendas la stampilon, sed el la mano mi ne fordonos ĝin.

La sinjoro profesoro enpoŝigis la stampilon.

– Silentu! - li diris. Sed Barabás jam ne restis trankvila:

– Tiam - li diris -, ankaŭ de Csele bonvolu forpreni la standardon.

– Ĉu ankaŭ standardon vi havas? Donu ĝin - diris la profesoro turnante sin al Csele. Csele metis la monon en sian poŝon, kaj tiris el ĝi malgrandan standardon kun drata tenilo. Ankaŭ ĝin faris lia fratino, kiel la standardon de la grundo. Ĝenerale la kudraĵojn faris la fratino de Csele. Sed tiu ĉi standardo estis ruĝblankverda, kaj estis surskribite: Mastikon Kolektanta Klubo, Budapeŝto, 1889. Ni ĵuras, ke sklafoj ni ne restos plu.

– Hm - diris la sinjoro profesoro -, kiu estis tiu bela birdo, kiu la sklavon skribis per fo? Kiu skribis tion?

Neniu respondis. La sinjoro profesoro obtuzvoĉe ripetis la demandon:

–Kiu skribis tion?

Tiam Csele ekpensis ion. Li pensis, kial dronigi la knabojn en malagrablajon? La sklavon skribis Barabás per fo, sed kial suferi Barabás? Do humile li diris:

– Mi petas, tion skribis mia fratino.

Kaj li glutegis. Li ne agis honeste, sed per tio li savis sian kamaradon. . . . La profesoro ne respondis. Kaj nun la knaboj komencis interparoli.

– Mi petas, de Barabás ne estis bele, ke li perfidis la standardon – kolere faris rimarkon Kolnay.

Barabás senkulpigis sin:

– Ĉiam li akuzas min. Se oni jam forprenis la stampilon de mi, la klubo ja pereis.

– Silentu! – interrompis sinjoro profesoro Rácz la disputon.- Mi zorgos pri via afero. Jen, la klubo estas disigita, kaj plu mi ne aŭdu, ke vi miksas vin en tiaj aferojn. El la konduto vi havos duagradan klasifikon, kaj Weisz triagradan, ĉar li estis la prezidanto.

– Pardonon! – modeste faris rimarkon Weisz – ĝuste hodiaŭ mi estis lastfoje la prezidanto, ĉar hodiaŭ okazus la ĝeneralkunsido, kaj ni jam kandidatigis aliulon por tiu ĉi monato.

– Ni kandidatigis Kolnay-n – diris Barabás rikane.

– Al mi estas egale - diris la profesoro.
– Morgaŭ vi ĉiuj estos malliberigitaj ĝis la dua. Mi zorgos pri viaj aferoj. Kaj nun vi povas foriri.

– Bonan tagon – audiĝis koruse, kaj ĉiuj ekmoviĝis. Tiun tumulton Weisz volis eluzi, li intencis forpreni la mastikon. La profesoro rimarkis tion:

– Ĉu vi ne lasas ĝin?

– Weisz faris humilan mienon:

– Ĉu la mastikon ni ne rericevos?

– Ne. Eĉ se iu ankoraŭ havas, tuj donu ĝin, ĉar se mi ekscios, ke ĉe iu ankoraŭ restis, kontraŭ tiu plej severe mi procedos.

Kaj tiam antŭenpaŝis Leszik, kiu ĝis nun silentis kvazaŭ karmo. Li prenis el sia buŝo pecon da mastiko, kaj algluis ĝin al la kluba mastiko, kun dolora koro kaj malpuraj manoj.

– Ĉu vi ne havas pli multe?

Anstataŭ respondo Leszik malfermis sian buŝon. Li montris, ke li ne havas pli. La profesoro prenis sian ĉapelon.

– Kaj neniam ankoraŭ mi aŭdu, ke vi fondis klubon! Iru hejmen.

La knaboj silente elŝteliris, nur unu salutis mallaŭte:

– Bonan tagon – diris aparte Leszik, ĉar antaŭe, kiam la aliaj salutis, lia buŝo estis plena.

La sinjoro profesoro foriris, kaj la disigita mastiko-klubo restis sola. Malgaje rigardis la knaboj unuj la aliajn. Kolnay rakontis al la atendanta Boka la historion de la esplordemandado. Boka ekspiris.

– Mi tre ektimis - diris -, ĉar mi jam kredis, ke iu perfidis la grundon. . . .

Dume Nemecsek iris al la grupo, kaj flustre diris:

– Riardu . . . dum li pridemandis vin . . . mi staris ĉe la fenestro . . . kaj . . .

Li montris la freŝan mastikon, kiun li gratis el la fenestro. La aliaj pie rigardis ĝin. La okuloj de Weisz ekbrilis:

– Do, se ni havas mastikon, ni havas ankaŭ klubon. Sur la grundon ni okazigos la ĝeneralkunsidon.

– Sur la grundo! Sur la grundo! – kriis ankaŭ la aliaj. Kaj ĉiuj ekkuris hejmen. La ŝtuparo eĥis ilian kriadon, dum ili krieis la signalon de la Paŭlo-stratanoj:

– Haho! Ho! Haho! Ho!

Kaj ĉiuj elkuris tra la pordego. Boka iris sola, malrapide. Li ne havis bonan humoron. Li meditis pri Geréb, pri la perfida Geréb, kiu portis la lampon sur la botanikĝardena insulo. Enpense li iris hejmen, tagmanĝis, kaj komencis lerni la morgaŭan latinan lecionon.

Dio scias, kiel tion aranĝis tiom rapide la anoj de la mastikoklubo, sed je la duono post la dua ili jam aperis sur la grundo. Barabás venis rekte de la tagmanĝo, li ankoraŭ maĉadis grandan pecon da pankrusto. Ĉe la pordego li atendis Kolnay-n, por ke li povu bati

lian kapon. Jam multo ŝarĝis la konton de Kolnay.

Kiam ĉiuj alvenis, Weisz vokis ilin inter la sterojn. – Mi malfermas la ĝeneralkunsidon – li diris tre serioze. Kolnay, kiu jam ricevis, eĉ redonis al Barabás la baton sur la kapon, havis tiun opinion, ke spite al la profesora malpermeso oni devas funkciigi la klubon. Sed Barabás prisuspektis lin:

– Tial li diras, ĉar nun estas via vico iĝi prezidanto. Sed mi diras, ke jam sufiĉas la mastikoklubo. Vi ĉiuj estas prezidantoj, kaj ni vane maĉadas la mastikon. Ĝi jam naŭzas min. Ĉu jam nenio alia estas en mia buŝo, nur konstante tiu gluaĵo?

Nun Nemecsek volis paroli.

– Mi petas parolon – li diris al la prezidanto.

– La sinjoro sekretario petas parolon - seroze diris Weisz, kaj li sonorigos per

dukrejcera sonorileto.

16. LA PERFIDULO KAŜIRAS

Sed en Nemecsek, kiu en la mastikoklubo havis sekretarian funkcion, frostigis la vorto. Li ekvidis Geréb-on malantaŭ stero. Neniu sciis pri Geréb, kion li sciis, kion ankaŭ li vidis kun Boka dum tiu memorinda vespero. Geréb sola ŝteliris inter la steroj, kaj kuris rekte al la kabano, en kiu loĝis la slovako kun la hundo. Nemecsek sentis, ke li devas observi la perfidulon, kaj atenti ĉiun lian paŝon. Boka diris, ke ĝis li venos, oni ne sciigu al Geréb, ke oni vidis lin, sidanta kun la ruĝĉemizuloj ĉirkaŭ la lampo sur la insulo. Li kredu, ke neniu scias la aferon.

Sed nun li estas ĉi tie, ŝteliradas ĉi tie. Nemecsek ĉiamaniere volis scii, kial li iras al la slovako. Do li ekparolis:

— Mi dankas, sinjoro prezidanto, sed mian parolon mi diros alifoje. Mi

ekmemoris, ke mi havas aferon.

Weisz denove ekskuis la sonorileton:

– La sinjoro sekretario prokrastas sian parolon. Sed la sinjoro sekretario jam kuris. Li kuris, sed ne post Geréb-on, sed renkonte lin. Li trakuris la malplenan grundon, kaj eniris la Paŭlostraton. Tie li deflankis en la Mariastraton, kaj senspire kuregis al la portego de la vaporegilejo. Preskaŭ dispremis lin granda lignoporta veturilo, kiu tiam ruliĝis brue-skue tra la pordego. La ferkamentubo kraĉadis, ŝpruĉadis la blankan vaporon. La vaporegilo dolore bruis en la domo, kvazaŭ ĝi dirus:

– Ateeeeeentu! Ateeeeeentu!

– Certe mi atentis! - kurante respondis al ĝi Nemecsek, kaj preterpaŝante la dometon, li kuris inter la steroj kaj de tie rekte al la kabano de la slovako. La tegmento de la kabano estis dekliva, kaj

ĝi preskaŭ tuŝis tion steron, kiu estis malantaŭ la kabano. Nemecsek grimpis sur la steron, kaj kuŝiĝis ventre sur ĝi. De la flanko li rigardis kaj atendis, kio okazos nun? Kion volas Geréb de la slovako? Li decidis, ke li subaŭskultos ilian parolon, kiu ajn okazu al li. Ho kian gloron ĉi tio alportos! Kiel fiero li estos, ĉar li malkovris tiun novan perfidon!

Dum li atendis, rigardadis, subite li rimarkis Geréb-on. Geréb malrapide, singarde proksimiĝis al la kabano, kaj konstante rigardis timante, ke iu sekvas lin. Kaj nur post la momento kiam li konvinkiĝis, ke neniu venas post li, tiam kuraĝe li plu iris la vojon. La slovako trankvile sidis sur la benko antaŭ la kabano, kaj pipfumis tiujn cigarfinojn, kiujn la knaboj portis al li. Ĉar por Jano ĉiuj kolektis la cigarfinojn.

Apud li saltlevis la hundo. Kelkfoje ĝi ekbojis al Geréb, sed kiam li ekkonis, ke

li apartenas al ĉi tieaj knaboj, ĝi rekuŝiĝis. Geréb iris tute proksime al Jano, tiel, ke la tegmento tute kaŝis ilin. Sed nun jam kuraĝiĝis la blonduleto. Mallaŭte, tiom mallaute, kiom li nur povis, li transgrimpis de la stero sur la tegmenton de la kabano. Ankaŭ sur la tegmento li ekuŝis ventre, kaj tiele li rampis antaŭen, supren, por ke anataŭe, super la pordo li eligu sian kapon, kaj rigardu ilin. Kelkfoje la tabuloj ekkrakis, kaj tiam Nemecsek sentis, ke en liaj vejnoj haltis la sango. . . . Sed li grimpis plu, singarde antaŭenŝovis sian kapon, kaj se en tiu momento la slovako kaj Geréb rigardus supren, vere ili timigus, vidante ĉe la rando de la tabuloj la saĝan, etan, blondan kapon de Nemecsek, dum per larĝe malfermitaj okuloj li atentis tiujn aferojn, kiuj okazas antaŭ la kabano.

Geréb alpaŝis la slvakon, kaj afable diris al li:

– Bonan tagon, Janó!

– Bonan tagon – respondis la slovako,
kaj eĉ la pilpon li ne elbuŝigis.

Geréb kliniĝis proksime al li:

– Cigaron mi portis, Janó!

Nun la slovako jam elbuŝigis la pipon.
Ekbrilis la okuloj. Kompatinda Janó, en
sia vivo malofte li havis la feliĉon, vidi
tutan cigaron. Li nur povis ĝin akiri,
kiam iu jam konsumis ĝian
kvintesencon.

Geréb elpoŝigis tri cigarojn, kaj metis
ilin en la manon de Janó.

– Hej – pensis en si Nemecsek –, kiom
bone, ke mi grimpis ĉi tien. Li certe ion
volas de la slovako, se li komenciĝas per
cigaroj!

Kaj li aŭdis, ke Geréb mallaŭte diras al
slovako:

– Janó, venu kun mi en la kabanon . . .
ĉi tie ekstere mi ne volas paroli kun vi . .
. mi ne volas, ke oni vidu min . . . temas

pri grava afero. Kaj vi povas de mi ricevi ankoraŭ multajn cigarojn!

Kaj li elpoŝigis manplenon da cigaroj. Nemecsek balancadis sian kapon sur la tegmento.

– Tio devas esti granda malicaĵo – li pensis –, se li portis tiom multe da cigaroj!

Kompreneble la slovako ĝoje iris en la kabanon, kaj Geréb post li. Post Geréb ankaŭ la hundo enŝtelis sin. Nemecsek ĉagreniĝis.

– Nenion mi aŭdos de tio, kion ili parolos – li pensis –, mi malsukcesis pri mia bone elpensita plano . . .

Kaj li enviegis la hundon, kiu povis enŝteli sin antaŭ ol ili fermis la pordon. Ĉar eĉ la pordon ili fermis. Nemecsek rememoris pri tiu fabelo en kiu la Fernaza Sorĉistino ŝanĝas la reĝidon je hundo, kaj nun vere volonte li donus dek-dudek vitrokugletojn por tio, se iu

sorĉistino por kelkaj minutoj ŝanĝus lin en nigra hundo, kaj anstataŭ li el Hektor ŝi farus la blondan Nenecsek. Sed anstataŭ la Fernaza Sorĉistino venis por helpi lin skarabo. Kompatinda anobio, kiu iam elmordis unu tabulon, kaj kun sia tuta familio satiĝis per la bona mola ligno, ne konjektante, ke iam ĝi faros granban servon per tio al la knaboj de Paŭlo-strato. Kie la anobilo mordis la tabulon, tie ĝi estis pli maldika, Nemecsek klinis sian oreilon sur la tabulon, kaj aŭskultis. Obtuzaj voĉoj venis el la kabano, kaj baldaŭ ĝoje spertis, ke li klare aŭdas ĉiun vorton, kiun ili parolas interne. Geréb parolis mallaŭte, kvazaŭ en ĉi tiu soleca loko li timus, ke iu aŭdas, kion li diras. Li diris al la slovako:

– Janó, estu prudenta. Vi ricevos de mi tiom da cigaroj, kiom vi volas. Sed kontraŭ tio vi devos fari ion.

Janó murmure demandis:

– Kion mi devos fari?

– Nur la knabojn vi devos forpeli de la grundo. Ne permesu, ke ili ludu ĉi tie, ke ili disportu la sterojn.

Nun, dum kelkaj minutoj nenio aŭdiĝis. El tio Nemecsek kalkulis, ke la slovako meditas. Poste denove aŭdiĝis la voĉo de slovako:

– Ĉu mi devos elpeli ilin?

– Jes.

– Pro kio?

– Ĉar aliaj knaboj volas iri ĉi tien. Tiuj aliaj estas ĉiuj riĉaj knaboj . . . tiom da cigaroj vi havos, kiom vi nur volas . . . ankaŭ monon vi ricevos . . .

Tio efikis.

– Ĉu ankaŭ mi monon ricevos? – demandis Janó.

– Jes. Vi ricevos florenojn . . .

La floreno tute subaĉetis la slovakon.

– Estas en ordo.– li diris – Mi elpelos ilin.

Grincis la anso, knaris la pordo. Geréb elpaŝis la kabanon. Sed tiam Nemecsek jam ne estis sur la tegmento. Lerte kvazaŭ kato li grimpis malsupren, desaltis, kaj kuregis inter la steroj reen, al la grundo. Tre ekscitita estis la blonduleto, kaj li sentis, ke en ĉi tiu momento la sorto de ĉiu knabo, la estonteco de la tuta grundo estas en lia mano. Kiam la trupon li ekvidis, jam de malproksime li kriis:

– Boka!

Sed neniuj respondis.

Li kriis denove:

– Boka! Sinjoro prezidanto!

Iu voĉo respondis:

– Li ankoraŭ ne estas ĉi tie!

Nemecsek kuregis kvazaŭ uragano. Ĉi tiun aferon li tuj devas sciigi al Boka. Tuj li devas agi, antaŭ, ol oni elpelas ilin

el la regno. Kiam li preterkuris la lastan steron, li ekvidis la anojn de la mastikoklubo, kiuj ankoraŭ kunsidis. Weisz ankoraŭ prezidis kun serioza mieno, kaj kiam la blonduleto preterkuregis la kunsidon, li alkriis lin:

– Haho! Ho! Sinjoro sekretario.

Nemecsek kurante signis, ke li ne haltos.

17. NEMECSEK, LA MALKURAĜA PERFIDULO

– Sinjoro sekretario! – kriis post lin Weisz, kaj por ke pli granda estu la aŭtoritato, forte li skuis la prezidanton-sonorilon.

– Mi ne havas tempon! – rekriis Nemecsek, kaj kuris, por serĉi Boka-n en lia loĝejo. Kaj tiam Weisz provis la lastan rimedon:

– Senrangulo! Haltu!

Al tio li devis halti, ja Weisz estis leŭtenanto. . . .

La blonduleto furiozis pro kolero, sed li devis obei, ĉar Weisz uzis sian rangon.

– Kion vi volas, sinjoro leŭtenanto?

Kaj li kunfrapis la kalkanojn.

– Mi petas – diris la prezidanto de la mastiko-klubo –, ĵus ni deklaris, ke la mastiko-klubo, ekde hodiaŭ funkcios

plu, kiel sekreta klubo. Ankaŭ novan prezidanton ni elektis.

La knaboj entuziasme kriis la nomon de la nova prezidanto:

– Vivu Kolnay!

Nur Barabás diris rikane:

– For Kolnay!

Kaj la prezidanto daŭrigis:

– Se vi, sinjoro sekretario volas pli havi vian funkcion, nun vi devas kun ni ĵuri pri via sekreta fideindeco, ĉar se sinjoro profesoro ekscios, ke . . .

En tiu momento Nemecsek ekvidis Geréb-on ŝtelirantan inter la steroj. Se Geréb nun foriros pereos ĉio. . . . Pereos la fortikaĵoj, pereos la grundo. . . . Sed se Boka parolus kun li ĉi tie, eble ankoraŭ li estus konvinkigebla. La blonduleto preskaŭ ekploris pro kolero. Li interrompis la parolon de prezidanto:

– Sinjoro prezidanto , . . . mi ne havas tempon . . . mi devas foriri . . .

Weisz demandis severe:

– Ĉu eble vi timas sinjoro sekretario?
Ĉu eble tion vi timas, sekretario, ke
ankaŭ vi estos punata, se oni ekscios la
aferon?

Sed Nemecsek jam ne atentis lin. Nur
Geréb-on li rigardis, kiu sin kaŝis inter
la steroj atendente, ke la knaboj iru en
alian direkton, kaj dume li povu elŝteli
sin en la straton. . . . Kaj kiam li ekvidis
tion, senvorte li forlasis la mastiko-
klubon, kunprenis ĉe la brusto la jakon,
kaj, kvazaŭ ventego, li trakuris la
grundon, kaj la pordegon.

Ekestis granda silento en la kunsido.
Poste en la ega silento ekparolis la
prezidanto:

– La estimataj anoj ĉiuj vidis la
kondueton de Ernesto Nemecsek. Mi
deklaras, ke Ernesto Nemecsek estas
malkuraĝa.

– Jes ja! – kriis la kunvenintaro.

Kolnay eĉ diris:

– Perfidulo!

Richter ekscitite anoncis sin por paroli:

– Mi proponas, ke la malkuraĝan perfidulon, kiu en malfacila situacio forlasis la klubon, kaj skribu en la sekreta protokol-libron, ke li estas perfidulo.

– Vivu! – sonis samtempe el ĉiu gorĝo. Kaj la prezidanto en muta silento deklaris la juĝon:

– La kunsido deklaris Erneston Nemecsek malkuraĝa perfidulo, igas lin abdiki pro la sekretaria funkcio, kaj eksigas lin el la klubo. Sinjoro protokolisto!

– Jen! – diris Leszik.

– Skribu en la protokol-libron, ke la kunsido deklaras Erneston Nemecsek perfidulo, kaj skribu lian nomon per minuskloj.

Murmuro trakuris la kunsidon. Laŭ la statuto tio estas la plej severa puno. Kaj multaj ĉirkaŭstaris Leszik-on, kiu tuj sidiĝis sur la teron, sur siajn genuojn li metis la kvinkrejceran kajeron, kiu estis protokol-libro de la klubo, kaj per egaj primitivaj literoj li enskribis:

ernesto nemecsek estas perfidulo! ! !

Tiel forprenis la mastiko-klubo la honeston de Nemecsek . . .

Kaj Ernesto Nemecsek, aŭ, se oni preferas: ernesto nemecsek kuregis al la Kinizsi-strato kie loĝis Boka en modesta, partera domo. Li enkuris la pordegon, kaj tie li rekte kuris al Boka.

— Ho, ho — diris Boka, post kiam li rekonsciiĝis el la surprizo. — Kion vi serĉas ĉi tie?

Nemecsek spiregante rakontis siajn spertojn, kaj ĉe la jako lli tiris Boka-n, ke ili rapidu. Nun kune ili kuris al la grundo.

– Ĉu ĉiun ĉi vi aŭdis, vidis? – demandis kurante Boka.

– Mi aŭdis, ankaŭ vidis.

– Kaj ĉu Geréb ankoraŭ estas tie?

– Se ni rapidos, ankoraŭ ni trovos lin tie.

Apud la kliniko ili devis halti. Kompatinda Nemecsek komencis tisadi. Li apogis sin al la muro:

– Vi nur . . . – li diris –, vi nur rapidu tien . . . mi . . . ankoraŭ iom tusados.

Kaj forte li tusadis.

– Mi estas malvarmuminta – li diris al Boka, kiu ne foriris de li. – En la botanikĝardeno mi malvarmumis. . . . Kiam mi falis en la lagon, tio ankoraŭ ne malutilis. Sed en la vitrodomo, kiam

la baseno mi kaŭradis, tie estis tre malvarma la akvo. Tie mi frostotremis.

Ili flankiĝis en la Paŭlo-straton. Kaj ĝuste tiam, kiam ili enflankiĝis ĉe la angulo, malfermiĝis la pordeto de la palisaro. Nemecsek forte ekpremis Boka-n:

– Tie li estas!

Boka faris funelon el siaj manoj, kaj kriis per akra voĉo tra la silenta strateto:

– Geréb!

Geréb haltis kaj rerigardis. Kiam li ekvidis Boka-n, li ekridegis. Kaj ridante li forkuris de ili, al la bulvardo. Inter la domoj de Paŭlo-strato akre sonis la sarkasma ridado. Geréb priridis ilin.

La du knaboj staris tie sur stratangulo, kvazaŭ ili estus alnajlitaj. Geréb malaperis el ilia vido. Ili sentis, ke ĉio pereis. Eĉ unu vorton ili ne diris unu al la alia, silente paŝadis gaja bruo de la pilkludantaj knaboj, kaj poste laŭta

kriado. La mastiko-klubo akلامis la novan prezidanton... Interne ankoraŭ neniu sciis, ke tiu malglata tero, tiu ebenaĵo premita inter du domojn, kiu en iliaj knabaj animoj signifis la senfinecon, la liberon, kiu antaŭtagmeze estis amerika stepo, posttagmeze hungara ebenaĵo, dum pluvado maro, vintre norda poluso, mallonge ĝi estis ilia amiko, kaj ĉiam ĝi ŝanĝiĝis al tio, kion ili volis, nur por amuzi ilin.

– Vidu – diris Nemecsek –, ili ankoraŭ ne scias tion –, li ripetis mallaŭte.

Nemecsek fidis la kapon de Boka. Li ne perdis sian esperon, dum li vidis la saĝan, trankvilan amikon. Nur tiam li ektimis vere, kiam li ekvidis la unuajn larmojn en la okuloj de Boka, kaj aŭdis, ke la prezidanto, eĉ la prezidanto, kun profunda malĝojo kaj per tremanta voĉo diris:

– Do, nun kion fari?

(KVINA PARTO)

18. NEMECSEK DENOVE SUR LA INSULO

Du tagojn poste, ĵaŭdon, kiam la botanik-ĝardenon kovris la vespero, la du gardantoj starantaj sur la ponteto kunfrapis la kalkanojn pro la proksimiĝo de malhela figuro.

– Salutu! – kriis unu el ili.

Kaj ili ambaŭ levis sian arĝentpintan lancon, sur kiuj ekbrilis la hela luno. La saluto estis adresita al Franĉjo Áts, la estro de la ruĝĉemizuloj, kiu rapide iris tra la ponto.

– Ĉu ĉiuj estas tie? – li demandis la gardantojn.

– Jes, sinjoro kapitano.

– Ĉu ankaŭ Geréb estas tie ĉi?

– Li estis la unua, sinjoro kapitano.

La estro mute salutis. La gardantoj denove levis la lancojn super siajn kapojn. Tio estis la militsaluto de la ruĝĉemizuloj

Sur la malgranda maldensejo de insulo ĉiuj ruĝĉemizuloj jam kolektiĝis. Kiam Áts paŝis inter ilin, la pli aĝa Pásztor ekkriis:

– Salutu!

Kaj la multaj longaj lancoj, kies pino estis tegita per arĝenta papero saltis super ilian kapon.

– Ni devas rapidi, knaboj – diris Franĉjo Áts, post kiam li resalutis –, ĉar mi iom malfruis. Tuj ni ekagu. Bruligu la lampon.

Estis neniam permesite bruligi la lampon, antaŭ kiam la estro alvenis. Se la lampo brulis, tio signifis, ke ankaŭ Franĉjo Áts estas sur la insulo. La pli juna Pásztor bruligis la lampon, kaj la ruĝĉemizuloj ĉirkaŭkaŭris la lumon.

Neniu parolis, ĉiu atendis la parolon de la estro.

– Ĉu estas io por raportti? – li demandis.

Szebenics anoncis sin.

– Nu?

– Humile mi anoncas, ke el la arzenalo mankas la ruĝverda standardo, kiun sinjoro kapitano rabis de la Paŭlo-stratuloj.

La estro kuntiris siajn brovojn:

– Ĉu el la armiloj neniu mankas?

– Ne. Kiel arzenalisto, mi rigardis post mia alveno la tomakaŭkojn kaj la lancojn en la ruinaĵo. Ĉiuj estis tie, mankis nur tiu standardo. Iu ŝtelis ĝin.

– Ĉu vi vidis piedsignojn?

– Jes. Kiel ĉiutage, laŭ la leĝo, ankaŭ hieraŭ mi surŝutis vespere per sablo la internon de la ruinaĵo, kaj kiam hodiaŭ mi esploris ĝin, mi trovis en ĝi

malgrandajn piedsignojn, kiuj kondukis de la fendaĵo rekte al tiu angulo, kie estis la standardo, kaj poste de la angulo reen al fendaĵo. Tie mi ne plu povis vidi ilin, ĉar tie jam malmola kaj herbokovrita estas la tero.

– Ĉu malgrandaj estis la piedsignoj?

– Jes. Tiom malgrandaj, ke ili estis multe pli malgrandaj, ol tiuj de Wendauer, kvankam li havas inter ni la plej malgrandajn piedojn.

Estiĝis granda silento.

– Fremdulo estis en la arzenalo – diris la estro. – Eĉ, li estis Paŭlo-strata knabo.

M u r m u r o t r a k u r i s i n t e r l a
ruĝĉemizuloj.

– Mi devas supozi tion – daŭrigis Franĉjo Áts –, ĉar se alia knabo estus tie, li forportus almenaŭ unu ankaŭ el la armiloj. Sed li forportis nur la standardon. Verŝajne la Paŭlo-stratuloj

komisiis al li, ke li reŝtelu ilian standardon. Ĉu vi scias pri io, Geréb?

Do Geréb jam funkciis kiel konstanta spiono.

Li ekstaris:

– Mi ne scias pri tio.

– Bone. Vi povas residu. Ni esploros la aferon. Sed nun ni aranĝu nian aferon. Vi scias kia honto okazis al ni pasintfoje. Dum ni ĉiuj estis ĉi tie sur la insulo, la malamikoj fiksis ruĝan paperon sur ĉi tiun arbon. Ni ne povis ilin kapti, tiom lertaj ili estis. Ni kuris post du fremdajn knabojn ĝis la Oficista Kolonio, kaj nur tie klariĝis, ke ni kuris senkaŭze post ilin. La alfikso de la papero estas granda honto al ni, kaj tion ni devas venĝi. Ankaŭ la okupon de la grundo ni prokrastis ĝis Geréb faros raporton, kaj ni decidos, kiam ni ekmilitos.

Li rigardis al Geréb:

– Geréb! Ekstaru!

Geréb denove ekstaris.

– Ni aŭdu la raporton. Kion vi faris,

– Mi . . . – diris iom timeme la knabo –, mi havis la opinion, ke eble ankaŭ sen milito ni povus akiri tiun lokon. Mi pripensis, ke iam ankaŭ mi apartenis ja al ili . . . kaj kial mi estu ties kaŭzo, ke . . . mallonge, mi elpelos ilin de tie . . . de tie . . .

Sufokiĝis en li la voĉo. Li ne povis daŭrigi, tiom severe rigardis Franĉjo Áts en lian okulojn. Kaj tiu ekparolis kun sia profunda, obtuza voĉo, pro kiu tiom ofte tremadis la knaboj, se la forta knabo ial ekkoleris pro ili:

– Ne – li kriegis –, verŝajne vi ankoraŭ ne konas la ruĝĉemizulojn. Ni ne iros por subaĉeti, marĉandi. Se ili ne donos ĝin por belaj vortoj, ni forprenos ĝin de ili. Mi bezonas nek slovakon, nek elpelon! Kia insida ago estas tio?

Ĉiuj silentis, kaj Geréb honte duonfermis siajn okulojn. Franĉjo Áts ekstaris:

– Se vi estas malkuraĝa, iru hejmen.

Kun fulmantaj okuloj li diris tion al Geréb. Kaj Geréb en tiu momento tre ektimis. Li sentis ke, se la ruĝĉemizuloj forpelos lin, tiam vere nenie li havos plu lokon en tiu mondo. Do li levis sian kapon, kaj per kuraĝa voĉo provis ekparoli:

– Mi ne estas malkuraĝa! Mi estas kun vi, mi restos kun vi, mi ĵuras al vi fidelon!

– Jen la ĝusta parolo – diris Franĉjo Áts, sed sur lia vizaĝo estis videble, ke li ne simpatias kun la novulo.

– Se vi volas resti kun ni, vi faros juĝon pri niaj leĝoj.

– Volonte – diris Geréb, kaj li ekspiris.

– Donu do vian manon.

Ili manprenis.

– De nun vi havas ĉe ni rangon de leŭtenanto. Sebenics donos ankaŭ al vi lancon kaj tomahaŭkon, kaj enskribos vian nomon en la sekretan nomaron. Kaj nun aŭskultu. Ni ne povas prokrasti la aferon. La tagon de la atako ni fiksos morgaŭ. Morgaŭ posttagmeze ni ĉiuj renkontiĝos ĉi tie. La duono de la taĉmento eniros de la Maria-strato, kaj okupos la fortikaĵojn. Por la alia duono de la taĉmento vi malfermos la Paŭlo-stratan pordeton, kaj tiu parto elpelos la grundanojn de tie, aŭ, se ili rifuĝos malantaŭ la sterojn, atakos ilin el la fortikaĵoj la ceteraj. Ni bezonas pilkludejon, kaj ni akiros ĝin, okazu kio ajn.

Ĉiuj eksaltis.

– Vivu! – kriis ĉiu ruĝĉemizulo, kaj ili levis la lancojn.

La estro signis silenton.

– Ankoraŭ pri io mi devas demandi al vi. Ĉu vi ne pensas, ke la Paŭlo-strataj knaboj suspektas, ke vi apartenas al ni?

– Mi ne kredas tion. – respondis la nova leŭtenanto. – Eĉ se iu el ili estis ĉi tie pasintfoje, kiam ili alfiksis la ruĝan paperon sur la arbon, li ne povis vidi min en la mallumo.

– Do, ĉu trankvile vi povos eniri inter ilin morgaŭ posttagmeze?

– Trankvile.

– Ĉu ili ne suspektos?

– Ne. Eĉ se oni suspektos ion, neniu kuraĝas tion diri al mi, ĉar ili ĉiuj timas min. Inter ili estas eĉ ne unu kuraĝa knabo!

Subite akra voĉo interkriis:

– Sed estas ja!

Ili ĉirkaŭrigardis. Franĉjo Áts demandis surprizite:

– Kiu parolis?

Neniu respondis. La akra voĉo denove eksonis:

– Sed estas ja!

Nun jam klare ili aŭdis, ke la voĉo venas de la branĉoj de la granda arbo. Kaj poste tuj komencis krakadi la branĉoj, io ekkrakadis inter la foliaro de la granda arbo, kaj post minuto blonda knabeto grimpis malsupren de la arbo. Post kiam li saltis de la lasta branĉo, trankvile li purigis sian vestaĵon, ekstaris rekte, kvazaŭ kolono, kaj rigide rigardis la miregantan aron de la ruĝĉemizuloj. Neniu diris eĉ unu vorton, tiome surprizis ĉiujn tiu ĉi gasteto, aperanta neatendite.

Geréb paliĝis.

– Nemecsek! – li diris timigite.

Kaj la blonduleto respondis.

– Jes, Nemecsek. Mi estas. Kaj ne esploru, kiu ŝtelis la Paŭlo-stratan standardon el la arzenalo, ĉar mi ŝtelis

ĝin. Jen ĝi estas ĉi tie. Mi havas tiujn malgrandajn piedsignojn, kiuj estas eĉ pli malgrandaj, ol la piedoj de Wendauer. Mi estus dirinta nenion, mi estus restinta sur la arbo, gis vi ĉiuj estos foririntaj, ho, tie mi kaŭris jam de la duono post la tria. Sed kiam Geréb diris, ke inter ni neniuj estas kuraĝa, mi ekpensis: „Atendu, iu montros ja al vi, ke ankoraŭ troviĝas kuraĝa knabo inter la Paŭlo-strato, se ne alia, Nemecsek, la senrangulo!” Jen mi estas, mi subaŭskultis la tutan pritraktadon, reŝtelis nian standardon, nun faru al mi, kion vi volas, batu min, tordu el mia mano la standardon, ĉar memvole ja mi ne donos ĝin. Jen, jen, nur antaŭen! Mi estas ja nur sola, kaj vi estas dek.

Li ruĝiĝis, dum li tiele parolis, kaj disetendis siajn brakojn. En unu mano li premis la standardeton. La ruĝĉemizuloj ne povis rekonsciiĝi pro la mirego, kaj ili nur rigardis tiun blondan junuleton,

kiu el la ĉielo falis inter ilin, kaj kiu ĉi tie kuraĝe, laŭtvoĉe kriadis kontraŭ ili, kun supretenita kapo, kvazaŭ li estus tiom forta, ke li povus bati tiun ĉi tutan societon kune kun la du fortaj Pásztor-oj kaj Franĉjo Áts.

La Pásztor-oj rekonsciiĝis la unuaj. Ili iris al la eta Nemecsek, kaj dekste kaj maldekstre kaptis liajn brakojn. La pli juna Pásztor staris ĉe la dekstra flanko, kaj jam kaptis lian manon por tordi la standardon el ĝi, kiam en la granda silento eksonis la voĉo de Franĉjo Áts:

– Atendu! Ne batu lin.

La Pásztor-oj mire rigardis la estron.

– Ne batu lin – li diris. – Ĉi tiu knabo plaĉas al mi! Vi estas kuraĝa knabo, Nemecsek, aŭ kiel oni nomas vin. Jen mia mano. Aliĝu al ni, estiĝu rugĉemizulo.

Nemecsek nee skuis la kapon:

– Tute ne! – li diris obstine.

Lia voĉo tremis, ne pro timo, sed pro ekscito. Pale, kun serioza aspekto li staris kaj ripetis:

– Tute ne!

Franĉjo Áts ekridetis. Li diris:

– Do se ne, mi ja ne bedaŭras. Mi neniun ankoraŭ petis ja pri aliĝo. Kiuj estas ĉi tie, ĉiuj venis al ni pete. Vi estas la unua, kiun mi alvokis. Do, se vi ne volas, vi ne venos . . .

– Kaj kio okazu al li? – demandis la Pásztor-oj.

La estro respondis nur malŝate.

– Prenu de li la standardon.

Per unu tordo la pli aĝa Pásztor prenis la ruĝverdan standardon el la malforta maneto de Nemecsek. Lia mano doloris pro la tordo. La Pásztor-oj havas malbeninde malmolajn manojn, sed la blonduleto kunpremis siajn dentojn, kaj eĉ ne unu vorto venis el liaj lipoj.

– Prete! – anoncis Pásztor.

Ĉiu atientis pri tio, kio nun okazos. Kian teruran punon eltrovos la potencia Franĉjo Áts. Nemecsek obstine staris, kaj kunprenis siajn lipojn.

Franĉjo Áts turnis sin al li, kaj signis al la Pásztor-oj:

– Li estas tre malforta. Lin ne decas bati. Sed . . . Banu lin iom.

Granda rido eksplodis inter la ruĝĉemizuloj. Ankaŭ Franĉjo Áts ridis, ankaŭ la Pásztor-oj ridis. Szebenics ĵetis sian ĉapon en la aeron, kaj Wendauer saltadis kvazaŭ frenezulo. Eĉ ankaŭ Geréb ridis sub arbo, kaj en tiu gaja societo nur unu vizaĝo restis serioza: la vizaĝo de Nemecsek. Li estis trafita de malvarmumo, kaj jam de kelkaj tagoj tuis. Lia patrino jam ankaŭ por hodiaŭ malpermesis al li la foriron el la hejmo, sed la blonduleto ne povis elteni en la ĉambro. Je la tria horo li forkuris dehejme, kaj de la duono post la tria ĝis

la vespero li sidis sur la arbo en la insulo. Sed eĉ por la tuta mondo li ne protestus. Ĉu li diru, ke li estas trafita de malvarmumo? Eĉ pli forte ili ridus pri li, kaj ankaŭ Geréb ridus, kiel nun li ridis: ĉiuj iliaj dentoj videbliĝis, tiom larĝe li distiris sian buŝon. Do li diris nenion. Li toleris, ke dum la ĝenerala ridego oni konduku lin al la bordo de la insulo, kaj tie la du Pásztor-oj trempu lin en la malprofundan lagon. Timindaj knaboj estis tiuj du Pásztor-oj. Unu kunprenis lian manojn, la ilia kaptis lian nukon. Ĝiskole ili enakvigis lin, kaj en tiu momento ĉiuj ĝojkriis sur la insulo. La ruĝĉemizuloj gaje dancis sur la bordo, kaj siajn ĉapelojn ĵetadis, kaj forte kriadis:

– Huja, hop! Huja, hop!

Tio estis ilia signalo.

Kaj la multaj „huja hop” fandiĝis kun la ridegoj, gaja kriado rompis la

vesperan silenton de la insulo, kaj sur la bordo, kien Nemecsek kun malgajaj okuloj rigardis el la akvo, kvazaŭ malgaja rano, jen staris Geréb kun dismetitaj piedoj, forte ridante, kaj per sia kapo gestante al la blonduleto.

Poste la Pásztor-oj delasis lin, kaj Nemecsek rampis el la lago. Nur nun eksplodis vera ridego, kiam oni ekvidis lian gutantan, kotmakulitanvestaĵon. De lia jaketo gutfalis akvo, kaj kiam li ekskuis sian brakon, el la maniko fluis la akvo, kvazaŭ verŝata el sitelo. Ĉiu forsaltis de li, kiam li ekskuis sin, kvazaŭ hundeto surverŝita per akvo.

Kaj mokaj vortoj flugis al li:

– Rano!

– Ĉu vi trinkis?

– Kial vi naĝis iom?

Al neniu li respondis. Amare li ridetis kaj glatigis sian jakon. Sed tiam Geréb ekstaris antaŭ li, rikanante li distiris sian

buŝon, kaj kun aroganta kapbalanco demandis al li:

– Ĉu estis bone?

Nemecsek direktis al li siajn grandajn okulojn, kaj respondis:

– Jes, estis bone li diris mallaŭte, kaj aldonis:

– Jes , estis bone, estis pli bone, ol stari sur la bordo, kaj priridi min. Prefere sidi ĝis novjaro, ol aliĝi al la malamikoj de miaj amikoj. Mi ne domaĝas, ke vi enakvigis min. Pasintfoje senvole mi falis en la akvon, ankaŭ tiam mi vidis vin ĉi tie sur la insulo inter la fremduloj. Sed vi povas min voki al vi, vi povas flati min, vi povas doni al mi donacojn, kiom multaj vi nur volas, nenian rilaton mi havas kun vi. Kaj se vi refoje enakvigas min, kaj se ankoraŭ cent kaj milfoje vi enakvigas min, tamen mi venos ĉi tie morgaŭ, kaj ankaŭ postmorgaŭ. Certe mi povos ie

kaŝi min, kie vi ne rimarkos min. Neniun el vi mi timas. Kaj se vi venos al ni al la Paŭlo-strato por forpreni nian teron, tie estos ankaŭ mi! Kaj mi montros al vi, ke tie, kie ankaŭ ni estas dekope, oni parolos kun vi alimaniere, ol nun mi parolas. Facile estas venki min. Kiu estas pli forta, tiu venkas. La Pásztor-oj ŝtelis miajn kugletojn en la muzikĝardeno, ĉar ili estas pli fortaj. Estas facile, dekope kontraŭ unu! Sed mi ne domaĝas tion. Vi povas eĉ bati min, se al vi plaĉas. Ho, se mi volus, mi ne devus iri en la akvon. Sed mi ne aliĝis al vi. Prefere sufoku min en la akvon, kaj mortbatu min, sed ja mi ne estos perfidulo, kiel iu, kiu staras tie jen . . . tie . . .

Li etendis sian brakon, kaj montris al Geréb, en kies gorĝo ekfalis la rido. La lumo de la lampo falis sur la belan blondan kapeton, sur la vestaĵon de Nemecsek brilantan pro akvo. Kuraĝe,

fiere, kun pura koto li rigardis en la okulojn de Geréb, kaj Geréb sub tiu rigardo sentis, kvazaŭ io peza falus sur la animo. Li serioziĝis, kaj klinis sian kapon. Kaj en tiu minuto ĉiu silentis, estis tia silento, kvazaŭ la knaboj estus en preĝejo, kaj klare estis aŭdebla, kiel de la vestaĵo de Nemeček gutadis la akvo sur la malmolan teron . . .

La grandan silenton Nemeček trakriis:

– Ĉu mi povas foriri?

Neniu respondis. Li demandis denove:

– Ĉu vi ne mortbatos min? Ĉu mi povas foriri?

Kaj ĉar ankaŭ nun neniu respondis al li, trankvile, malrapide li ekiris al la ponto. Eĉ ne unu mano moviĝis, eĉ ne unu knabo movis sin. Nun ĉiu sentis, ke tiu blonduleto estas vera heroo, vera viro, kiu meritis esti plenkreskulo. . . . La surponte starantaj du gardantoj, kiuj

vidis la tutan aferon, nur rigardis lin, sed neniu kuraĝis ektuŝi lin. Kiam Nemecsek surpaŝis la ponton, eksonis la profunda, obtuza voĉo de Franĉjo Áts:

– Salutu!

Kaj la du gardantoj kunfrapis la kalkanojn, kaj levis la arĝentpintajn lancojn. Kaj ĉiuj knaboj kunfrapis la kalkanojn, kaj levis la lancojn. Neniu parolis, kiam la arĝentpintaj lancoj ekbrulis en la lunbrilo. Nur la paŝoj de Nemecsek plandfrapis sur la ponto, dum li malproksimiĝis. Poste eĉ tio ne plu aŭdiĝis, nur smaĉsono, kvazaŭ ies paŝado en ŝuoj plenaj per akvo. . . . Nemecsek foriris.

Sur la insulo la ruĝĉemizuloj embarasite rigardis unu la alian. Franĉjo Áts staris meze de la maldensejo, kaj klinis sian kapon. Tiam alprolis lin Geréb pale, kvazaŭ muro, Li diris ion:

– Sciu . . . mi petas . . . – li komencis.

Sed Franĉjo Áts turnis al li la dorson. Tiam Geréb reiris al la rigide starantaj knaboj kaj ekstaris antaŭ la pli aĝa Pásztor.

– Sciu . . . mi petas –, li diris ankaŭ al li.

Sed Pásztor sekvis la ekzemplon de la estro. Ankaŭ li turnis la dorson al Geréb, kiu nun staris tute malcerta. Li ne sciis, kion fari. Poste li ekparolis, kun sufokita voĉo:

– Ŝajne mi povas foriri.

Ankaŭ tion respondis neniu. Kaj nun li ekiris tute la saman vojon, kiun antaŭ nelonge trapasis la eta Nemecsek. Sed lin neniu salutis. La gardantoj kubutapogis sin sur la balustrado de la ponto, kaj rigardis en la akvon. Kaj ankaŭ la paŝoj de Geréb forsonis en la silento de la botanik-ĝardeno.

Kiam la ruĝĉemizuloj restis solaj, Franĉjo Áts ekiris, kaj pasis al la pli aĝa

Pásztor. Tute proksime li haltis antaŭ li, tiel, ke lia vizaĝo preskaŭ tuŝis la vizaĝon de Pásztor. Li mallaŭte demandis:

– Ĉu vi estis tiu, kiu forprenis de tiu knabo la kugletojn en la muze-ĝardeno?

Pásztor respondis mallaŭte:

– Jes.

– Ĉu ankaŭ via frato estis tie?

– Jes.

– Ĉu estis „ejnstand”?

– Jes.

– Ĉu mi ne malpermesis, ke la ruĝĉemizuloj rabu kugletojn de malfortaj knaboj?

La Pásztor-oj silentis. Franĉjo Áts ne povas kontraŭstari. La estro severe rigardis ilin kaj per voĉo ne toleranta kontraŭdiron sed tamen trankvile li diris:

– Banu vin.

Kaj kiam li rimarkis, ke kelkaj knaboj ekridetas, li diris:

– Kaj kiu priridas ilin, ankaŭ tiu banos sin.

Ĉies ridemo ĉesis. Áts rigardis la Pásztor-ojn kaj nun jam ordonvoĉe li diris:

– Nu, lavu vin. Ĝiskole. Rapide!

La ruĝĉemizuloj turnis la dorson al la lago. Ankaŭ Franĉjo Áts mem ne rigardis, kiel la Pásztor-oj plenumas la punon.

Kaj la Pásztor-oj malgaje, malrapide, eniris la lagon, kaj obeeme sidiĝis ĝiskole en la akvon. La knaboj ne vidis ilin, nur aŭdis la plaŭdadon. Franĉjo Áts rigardis al la lago, kaj konvinkiĝis, ke la du knaboj vere subakviĝis ĝiskole. Tiam li donis la ordonon:

– Demetu la armilon. Ekiru.

Kaj la trupon li forkondukis el la insulo. La gardantoj estingis la lampon,

kaj aliĝis al la trupo, kiu soldatpaŝe frapadis plande tra la ponto, kaj malaperis en la densaĵo de la botanik-ĝardeno . . .

La du Pásztor-oj elakviĝis. Ili rigardis unu la alian, poste la manojn ili enpoŝigis, kiel kutime, kaj ankaŭ ili ekiris. Eĉ unu vorton ili ne diris unu al la alia, kaj hontegis.

Kaj la insulo restis sola en la silento de la lunplena printempa vespero.

(SESA PARTO)

19. MILITPLANO 1

Kiam la sekvantan tagon posttagmeze ĉirkaŭ la duono post la tria la knaboj eniradis post la pordeto de la grundo, sur la interna flanko de la palisaro ili vidis grandan paperfolion, kiu estis fiksita al la tabulo per kvar grandegaj najloj.

La granda papero estis manifesto, kiun Boka verkis oferante por ĝi la nokton. Ĝi estis designita per grandaj presliteroj, per nigra ĉina inko, nur la koncernaj literoj de la frazoj estis sangoruĝaj. La plena teksto de la manifesto sonis jene:

MANIFESTO ! !

Nun ĉiu devas esti preta!

*Nian regnon minacas granda danĝero,
kaj se ni ne estas kuraĝaj, la tutan
teritorion oni forprenos de ni!*

La grundo estas en danĝero!

La ruĝĉemizuloj volas nin ataki!

*Sed ankaŭ ni estas tie, kaj se estos
necese, eĉ per nia vivo ni defendos nian
regon!*

Ĉiu plenumu sian devon!

La prezidanto

Hodiaŭ neniu havis emon pilkludi. La pilko silente ripozis en la poŝo de Richter, ĉar li estis la pilkogardanto. La knaboj paŝadis tien kaj reen, ili parolis pri la baldaŭ okazonta milito, kaj ree kaj ree reiris al la afiŝo najlita al la palisaro,

dek-dudekfoje ili legis la entuziasmigajn vortojn. Pluraj jam lernis ĝin parkere, kaj sur la suproj de la fortikaĵoj ili deklamis ĝin per batalema voĉo al la subestarantoj, kiuj ja same sciis ĝin parkere sed tamen kun malfermitaj buŝoj aŭskultis, kaj post kiam ili finaŭskultis, ili rerapidis al la palisaro, relegis la manifeston, kaj ankaŭ ili deklamis ĝin.

La tuta aro estis plenigita per tiu manifesto, kiu ĝis nun estis la unua de sia speco. Vere tre granda devis esti la malbono kaj tre serioza la danĝero, se Boka decidis eldoni manifeston kun sia plej alta subskribo.

Iujn detalojn jam aŭdis la knaboj. Foje-foje ili aŭdis la nomon de Geréb. Inter alia pro tio, ĉar tiel li kalkulis, ke ĉi tie, sur la grundo ili kaptos lin kaj tiam li tuj starigos lin antaŭ la tribunalon. Pri tio ankaŭ Boka ja ne pensis, ke la eta Nemecsek sendemande

iros en la botanik-ĝardenon, kaj tie, en la mezo de la malamika bivako li faros mondinteresan skandalon. . . Nur hodiaŭ antaŭtagmeze tiun eksciis la prezidanto en la lernejo, post la latina kurshoro, kiam en la kelo, kie la pedelo vendas la buteran bulkon, Nemecsek vokis lin flanken, kaj ĉion rakontis. Sed sur la grundo ankoraŭ je la duono post la dua regis eĉ plena necerto, kaj ĉiu atendis la alvenon de la prezidanto. Al la ĝenerala ekscitiĝo ankoraŭ apartenis io alia. En la mastiko-klubo ekestis skandalo. La kluba mastiko sekiĝis. Ĝi fendiĝis, kaj estiĝis neuzebla, kion oni devas tiel kompreni, ke ne estis eble plu premadi ĝin. Tio estis sendube la kulpo de la prezidanto, tion eble post la okazintaĵoj eĉ klarigi ja ne necesas, ke la kluba prezidanto havis la devon ek-ekmaĉi la mastikon. Kolnay la nova prezidanto plej malnoble preterlasis tiun devon. Facile estas diveni, kiu havis plej

unue kontraŭdiron. Barabás estis, kiu tuŝis la aferon. Li iris de knabo al knabo, kaj per akra voĉo parolis kontraŭ la malzorgemo de la nova prezidanto. La penado havis sukceson, ĉar dum kvin minutoj li sukcesis decidigi la knabojn, ke ili postulu kunvokon de eksterordinara kunsido. Kolnay konjektis, pri kio temas.

– Bone – li diris –, sed la afero de la grundo nun estas pli urĝa. La eksterordinaran kunsidon mi kunvokos nur por morgaŭ.

Sed Barabás kriadis:

– Tion ni ne toleras! Sajnas, ke la sinjoro prezidanto ektimis!

– Ĉu vin?

– Ne min, sed kunsidon! Ni postulas la kunvokon ankoraŭ por hodiaŭ.

Kolnay ĝuste volis respondi, kiam eksonis el la pordo la signalo de Paŭlo-stratanoj:

– Haho! Ho! Haho! Ho!

Ĉiuj rigardis tien. Boka enpaŝis tra la pordeto. Apud li venis Nemecsek, kun grandega ruĝa, trikita tuko ĉirkaŭ la kolo. La alveno de la prezidanto haltigis la disputon. Kolnay subite cedis.

– Do, bone ankoraŭ hodiaŭ okazos la kunsido. Sed nun ni aŭskultos Boka-n.

– Kontraŭ tio mi ne protestas – respondis Barabás, sed la anoj de la mastiko-klubo kun la aliaj tiam jam amasiĝis ĉirkaŭ Boka, kaj mil demandojn ili adresis al li.

Ili ankaŭ rapidis al la grupo. Boka mansignis, ke estu silento. Poste atentata de la knaboj li diris:

– Knaboj! Vi certe legis en la manifesto, kia danĝero minacas nin. Niaj spionoj estis en la malamika bivako, kaj eksciis, ke la ruĝĉemizuloj planas la atakon por morgaŭ.

Estiĝis granda murmurado. Neniu atendis, ke la milito eksplodos jam morgaŭ.

– Jes, morgaŭ – daŭrigis Boka –, kaj pro tio de hodiaŭ mi deklaras la militjuĝadon. Ĉiu devas nepre obei sian superulon kaj la oficiroj min. Sed tute ne kredu, ke tio estas ia infanludo. La ruĝĉemizuloj estas fortaj knaboj, kaj ili estas multope. La batalo estos fortega. Sed ni volas devigi neniun, kaj nun mi deklaras: kiu ne volas partopreni la militon, tiu anoncu sin!

Tio estigis grandan silenton. Neniu anoncis sin. Boka ripetis la alvokon:

– Kiu ne volas partopreni la militon, tiu stariĝu antaŭen. Ĉu neniu stariĝas antaŭen?

Ĉiuj kriis samtempe:

– Ne!

– Do tiam ĉiu donu sian voĉon, morgaŭ je la dua esti ĉi tie.

Laŭvice ĉiu iris al Boka, kaj li de ĉiu prenis jurpromeson veni morgaŭ. Kiam laŭorde kun ĉiu li manprenis, altvoĉe li ekparolis:

– Kiu morgaŭ ne estos ĉi tie, tiu estas malhonesta jurrompanto, kaj li neniam enmetu siajn piedojn ĉi tien, ĉar ni elpelos lin per bastono.

Leszik paŝis el la vico:

– Sinjoro prezidanto – li diris –, ĉiuj ni estas ĉi tie, mankas nur Geréb.

Iĝis morta silento. Ĉiu atentis scivole, kio okazis al Geréb. Sed Boka ne estis tia knabo, kiu flankiĝas de sia originala plano. Li ne volis denunci Geréb-on. Ĉi tie antaŭ la aliaj li volis surprizi lin.

Pluraj demandis:

– Kio okazis al Geréb?

– Nenio – respondis Boka trankvile. – Pri tio ni parolos alifoje. Nun provizore ni klopodu gajni la militon. Sed antaŭ la ordonoj, ni devos ion sciigi al vi. Se

ekzistas inter vi malpaciĝo, tio nun finiĝu. Kiuj malpaciĝis, tiuj repaciĝu.

Iĝis silento.

– Nu? – demandis la prezidanto. – Ĉu ne estas malpaciĝoj inter vi?

Weisz respondis humile:

– Mi tiel scias . . .

– Nur eldiru!

– Ke . . . Kolnay . . . kaj Barabás . . .

Boka rigardis al Barabás:

– Ĉu vere?

Barabás ruĝiĝis.

– Jes – li diris. – Kolnay . . .

Kaj Kolnay diris:

– Jes . . . Barabás . . .

– Tuj repaciĝu – kriegis Boka al ili –, ĉar alie vin ambaŭ mi elĵetos de tie. Batali nur estas eble, se ni ĉiuj estas bonaj amikoj!

La du malpaciĝintoj iris al Boka, kaj vole-nevole etendis la manon al la alia.

Ankoraŭ ili ne estis forlasintaj la manon de la alia, kiam Barabás ekparolis:

– Sinjoro prezidanto!

– Kion vi volas?

– Mi havas kondiĉon.

– Nu?

– Se . . . la ruĝĉemizuloj hazarde ne atakos nin . . . tiam . . . mi denove povu esti malamiko de Kolnay, ĉar . . .

Boka alrigardis lin, kvazaŭ per tiu rigardo volus lin trapiki:

– Silentu!

Barabás eksilentis. Sed iom li furiozadis, kaj li oferus multon, se en tiu minuto li povus puŝi ĉeflanken Kolnay-n, kiu gaje ridetis . . .

– Kaj nun – diris Boka –, senrangulo donu la militplanon.

Nemecsek serveme elpoŝigis folion da papero. Ĝi estis la militplano, kiun Boka hodiaŭ post tagmanĝo elcerbumis.

Li metis ĝin sur ŝtonon, kaj la knaboj kaŭris ĉirkaŭ ĝi. Ĉiu atendis scivole, kie estos la destinloko, kian rolon li havos. Kaj Boka komencis komenti la militplanon:

– Bone atentu. Ĉiam rigardu la desegnaĵon. Ĝi estas la geografia karto de nia regno. Laŭ sciigo de la spionoj la malamikoj atakos nin samtempe de du lokoj: de la Paŭlo-strato kaj de la Mária-strato. Ni traktu laŭvice. Tiuj du kvadratoj, en kiu estas skribitaj A kaj B, signifas du batalionojn destinitajn por defendo de la pordego. La bataliono A konsistas el tri homoj, komandata de Weisz. La bataliono B ankaŭ el tri homoj, komandata de Leszik. La Maria-stratan pordegon defendos ankaŭ du batalionoj. Tie la komandanto de la taĉmento C estos Richter. La komandanto de la taĉmento D estos Kolnay.

Iu voĉo interkriis:

– Kial ne mi?

– Kiu estis – demandis Boka severe.

Barabás anoncis sin.

– Ĉu denove vi? Se ankoraŭ unu vorton vi diros, mi starigos vin antaŭ la milit-tribunalo! Eksidu.

20. MILITPLANO 2

Barabás grumblis kaj eksidis. Kaj Boka daŭrigis la klarigon:

– La nigraj punktoj, kiuj estas signitaj per litero F kaj ciferoj, signifas la fortikaĵojn. Ili estos provizitaj per sablo, tiel ke du homoj sufiĉos por ĉiu fortikaĵo. Batali per sablo estas facile. Cetere la fortikaĵoj estas tiel proksimaj unu al la alia, ke se de unu estos atakata, ankaŭ la alia fortikaĵo povos bombardi la atakantojn. La fortikaĵoj 1, 2 kaj 3 defendos la grundon ĉe la Mária-strato, kaj la fortikaĵoj 4, 5 kaj 6 subtenos per sablobomboj la taĉmentojn A kaj B. Kiu en kiu fortikaĵoj iros, tion mi diros nur poste. Kaj ĉiu batalionkomandanto mem elektos apud sin du homojn. Ĉu vi komprenas?

– Jes! – estis la unuvoĉa respondo.

La knaboj nun jam ĉiuj kun malfermitaj buŝoj, runde malfermitaj okuloj ĉirkaŭsidis la grandiozan militplanon, eĉ kelkaj prenis notlibretojn kaj fervore notis, kion diris la miltestro.

– Do – diris Boka –, tio estis la lokigo. Nun sekvos la vera militordono. Ĉiu atentu bone. Kiam la gardanto, sendita sur la supron de la palisaro raportas, ke la ruĝĉemizuloj proksimiĝas, la batalionoj A kaj B malfermos la pordegon.

– Ĉu ni malfermos ĝin?

– Jes. ni malfermos ĝin. Ni ne fermos nin, ĉar ni akceptos la batalon. Unue ili envenu, kaj poste ni elpelos ilin. Do vi malfermos la pordegon, kaj lasos enveni la trupon. Kiam ilia lasta homo envenis, vi atakos ilin. Samtempe la fortikaĵoj 4, 5 kaj 6 komencos la bombardon. Tio estas la devo de unu el la taĉmentoj. Ĝi estas la Paŭlo-strata armeo. Se eble, vi

elpelos ilin, se neeble almenaŭ vi malhelpos, ke ili trairu la liniojn kreitaj de la fortikaĵoj 3, 4, 5 kaj 6, kaj ke ili restu sur la grundo. La alia armeo: la Mária-strata armeo ricevos pli malfacilan taskon. Atentu bone Richter kaj Kolnay! La batalionoj C kaj D sendos du gardantojn en la Maria-straton. Kiam la alia trupo de la ruĝĉemizuloj aperos ĉe la Mária-strato, la batalionoj stariĝos laŭvice. Kiam la ruĝĉemizuloj envenos tra la granda pordego, tiam ambaŭ batalionoj ŝajnigos forkuron. Rigardu ĉi tien . . . sur la planon . . . ĉu vi vidas? La bataliono C, estas la via, Richter . . . kaj ĝi kuros en la veturilejon . . .

Li montris per sia fingro:

– Jen, tien. Ĉu vi komprenas?

– Mi komprenas.

– Kaj la bataliono D, tiu de Kolnay, kuros en la kabanon de Jano. Nun

atentu, ĉar nun sekvos la plej grava afero. Kaj bone rigardu la planon. Tiam la ruĝĉemizuloj de dekstre maldekstren la vaporsegilejon kaj malantaŭ ĝi ili trovos sin kontraŭ la fortikaĵoj 1, 2 kaj 3. Tiuj tuj komencos bombardi. En tiu sama minuto la du batalionoj antaŭenkuros, la unua el veturilejo, la alia el la kabano de la slovako, kaj atakos la malamikon de malantaŭe. La malamiko, se vi batalos kuraĝe, tie premiĝos en hundkaptilon, kaj devos kapitulaci. Kaj se ili ne kaputilacas, vi premos kaj ŝlosos ilin en la kabanon. Kiam tio okazis, la bataliono C apud la kabano, kaj la bataliono D ĉirkaŭante la sterojn eliros ĉe la fortikaĵo 6, kaj rapidos por helpi la batalionojn A kaj B. La soldatoj de la fortikaĵoj 1 kaj 2 iros en la fortikaĵojn 4 kaj 5, kaj ili faros pli arde la bombardadon. Poste la batalionoj A, B, C kaj D viciĝos en unu linio, kaj pelos la malamikon al la Paŭlo-strata

pordego, dume ĉiuj fortikaĵoj super niaj kapoj bombardos la malamikon, kiu pro la unuiĝinta forto ne povos kontraŭstari. Kaj tiam ni elpelos ilin tra la Paŭlo-strata pordego. Ĉu vi komprenis?

Estiĝis granda entuziasmo. Tukojn ili filtrigis kaj ĉapelojn ĵetis alten. Nemecsek prenis la grandan ruĝan tritikan tukon de sia kolo, kaj per katara voĉo li kriis dum la ĝenerala aklamado:

– Vivu la prezidanto!

– Vivu! – estis la respondo.

Sed Boka denove mansignis.

– Silenton. Ankoraŭ. Mi estos kun mia adjutanto en la proksimo de la batalionoj C kaj D. Kion mi sciigos per li, tion vi devos akcepti, kvazaŭ mi ordonus.

Voĉo demandis:

– Kiu estos la adjutanto?

– Nemecsek.

Kelkaj knaboj interrigardis. La knaboj de la mastikoklubo eĉ ekpuŝis unu la alian, ke tion oni devas kontraŭdiri. Tiaj vortoj aŭdiĝis:

– Ekparolu jam, nu!

– Elparolu vi!

Boka mire rigardis ilin:

– Ĉu vi havas kontraŭdiron?

Leszik estis la sola, kiu kuraĝis paroli:

– Jes.

– Kion?

– Dum la ĝeneralkunsido de la mastikoklubo, pasintfoje . . . kiam . . .

Boka perdis sian paciencon. Li alkriis Leszik-on:

– Sufiĉas. Silentu. Mi ne estas scivola pri viaj malsaĝaĵoj. Nemecsek estos mia adjutanto, kaj punkto. Kiu kontraŭdiros tion eĉ per unu vorto, tiun mi starigos antaŭ la milit-tribunalon.

Tiu deklaro estis iom severa, sed ĉiu vidis, ke dum miljtaj tempoj nur tiel estas eble prosperi. Do ili ne plu protestis, ke Nemecsek estu la adjutanto. Estiĝis malgranda, mallaŭta flustrado inter la gvidantoj de la mastiko-klubo. Kaj ili hontis, ke tiu havos en la milito tiom gravan rolon, pri kiu la ĝeneralkunsido eldiris, ke li estas perfidulo, kaj kies nomon per minusklo ili skribis en la nigran libron de la klubo. Sed, se ili estus sciintaj . . .

Nun Boka prenis nomaron el sia poŝo. Li laŭtleĝis laŭ ĝi, kiu en kiu fortikaĵon estas irigota. La komandantoj se la batalionoj elektis siajn du homojn. Ĉio ĉi okazis tre serioze, kaj la knaboj estis tiom incititaj, ke neniu diris eĉ unu vorton. Kiam ĉio ĉi okazis, Boka donis la ordonon:

– Ĉiu lokigu sin. Ni militprovos.

Subite ĉiuj diskuris, ĉiu al sia loko.

– Ĉiu atendu, ĝis novan ordonon ricevos! – kriis Boka post ilin.

Nun li restis sola meze de la grundo kun Nemecsek, kun la adjutanto. La kompatinda adjutanto forte tusadis.

– Ernesto – diris Boka milde al li –, remetu la tukon sur vian kolon. Tre forte vi malvarmumis.

Nemecsek dankeme rigardis sian amikon, kaj obeis al li, kvazaŭ li estus lia frato. Li remetis la grandan ruĝan trikitan tukon sur la kolon, tiel, ke nur liaj oreloj videbliĝis el ĝi.

Kiam tio okazis, Boka ekparolis:

– Nun mi sendos ordonon per vi en la fortikaĵon 2. Bone atentu . . .

Sed Nemecsek en la minuto ion faris, kion ĝis nun neniam. Li interrompis la parolon de sia superulo:

– Pardonu min – li diris –, sed mi ŝatus ion diri al vi!

Boka kuntiris la brovojn:

– Kion?

– Ĉi tie, antaŭe, la anoj de mastikoklubo . . .

– Lasu jam mi petas – senpacience kriis la prezidanto –, ĉu ankaŭ vi konsideras seriozaj tiujn malsaĝaĵojn?

– Jes – respondis Nemecsek –, ĉar ankaŭ ili konsideras serioze. Kaj mi sentas, ke ili estas malsaĝaj, kaj min ne interesas, kion ajn pensos pri mi, sed mi ne ŝatus tion, se . . . se vi . . . se ankaŭ vi malestimus min.

– Kial mi malestimus vin?

El la kvastoj de la granda ruĝa tuko respondis voĉo ploretonta:

– Ĉar ili deklaris pri mi . . . ke . . . mi estas perfidulo . . .

– Perfidulo? Ĉu vi?

– Jes mi.

– Nu pri tio mi vere estus scivola.

Kaj Nemecsek balbutante, per sufoka voĉo rakontis la aferojn okazintajn antaŭ nelonge. Ke ĝuste tiam li devis rapidi, kiam la anoj de la mastiko-klubo faris sekretan ĵuron. Ke pro tio ili tuj kaptis la okazon, kaj deklaris, ke tial li kuras, ĉar li ne volas aliĝi al la sekreta societo. Ke li estas perfidulo kaj mallhonestulo.

Kaj ĉio ĉi esence okazis pro tio, ĉar la leŭtenantoj ĉefleŭtenantoj, kapitanoj malprobis, ke la prezidanto amikiĝas ne kun ili, sed pri ĉiu ŝtatsekreto li informas la simplan senrangulon. Kaj fine, ke oni enskribis lian nomon en la nigran libron per minuskloj.

Ĉion ĉi Boka finaŭskultis pacience. Poste li denove silentis. Al li doloris, ke inter la knaboj troviĝas ankaŭ tiaj. Boka estis saĝa knabo, sed tamen li ne sciis, ke aliaj homoj pensas alimaniere ol ni, kaj tion ni ĉiam devas pagi per dolora sento. Poste ame li rigardis la blonduleton.

– Estas bone, Ernesto – li diris –, aranĝu nur viajn aferojn kaj lasu ilin. Nun antaŭ la milito mi volas diri nenion. Sed se iam ni estos post la milito, mi disbatos inter ili. Nun do vi rajtu rapide al la fortikaĵoj 1 kaj 2, kaj portu la ordonon, ke la knaboj tuj grimpu sur la fortikaĵojn 4 kaj 5. Mi volas vidi, kiom da tempo ili bezonas por la transgrimpado.

La senrangulo kunfrapis siajn kalkanojn, rigide salutis, kaj kvankam en tiu minuto li pensis pri tio, ke kiom malĝoja estas tio, ke pro la milito la problemo de lia honesto suferas prokraston, li sufokis ĉiun amaron, kaj diris soldate:

– Jes sinjoro prezidanto.

Tuj li ekgalopis. Post li polviĝis la tero, kaj la adjutanto baldaŭ malaperis inter la steroj, sur kies suproj el la fortikaĵoj hirtaj kapoj de la knaboj elrigardis, kun malfermitaj okuloj. Sur

iliaj vizaĝoj estis videbla la ekcitiĝo, kiu ankaŭ premas la soldatojn antaŭ la batalo, kiel ni scias el la priskriboj de k u r a ĝ a j k a j h o m k o n a n t a j militraportistoj.

Kaj Boka restis tutsola en la mezo de la grundo. Al la granda peco de ĉirkaŭbarita tero penetris la bruo de la rapidegantaj veturiloj, sed Boka tamen tiel sentis, kvazaŭ li ne estus en la mezo de la granda urbo, sed ie malproksime, sur fremda tero, sur iu granda stepo, kie morgaŭ decidus milito pri la sortoj de nacioj. La knaboj aŭdigis nek unu krion, ĉiu staris trankvila sur sia loko, kaj atendis la ordonon. Boka sentis, ke nun ĉio dependas de li. De li dependas la gajaj posttagmezoj, la pilkludadoj, la diversaj ludoj kaj amuzoj, per kiuj ĉi tie amuzis sin liaj kamaradoj. Kaj Boka nun estis fiera, ke li akceptis tiom belan taskon.

— Jes — li diris en si —, mi defendos vin!

Li ĉirkaŭrigardis sur la kara grundo. Poste li rigardis al la steroj, ĉe kies malantaŭaĵoj scivole altiĝis la gracila ferkamentubo de la vaporsegilo, kaj ĝi gaje kraĉis la neĝblankajn vapornubetojn, tute tiom gaje, tute tiom senzorge, kvazaŭ la hodiaŭa tago ankaŭ estus nur tia, kia la aliaj, kvazaŭ nun estus en danĝero nenio, tute nenio . . .

Jes, Boka nun sentis sin kvazaŭ granda militestro antaŭ sorton decidanta batalo. Li pensis pri Napoleono la granda. . . . Kaj li vagis en la estontecon. Kiel estos? Kiel estos? Kio li fariĝos? Ĉu soldato vera, ĉu iam li komandos armeon uniforme vestitan, ie malproksime, sur vera bataalkampo, — ne por peceto da tero, kia estas tiu ĉi grundo, sed ĉu por tiu granda peco da dolĉa tero, kiun oni nomas patrujo? Aŭ ĉu li fariĝos

kuracisto, kiu batalos ĉiutage kontraŭ malsanoj, seriozan kaj bravan batalon?

Malrapide flugis malsupren la krepusko de la frua printempo dum Boka tiel revadis. Forte li ekĝemis, kaj ekiris al la steroj, por ke li rigardu la soldataron de la fortikaĵoj.

La knaboj ekvidis sur la suproj de la steroj, ke la militestro proksimiĝas al ili. En fortikaĵoj ariĝis ekmovoj. La sablobombojn ili metis laŭvice, kaj ĉiu staris streĉita.

Sed la estro subite haltis mezvoje, kaj li rigardis. Kvazaŭ li aŭskultus. Poste li returnis sin, kaj rapidpaŝe reiris al la pordeto de la palisaro. Oni frapis sur la pordo. Boka malriglis kaj malfermis ĝin. Pro surprizo li ŝanceliĝis.

21. GÉREB KAJ BOKA

Geréb staris antaŭ li.

– Ĉu vi? – demandis embarasite.

Boka ne povis tuj respondi. Geréb malrapide envenis, kaj fermis post si la pordon. Boka eĉ ankoraŭ ne sciis, kion li volas. Sed Geréb ne estis tiom gaja, kaj trankvila, kiom aliokaze. Li estis pala kaj malĝoja. Per mano nervoze li ĝustigis sian kolumon, kaj estis videbla sur ĝi, ke li volas diri ion, sed li ne sciis, kiel komenci. Ankaŭ Boka ne ekparolis, ankaŭ li ne ekparolis, do dum kelkaj minutoj senparole ili staris unu kontraŭ la alia, kaj neniu sciis, kion fari. Finfine Geréb ekparolis:

– Por tio mi venis, ke . . . ke mi parolu kun vi.

Nun ankaŭ Boka povis ekparoli. Per simpla, serioza voĉo li respondis:

– Mi havas nenian parolon kun vi. Estos plej saĝe, se nun vi eliros tra tiu ĉi pordo, kiel vi envenis.

Sed la knabo ne obeis la konsilon.

– Aŭskultu Boka – li diris –, mi jam scias, ke vi eksciis pri ĉio. Mi scias, vi ĉiuj scias, ke mi aliĝis al la ruĝĉemizuloj. Nun mi venis ĉi tien ne kiel spiono, sed kiel bona amiko.

Boka mallaŭte diris:

– Ĉi tien vi ne povis veni estiel bona amiko.

Geréb klinis sian kapon. Li sciis, ke krude oni kondutos kontraŭ li, ke oni elpelos lin, sed li ne atendis, ke kun tia mallaŭta malĝojo oni parolos kun li. Tio kaŭzis al li grandan doloron. Pli fortan, ol li estus batite. Nun jam ankaŭ li parolis mallaŭte kaj malĝoje:

– Mi venis por reĝustigi mian eraron.

– Tion oni ne povas fari – diris Boka.

— Sed mi pentis . . . tre multe pentis . . . kaj mi reportis vian standardon, kiun Franĉjo Áts forportis de ĉi tie, kaj kiun la eta Nemecsek reŝtelis . . . kaj kiun poste la Pásztor-oj tordis el la mano de la eta Nemecsek . . .

Tion dirinte el sub sia jako li tiris la ruĝverdan standardon. La okuloj de Boka ekbrilis. La standardeto estis ĉifita, ŝirita, estis videbla sur ĝi, ke jam okazis militoj por ĝi. Sed ĝuste tio estis bela en la standardeto. Ĝi estis ĉifona, kavazaŭ vera standardo, kiu ĉifoniĝas en la flamo de militoj.

— La standardon — diris Boka —, ni mem reprenos de la ruĝĉemizuloj. kaj se ni ne povos ĝin repreni, tiam ja estos vana ĉio. . . . Tiam ja ni foriros de tie, ni disĵetiĝos . . . ni ne plu estos kunaj. . . . Sed tiamaniere ni ne bezonos la standardon. Kaj ankaŭ vi ne estas bezonata.

Kaj tiel li faris, kvazaŭ li volus foriri. Kvazaŭ li volus forlasi Geréb-on. Sed tiu ekprenis lin je la rando de jako.

– Johano – li diris per sufokata voĉo –, mi vidas, ke mi ege pekis kontraŭ vi. Mi volas rebonigi mian eraron. Pardonu min.

– Ho – respondis Boka –, mi jam pardonis vin.

– Kaj ĉu vi reakceptos min?

– Tion ne.

– Ĉu neniamaniere?

– Neniamaniere.

Geréb elpoŝigis sian poŝtukon, kaj levis ĝin al la okuloj. Boka malĝoje diris al li:

– Ne ploru. Geréb, mi ne volas, ke vi ploru ĉi tie, antaŭ mi. Iru hejmen, kaj lasu nin pace. Nun ja vi venis ĉi tien, ĉar ankaŭ ĉe la ruĝĉemizuloj elĉerpiĝis la estimo al vi.

Geréb enpoŝigis la poŝtukon, kaj volis sin ŝajnigi vireca.

– Do bone – li diris –, mi foriras. Vi ne plu vidos min. Sed mi ĵuras al vi, ke ne tial mi revenis ĉi tien, ĉar la ruĝĉemizuloj ekmalamis min. Tio havis alian kaŭzon.

– Kion?

– Mi ne diros tion. Eble iam vi ekscios. Sed ve al mi, se tion mi ekscios . . .

La prezidanto nun tiam ekmiris:

– Tion mi ne komprenas.

– Nun mi ne klarigas tion –, balbutis Geréb, kaj li ekiris al la pordeto. Tie li haltis, kaj ankoraŭfoje rerigardis. Li diris: – Ĉu vane mi petus al vi denove por reakcepti min?

– Vane.

– Do tiam . . . mi ne petos.

Li elkuris, kaj ĵetfermis la pordon. Boka dum minuto hezitis. En sia vivo la unuan fojon li estis senkompata al iu. Li jam ekmovis sin, por iri post lin, kaj krie: „Revenu, sed poste kondutu bone!” kiam subite li ekmemoris pri iu sceno. Tiu ridado kun kiu Geréb antaŭ kelkaj tagoj forkuris de li en la Paŭlo-strato. Kiam li priridis ilin. Kiam li staris tie kun Nemecsek sur la trotuaro malgaje, kun klinitaj kapoj, en siaj oreloj kun tiu moka, malica ridado, kun kiu Geréb forsaltis de ili.

„Ne,” li diris al si, „mi ne revokas lin. Li estas malbona knabo.”

Kaj li turnis sin por iri inter la steroj, sed pro li devis halti. Tie staris sur la suproj de la steroj ĉiuj knaboj, ĉiuj, kaj rigardis la scenon. Eĉ tiuj ankaŭ staris tie, kiuj ne devus esti en la fortikaĵoj. La tuta malgranda armeo mute viciĝis supre sur la regulaj lignokuboj, neniu diris eĉ unu vorton, ĉiu kun retenita spiro

atendis, kio okazos inter Boka kaj Geréb. Kaj kiam Geréb eliris, kaj Boka ekiris al la steroj, la subpremita eskscitiĝo eksplodis, kaj la tuta armeo subite, samtempe, kvazaŭ unu homo komencis aklami.

– Vivu! – sonis de la steroj la multaj, freŝaj knabaj voĉoj, kaj la ĉapeloj flugis en la aeron.

– Vivu la prezidanto!

kaj terura fajfo trafendis la aeron, forta fajfo, kian eble eĉ vaporlokomotivo ne povus produkti, kiom ajn ĝi streĉus sin. Laŭta, triumfa fajfo ĝi estis. Kompreneble Csónakos fajfis. Kaj feliĉe li ĉirkaŭrigardis, kaj rikane diris:

– Nu, neneiam en mia vivo ankoraŭ mi fajfis tiom bonguste!

22. VIVU LA PREZIDANTO!

– Nu, neneiam en mia vivo ankoraŭ mi fajfis tiel bonguste! – diris Csónakos.

Kaj Boka haltis emociite meze de la grundo, kaj nun jam ĉiu vidis klare la rolon de Geréb. Ĝis ilia loko ne aŭdiĝis, kion parolis la du knaboj ĉe la pordego, sed ili vidis la gestojn, kaj per tio ĉiu komprenis ĉion. Ili vidis la rifuzan movon de Boka. Ili vidis, ke li ne manprenas kun li. Ili vidis, kiam Geréb ekploris, kaj ankaŭ tion, ke li foriris. Kiam en la pordego li returnis sin, kaj ankaŭ tion, ke li foriris. Kiam en la pordego li returnis sin, kaj reiris al Boka, ĉiuj ektimetis. Leszik flustris:

– Ve . . . eble nun li pardonos lin.

Sed kiam Geréb tamen foriris, kaj ili vidis, ke Boka nee skuas la kapon, subite eliĝis el ili la entuziasmo. Kaj eksonegis la „vivu!”, kiam la prezidanto

turnis sin al ili. Al ili plaĉis, ke ilia prezidanto ne estas knabo, sed serioza viro. Ili ŝatus ĉirkaŭbraki kaj kisi lin. Sed estis milita tempo. Ili ne povis fari alion, ol kii. Sed tion ili faris vere, per plena pulmo, kiel povis iliaj gorĝoj.

– Firma knabo vi estas, paĉjo! – diris Csónakos fiere. Sed li ektimis kaj tuj korektis: – Ne „paĉjo” . . . pardonon . . . sinjoro prezidanto.

Kaj komencis la ekzercaĵoj. Laŭtaj komandoj aŭdiĝis, taĉmentoj kuregis inter la steroj, ili atakis la fortikaĵojn, kaj flugis la sablobomboj de dekstre maldekstren. Ĉio estis bonega. La ricevitan rolon ĉiu sciis bone. Tio fortigis la entuziasmon.

– Ni venkos! – aŭdiĝis ĉie.

– Ni elpelos ilin!

– Ni kunligos la kaptitojn!

– Franĉjo Áts mem estos kaptita!

Nur Boka restis serioza.

– Ne perdu la prudenton en la gloro –
li diris. – Post la milito estu
bonhumoraj. Kaj nun kiu volas, tiu
povas hejmeniri. Ankoraŭfoje mi diras:
kiu morgaŭ ĝustatempe ne estos ĉi tie,
tiu estos ĵurrompanto.

Kaj finiĝis la ekzerco. Sed neniu havis
emon por la hejmeniro. Ili disiĝis laŭ
grupoj, kaj priparolis la Geréb-an
aferon.

Barabás kriis per rikana voĉo:

– Mastiko klubo! Mastiko klubo!

– Kion vi volas?– demandis la knaboj.

– Ĝeneralkunsidon!

K o l n a y e k m e m o r i s p r i l a
ĝeneralkunsido, kiun li promesis ne
delonge, kaj antaŭ kiu li devas
senkulpigi sin pri tiu akuzo, ke li lasis
sekiĝi la kluban mastikon.

– Do bone – li diris, – estos
ĝeneralkunsido. Mi petas al la estimataj
anoj por flankeniri.

Kaj la estimataj anoj, kondukate de la malica Barabás foriris el la steroj antaŭen, apud la palisaron, por ke tie ili okazigu la ĝeneralkunsidon.

– Ni aŭdu, ni aŭdu! – kriadis Barabás. Kaj Kolnay per oficiala voĉtono diris:

– Mi malfermas la kunsidon. Sinjoro Barabás anoncis sin por paroli.

– Khm, khm – pereige akrigis sian gorĝon Barabás. – Estimata ĝeneralkunsido! La sinjoro prezidanto havis feliĉon, ĉar pro la militprovoj jam preskaŭ prokrastiĝis la ĝeneralkunsido, kiu la prezidanton elpostenigos.

– Oho! Oho! – kriis la kontraŭa partio.

– Al mi vane vi „oho-as” – kriegis la oratoro –, ĉar mi scias, kion mi parolas! La sinjoro prezidanto per la militprovoj iam prokrastis la aferon, sed nun jam li ne povas plu prokrasti ĝin. Ĉar nun . . .

Subite li ĉesigis la parolon. Sur la pordeto de la palisaro forta frapado

aŭdiĝis, kaj nuntempe la knaboj tre multe ektimis pro ĉiu frapado. Oni ne povis scii, ĉu ne malamikoj venas.

– Kiu estis? – demandis la oratoro. Kaj ĉiuj atentis.

Nun denove aŭdiĝis la frota, senpacienca frapado.

– Oni frapas sur la pordo – diris kun tremanta voĉo Kolnay, kaj li elrigardis tra la breĉoj de la tabuloj de la palisaro. Poste kun vizaĝo miriganta li turnis sin al la knaboj:

– Sinjoro estas ĉi tie.

– Ĉu sinjoro?

– Jes. Kunbarba sinjoro.

– Do, malfermu al li.

Li malfermis la pordegon. Vere, sinjoro vestita elegante enpaŝis, en granda, nigra surtuto. Li havis nigran plenbarbon kaj uzis lenson. Li haltis sur sojlo, kaj ekkriis:

– Ĉu vi estas la knaboj de Paŭlo-strato?

– Jes – respondis samtempe la tuta mastiko-klubo.

Tiam la mantelhava sinjoro eniris, kaj subite pli milde rigardis ilin.

– Mi estas la patro de Geréb. Li diris ke vi elpelis lin...

23. APERAS LA PATRO DE GERÉB

Estiĝis silento. Jam estis afero serioza, se la patro de Geréb venis ĉi tien. Leszik ekpuŝis la kokson de Richter:

– Kuru venigu Boka-n.

Richter forkuris al la vaporegilo, kie Boka rakontis al la knaboj ĝuste la malbonajn agojn de Geréb. Kaj la plenbarba sinjoro turnis sin al la mastiko-klubo.

– Kial do vi elĵetis mian filon de ĉi tie?

Kolnay stariĝis antaŭe:

– Ĉar li perfidis nin al la ruĝcemizuloj.

– Kiuj estas la ruĝcemizuloj?

– Ili estas alia aro da knaboj, kiuj vizitas la botanikĝardenon . . . sed nun ili volas forpreni ĉi tiun lokon de ni, ĉar ili ne havas pilkludejon. Ili estas niaj malamikoj.

La barbhava viro sulkigis sian frunton:

– Mia filo ĵus venis hejmen plorante. Longtempe mi demandis al li, kio okazis al li, sed li ne volis tion diri. Finfine, kiam mi ordonis al li, nur li diris, ke li estas suspektita kiel perfidulo. Tiam mi diris al li: „Nun mi prenas mian ĉapelon, kaj iros al tiuj knaboj. Mi parolos kun ili, kaj demandos al ili, kio estas vera el tio. Se tio ne estas vera, mi postulos, ke ili petu pardonon de vi. Sed se tio estas vera, tiam fariĝos granda malbono, ĉar via patro dum sia tuta vivo estis honesta homo, kaj li ne toleros, ke lia filo estu perfidulo de siaj kamaradoj.” Tion mi diris al li. Do nun mi estas ĉi tie, kaj alvokas vin, diru honeste, kun vera animo, ĉu perfidulo estas mia filo, aŭ ne. Nu?

Fariĝis muta silento.

– Nu – ripetis la patro de Geréb. – Ne timu min. Diru la veron. Mi devas scii,

ĉu maljuste vi traktis mian filon, aŭ ĉu li meritas punon?

Neneiu respondis. Neniu volis ĉagreni la mantelkovratan viron, kiu ŝajnis esti bona, kiu tiom timas pro la karaktero de sia gimnazia filo. Kaj li turnis sin al Kolnay:

– Vi diris, ke li perfidis vin. Nun vi devas tion pruvi! Kiam li perfidis vin? Kiamaniere li perfidis vin?

Kolnay balbutis:

– Mi . . . mi . . . mi nur aŭdis tion . .

– Tio estas nenio. Kiu scias certe? Kiu vidis? Kiu scias?

En tiu momento aperis ĉe la fortikaĵoj Boka kun Nemecsek. Richter vokis ilin. Kolnay ekspiris.

– Mi petas – li diris –, tie venas . . . tiu blonduleto . . . tiu Nemecsek . . . li vidis. Li scias.

Ili atendis, ĝis la tri knaboj venis proksime al ili. Sed Nemecsek iris rekte al la pordego. Kolnay kriis al ili:

– Boka venu ĉi tien!

– Nun ne povas esti – respondis Boka –, mi petas iom atendi. Nemecsek fartas tre malbone, lin afektis tusado . . nun mi devas lin akompani hejmen . .

La mantelhava viro, aŭdante la nomon de Nemecsek, alkriis lin:

– Ĉu vi estas Nemecsek?

– Jes – diris mallaŭte la blonduleto, kaj iris al la nigra homo. Tiu severe diris al li:

– Mi estas la patro de Geréb, kaj pro tio mi venis ĉi tien, ke mi eksciu, ĉu mia filo estas perfidulo aŭ ne. Viaj kamaradoj diris, ke vi scias tion. Do respondu kun vera animo: ĉu tio estas vera aŭ ne?

La vangoj de Nemecsek brulis pro febro. Nun jam serioze li estis malsana.

Liaj tempioj batadis, liaj manoj estis varmegaj. Kaj tiom stranga estis ĉirkaŭ li la tuta mondo. . . . Kaj tiu kunbarba, okulvitra onklo, kiu tiom severe alparolis lin, kiel sinjoro profesoro Rácz kutimis paroli al malbonaj lernantoj . . . tiuj multe mirantaj knaboj . . . la milito . . . tiu multe da ekscitiĝo . . . kaj tiu severa demando, en kiu ankaŭ tio estis, se vere perfidulo estas Gerébknabo, tiam fariĝos granda malbono . . .

– Respondu! – urĝigis la nigra homo.
– Nun respondu! Respondu! Ĉu li estas perfidulo?

Kaj la blonduleto respondis kuraĝe kun ruĝaj vangoj, brilantaj okuloj pro febro, mallaŭte, kvazaŭ li estus peka, kiu nun ĉion konfesas:

– Ne, mi petas. Li ne estas perfidulo.

La patro fiere turnis sin al la aliaj:

– Ĉu vi mensogis?

La knaboj de la mastiko-klubo staris miregantaj. Eĉ brueto ne aŭdiĝis.

– Haha! – diris moke la nigrabarbulo.
– Do vi mensogis! Tuj mi sciis, ke mia filo estas honesta knabo!

Nemecsek apenaŭ povis stari sur siaj piedoj. Modeste li demandis:

– Ĉu mi povas foriri?

– Jes, vi povas foriri, vi, ĉionscianto!

Kaj Nemecsek ŝanceliĝe eliris sur la straton kun Boka. Nun jam ĉio malklariĝis antaŭ liaj okuloj. Nun jam li vidis nenion. Konfuze dancis antaŭ li la nigra viro, la strato, la multaj steroj, strangaj vortoj muĝis en liaj oreloj. „Knaboj sur la fortikaĵojn!” – kriegis voĉo. Poste alia voĉo diris: „Ĉu perfidulo estas mia filo?” Kaj la nigra homo ridis moke, kaj dum la ridado tiel kreskis lia buŝo, kvazaŭ ĝi estus la pordego de la lernejo . . . kaj tra tiu pordego elvenis profesoro Rácz . . .

Nemeček deprenis sian ĉapelon.

– Kiun vi salutas? – demandis lin Boka. – Sed ja neniu iras sur ĉi tiu strato.

– Mi salutas sinjoron profesoron Rác –, diris mallaŭte la blonduleto.

Boka ekploris. Rapide li kondukis, trenis hejmen sian amikon tra la malheliĝanta strato.

En la grundo starigis antaŭe Kolnay, kaj diris al la nigra homo:

– Mi petas, Nemecsek estas mensogema fripono. Ni deklaris lin perfidulo, kaj forigis lin el la klubo.

La patro estis feliĉa kaj jesis:

– Ja tio estas videba sur li. Li havas friponetan vizaĝon. Lia konscienco estas malbona.

Kaj feliĉe li iris hejmen por pardoni sian filon. Ĉe la angulo de Üllői-strato ankaŭ li vidis, kiam Boka kun Nemecsek antaŭ la kliniko transpaŝadis

la veturilvojon. Sed tiam jam ankaŭ Nemecsek ploris, tre malĝoje, tre amare, per la tuta profunda doloro de sia senrangula koro, kaj dum tiu febra plorado konstante li diradis:

– Per minuskloj ili skribis mian nomon
. . . per minuskloj ili skribis mian
kompatindan, honestan nometon . . .

(SEPA PARTO)

24. MILITPREPARO

La sekvan tagon antaŭtagmeze dum la klaso pri latino tiom granda estis la ekscitiĝo en la tuta ĉambro, ke ankaŭ profesoro Rácz rimarkis tion.

La knaboj sinmovadis en la benkoj, ili gapadis, ne ege atentis tiun, kiu ĝuste tiam respondis, kaj ne nur Paŭlo-stratuloj estis en tia eksterordinara stato, sed ankaŭ la aliaj, mi povus diri: la tuta lernejo. La grandaj militpreparoj rapide disfamiĝis en la granda konstruaĵo, kaj knaboj vizitantaj la superajn klasojn, la nomataj „sepa-anoj” kaj „oka-anoj” ankaŭ tre multe interesiĝis pri la afero. La ruĝĉemizuloj vizitis la jozef-distriktan reallernejon, kaj tial la gimnazio deziris la venkon al la Paŭlo-stratuloj. Eĉ kelkaj rekte la honeston de la lernejo dependigis al tiu venko.

– Kio okazis hodiaŭ al vi? – senpacience demandis sinjoro profesoro Rácz. – Vi movadas vin, vi estas distremaj, vi pensadas pri alio!

Sed li ne plu esploris, kio okazis al la knaboj. Li kontentiĝis, ke la klaso hodiaŭ havas maltrankvilan tagon. Per grumblema voĉo li diris:

– Ja alvenis printempo, la kugloludo, la pilkludo . . . nun ne konvenas la lernejo! – Kaj li minacis la knabojn: – Jam mi donos al vi!

Sed li nur diris. Sinjoro profesoro Rácz estis severaspekta, sed mildanima viro.

– Eksidu! – li diris al tiu, kiu respondis, kaj komencis serĉadi en la notlibro.

Tiaokaze ĉiam estis morta silento en la klaso. Ĉiu retenis la spiradon, eĉ tiu, kiu bone preparis sin, kaj rigide rigardis la fingrojn de la profesoro, kiuj malrapide

foliumis la paĝojn en la malgranda notlibro. La knaboj eĉ tion sciis: kies nomo sur kiu paĝo troviĝas. Kiam la profesoro foliumis la finon de la notlibro, la knaboj kies nomo komenciĝis per la literoj A kaj B, ekspiris. Kiam poste el la fino de la nomaro subite li refoliumis al la literoj R, S, T, ekhavis bonhumoron.

Li serĉadis en la nomaro, kaj poste mallaŭte diris:

– Nemecsek.

– Li ne estas ĉi tie! – kriegis la tuta klaso. Kaj voĉo – bone konata Paulo-strata voĉo aldonis: – Li estas malsana.

– Kian malsanon li havas?

– Li malvarmumis.

Sinjoro profesoro Rácz trarigardis la klason, kaj nur diris:

– Kial vi ne atentis?

La Paŭlo-stratuloj sin interrigardis. Ili bone sciis, kiel kaj kial ne atentis pri si

Nemecsek. Dise ili sidis en la klaso, iu en la unua vico, iu en la tria, eĉ Csónakos – oni ne povas nei – en la lasta, sed nun ili sin interrigardis. Sur ĉiu vizaĝo estis legeble, ke Nemecsek malvarmumis pro bela afero. Simple dirite: pro la patrujo malvarmumis la kompatinda Nemecsek, trifoje li baniĝis, foje pro hazardo, foje pro honesto kaj foje pro devo. Kaj eĉ por la tuta mondo neniu perfidus la grandan sekreton, sed jam nun ĉiu sciis tion, ankaŭ la mastikoklubo. Eĉ movado ekestis en la mastikoklubo por forviŝi la nomon de Nemecsek el la nigra libro. Nur provizore ili ne povis interkonsenti pri tio, ĉu antaŭe korekti la minusklajn komencliterojn per grandaj, aŭ forviŝi la tutan nomon sen ĉia granda farado. Ĉar Kolnay, kiu ankoraŭ estis prezidanto, diris, ke sen granda farado ili forviŝu la tutan nomon, kompreneble Barabás formis partion,

kiu debatis por tio, ke unue ili devas redoni la honoron al lia nomo.

Sed tio nun estis flanka problemo. La atenton altiris la milito, kiun hodiaŭ posttagmeze ili devos finbatali. Post la latina klashoro amase venis fremdaj knaboj al Boka kaj proponis, ke ili venos helpi. Boka al ĉiuj respondis jene:

– Mi multege bedaŭras sed ni ne akceptas vian proponon. Ni mem defendos nian patrion. Se la ruĝĉemizuloj eble estos pli fortaj ol ni, kontraŭe ni estos pli lertaj. Kiel ajn estos, sed ni volas militi solaj.

Tiom granda estis la interesiĝo, ke ne nur la lernantoj de la aliaj klasgrupoj anoncis sin, je la unua, kiam ili kuregis hejmen por tagmanĝi, ankaŭ la homo vendanta la turkmielon, kiu ankoraŭ estis sub la apuda pordego, proponis sian servon al Boka:

– Sinjorido – li diris –, se mi iros tien, mi sola elĵetos ilin ĉiujn.

Boka ridetis:

– Nur lasu tion por ni, maljunulo!

Kaj ankaŭ li rapidis hejmen. En la pordego de la lernejo la samklasanoj ĉirkaŭstaris la Paŭlo-stratanojn, kaj per ĉiaj utilaj konsiloj provizis ilin. Ankaŭ tiaj troviĝis, kiuj instruis al kelkaj Paŭlo-stratanoj, kiel oni faligi per piedo. Aliaj proponis sin spionoj. Ankaŭ aliaj petis pri permeso rigardi la batalon. Sed eĉ tio ne estis permesata. La severa ordono de Boka estis, ke je la komenco de la milito oni devas fermi la pordon, kaj nur tiam devas ĝin denove malfermi la pordo-gardistoj, kiam jam ili premos la malamikaron eksteren.

Sed ĉio ĉi daŭris nur kelkajn minutojn. La knaboj disiĝis, ĉar precize jam je la dua ili devis esti sur la grundo. Kaj je la kvarono post la dekdua la ĉirkaŭaĵo de

la gimnazio estis senhoma, ankaŭ la turkmielvendanto pakados, kaj nur la lernejpedelo pipfumis mallaŭte antaŭ la pordego, dume kelkfoje moke li alparolis la turkmielvendanton:

– Nu, ankaŭ via vivo ne estos longa ĉi tie, en la najbareco. Ni forigos vin de ĉi tie kun tiuj multaj malpuraĵoj!

La turkmielvendanto tute ne respondis, nur levadis la ŝultrojn. Li estis granda sinjoro, li havis sur la kapo ruĝan fezon, li kun simpla lernejpedelo eĉ ne interparolis. Speciale tiam, kiam li sentis, ke tiu simpla lernejpedelo estas prava.

Kaj precipe je la dua, kiam Boka kun la ruĝverda ĉapelo de la Paŭlo-stratuloj sur la kapo aperis en la pordego de la grundo, laŭ soldata vico staris la tuta armeo en la mezo de la grundo. Estis tie ĉiu, la tuta societo, nur unu ano mankis: Nemecsek, kiu kuŝis hejme malsana.

Tiel okazis, ke la armeo de la Paŭlo-stratuloj dum la tago de la milito, ĝuste dum la tago de la milito restis sen senrangulo. La ĉeestantoj ĉiuj estis leŭtenantoj, ĉefleŭtenantoj, kapitanoj.

Mem la senrangulo, la vera armeo kuŝis hejme en iu ĝardeno domo de Rákos-strato, en ĝia malgranda lito, malsana.

Boka tuj eklaboris. Per soldata voĉo li diris:

– Atentu!

Ĉiuj kunfrapis la kalkanojn. Boka laŭtsone diris:

– Jen, mi sciigas vin, ke mi abdikas pri la prezidanta rango, ĉar tio estas bona nur dum paca tempo. Nun estas milito, do mi alprenas la generalan titolon.

En tiu minuto ĉiu estis tre emociita. Kaj vere edifa, preskaŭ historia minuto estis, kiam la tagon de la milito, dum la

tempo de plej gravaj danĝeroj, Boka alprenis la generalan titolon.

Poste li aldiris:

– Kaj nun, lastan fojon mi klarigos la militplanon, por ke poste estu nenia miskompreno.

Kaj li klarigis ĝin; kvankam ĉiuj sciis jam parkere ĉiun vorton de la militordono, tamen ili streĉe atentis.

Kaj tiam ĉio estis finita, komandis la estro:

– Ĉiu al sia loko!

Subite la vico disiĝis, nur Csele, la eleganta Csele restis apud Boka, kiu anstataŭ la malsana Nemecsek plenumis la oficon de adjutanto. Sur la flanko pendis kuprotrumpeto, kiun per komuna elspezo ili aĉetis por unu floreno kaj kvardek krajceroj, en kiu sumo estas ankaŭ la tuta havaĵo, dudekses krajceroj de la mastiko-klubo, kiujn la militestro simle konfiskis por militelspezoj.

Ĝi estas bela poŝtist-trompeto, kaj se oni priblovis ĝin, ĝi sonis, kvazaŭ trompeto de soldatoj. Entute nur tri signalojn havis la trumpeto. Unu el ili signifis, ke venas la malamikoj, la dua signifis la atakon, kaj la tria havis tiun signifon, ke ĉiu rapidu al la generalo. Ĉi tiujn signojn ankoraŭ dum la hieraŭaj ekzercojn lernis la knaboj.

La gardanto, kiu laŭ sia devo grimpis sur la supron de la palisaro, kaj sian dekstran piedon elpendigis al la Paŭlostrato, ekkriis:

- Sinjoro generalo!
- Nu, kio?
- Humile mi anoncas, servistino kun letero volas veni en la grundon.

25. LETERO DE GERÉB

La gardanto, kiu laŭ sia devo grimpis al la supra parto de la palisaro, kaj sian dekstran piedon elpendigis al la Paŭlostrato, ekkriis:

– Sinjoro generalo!

– Nu, kio?

– Humile mi anoncas, servistino kun letero volas veni en la grundon.

– Kion ŝi serĉas?

– Ŝi diras, ke ŝi serĉas la sinjoron generalon.

Boka iris al la palisaro:

– Rigardu ŝin bone, ĉu ŝi ne estas ruĝĉemizulo, vestita en virina vestaĵo por spionadi.

La gardanto klinis sin en la straton tiel, ke preskaŭ li defalis. Poste li anoncis:

– Sinjoro generalo, humile mi anoncas, bone mi pririgardis ŝin. Ŝi estas vera virino.

– Se ŝi estas vera virino, ŝi povas eniri.

Kaj li iris por malfermi la pordon. La vera virino envenis, kaj ĉirkaŭrigardis sur la grundo. Efektive ŝi estis vera virino. Sen tuko, nur en pantofloj ŝi kuris ĉi tien, kiel ĵus ŝi lavis la kuirejon.

– De familio Geréb mi portis leteron – ŝi diris.

– La sinjorido diris, ke ĝi estas tre urĝa, kaj estos respondo . . .

Boka malfermis la leteron, kiu estis adresita „Al altestimata sinjoro prezidanto Boka” kaj verdire ĝi ne estis letero, sed vera pakaĵo. Estis en ĝi ĉiuspecaj paperoj: kajerpapero, leterpapero, peceto da leterpapero de lia fratino, folio, ĉio, tutfine skribitaj per grandaj malbelegaj literoj, kaj precize estis numerata ĉiu paĝo. Li trallegis ĝin. En la letero estis la jeno:

Kara Boka!

*Mi ja scias, ke eĉ per letero vi ne
volonte interparolas kun mi, sed ĉi
lastan rimedon mi ankoraŭ provas antaŭ
kiam poreterne mi disiĝus de vi. Nun
jam mi vidas, ne nur tion, ke mi eraris,
sed ankaŭ tion, mi konfesas, ke vi
meritis de mi ne tion, ĉar tiom belege vi
konduitis kontraŭ mia patro, precipe
Nemecsek, kiu neis la perfidon. Mia
patro estis tiom fiero, ĉar la perfido ne
estis pruvita kontraŭ mi, ke tuj tiutage li
aĉetis por repacigi min la libron
„Flamanta maro” de Julio Verne, kiun
jam delonge mi petis. La libron mi tuj
portis donace al Nemecsek, kvankam mi
ankoraŭ ne tralegis ĝin, kvankam mi tre
ŝatus legi ĝin, kaj la alian tagon mia
patro demandis: „Kie estas la libro
fripono?” kaj mi povis respondi nenion,
kaj mia patro diris: „Sentaŭgulo, jam vi*

vendis ĝin al antikvaĵisto, atendu, neniam plu vi ricevos de mi ion! – kaj li jam komencis, ĉar mi ne ricevis tagmanĝon, sed mi ne bedaŭras, se la kompatinda Nemecsek senkulpe suferis pro mi, nun ankaŭ mi volonte iom toleras senkulpe pro li. Sed tion mi skribas al vi nur akcesore, ĉar ne tio estas la ĉefa afero, kion mi volas diri. Hieraŭ en la lernejo, kie vi ne volis paroli kun mi, pri tio mi pensadis, kiel mi povus reĝustigi mian eraron. Kaj fine mi eltrovis manieron: ĝuste tiel mi reĝustigos, kiel mi faris ĝin. Pro tio tuj post tagmanĝo, kiam malĝoje mi foriris de vi, ĉar vi ne volis reakcepti min, rekte mi iris en la botanik-ĝardenon, por ke mi eksciu ion por vi. Mi imitis Nemecsek-on, ĉar en la insulo mi grimpis sur la arbon, sur kiu foje li kaŭradis dum la tuta posttagmezo, kompreneble tiam, kiam ankoraŭ el la ruĝĉemizuloj neniu estis sur la insulo.

Finfine ĉirkaŭ la kvara horo ili alvenis, kaj tre blasfemis kontraŭ mi, kion tre bone mi aŭdis sur la arbo, sed nun jam mi ne bedaŭris tion, ĉar denove mi sentis min Paŭlo-stratulo, kiel ajn mi elĵetis min, kaj mian koron mi ne povis elĵeti, ĉar per ĝi mi sentas kun vi, kaj tion eĉ tio ne ĝenas, se vi priridaĉas min, sed preskaŭ mi ploris pro ĝojo, kiam Franĉjo Áts diris: „tiu Geréb tamen apartenas al ili, li ne estas vera perfidulo, ĉar ŝajnas, ke eĉ ĝis nun la Paŭlo-stratuloj sendis lin ĉi tien, inter nin por spionadi.” Kaj ili okazigis grandan kunsidon, kaj mi atendis pri ĉiu vorto. Ili diris, ke nun jam ili ne povas veni hodiaŭ por batali, ĉar Nemecsek ĉion spionis, ĉar vi preparis vin. Sed ili decidis, ke nur morgaŭ okazos la batalo. Sed ankoraŭ iun grandan ruzaĵon ili elpensis. kaj pri tio ili parolis tiom mallaŭte, ke du branĉojn mi devis grimpi malsupren sur la arbo, por ke mi

povu aŭdi, kion ili parolas. Kiam tiamaniere mi grimpis iom malsupren, ili aŭdis la krakadon, kaj Wandauer diris: „Ĉu tiu Nemecsek denove estas sur la arbo?” Sed tio estis nur ŝerco, ĉar feliĉe eĉ ne rigardis sur la arbon, sed eĉ se ili supren rigardus, ili ne vidus min, ĉar tiom densa estis jam la foliaro sur la arbo. Do ili decidis, ke morgaŭ tute tiel ili atakos vin, kiel vi scias, ke Nemecsek subaŭskultis. Ĉar Franĉjo Áts diris: „Ili nun kredas, ke ni ŝanĝos la militplanon, ĉar Nemecsek ĉion aŭdis. Sed ni ne ŝanĝos ĝin, ĝuste pro tio, ĉar ili pensos, ke ni ŝanĝos ĝin.” Tion ili decidis. Poste ili faris ekzercadon, kaj mi en la plej granda danĝero kaŭris sur la arbo ĝis la duono post la sesa, vi ja povas imagi, kio okazus, se hazarde ili povus rimarki min. Jam apenaŭ mi povis teni min per la brakoj, se je la duono post la sesa ili ne forirus, verŝajne tiome mi malfortiĝus, ke mi falus inter ilin,

*kavazaŭ matura abrikoto, de la branĉoj
granda arbo, kvankam mi ne estas
abrikoto kaj ĝi ne estas abrikot-arbo.
Sed tio estas nur ŝerco, ĉar ĉefa punkto
estas tio, kion mi skribis antaŭe. Poste
je la duono post la sesa kiam la insulo
fariĝis malplena, mi ankaŭ grimpis
malsupren de la arbo, kaj iris hejmen,
apud sola kandelo mi devis lerni la
latinan lecionon, ĉar mi perdis la tutan
posttagmezon. Kara Boka, kaj nun jam
mi petas al vi nur pri unu afero. Estu
bonvola, kaj kredu, ke estas vere, kion
mi skribis kaj ne kredu, ke tio estas nur
mensogo, kaj ke mi volas vin erarigi,
kvazaŭ ruĝĉemizula spiono. Tion mi
skribas nur pro tio, ĉar mi volas reiri al
vi, kaj volas meriti vian pardonon. Mi
estas via fidela soldato, eĉ min ne
ĝenos, se vi eksigos min de mia
ĉefleŭtanta rango, ĉar Nemecsek estas
malsana kaj nur la hundo de Janó estas
la ununura senrangulo, sed ankaŭ ĝi*

estas plie milithundo, kaj mi almenaŭ estas knabo. Se nun ankoraŭfoje vi pardonos kaj reakceptos min, tiam mi jam hodiaŭ venos al vi, kaj en la milito batalos kun vi, kaj en la ardo de la milito tiome distingigos min, ke por tio ĉian mian kulpon mi reĝustigos. Mi tre petas vin, sendu sciigon per Maria, ĉu mi venu aŭ ne, kaj se vi sciigos, ke mi venu, tiam mi venos tuj, ĉar dum Maria estas interne ĉe vi kun la letero, dum tiu tempo mi staros ĉi tie en la pordego n-o 5 de Paŭlo-strato, kaj atendas la respondon. Mi restas via fidela amiko

Geréb.

Kiam Boka atingis la finon de la letero, li sentis, ke Geréb ne mensogas, kaj tiel li reĝustigis, ke estas inde reakcepti lin. Do li signe vokis la adjutanton Csele.

– Adjutanto – li diris al li –. blovu la trumpetsignon numeron tri, kio signifas, ke ĉiu venu al la generalo.

– Kio estas la respondo, mi petas? – demandis la servistino Mária.

– Vi devos iome atendi, Maria – respondis per ordona voĉo la generalo.

Kaj eksonis la malgranda trompeto, post kies akra sono time ekaperis la knaboj el la steroj. Ili ne komprenis, kio estas tio, pro kio vokas ilin la trompeto al la generalo. Sed post la momento kiam ili vidis, ke Boka staras trankvile, ili kuraĝis veni antaŭen, kaj post minuto denove staris la tuta armeo antaŭ la generalo laŭ soldata disciplino. Boka laŭtleĝis la leteron, kaj demandis:

– Ĉu ni reakceptos lin?

26. MILITSENDITARO

La knaboj, kial nei, estas bonaj knaboj.
Ĉiuj respondis samtempe:

– Jes.

Boka turnis sin al la servistino kaj respondis:

– Diru al li, ke li venu ĉi tien. Tio estas la respondo.

La servistino Maria admiris la tutan aferon, la armeon, la ruĝverdajn ĉapojn, la armilojn. . . . Sed poste ŝi eliris tra la pordeto.

– Richter! – kriis Boka, kiam ili restis solaj. Richter elpaŝis la vicon.

– Geréb-on mi ordonos apud vin – diris la generalo –, kaj vi atentis lin. Se la unuan suspektindan signon vi rimarkos ĉe li, tuj vi kaptos kaj fermos lin en la kabanon. Mi ne kredas, ke tio okazos. Sed tamen estas bona iom da singardeno. Ripozu! Hodiaŭ ne okazos

milito, kiel ni ankaŭ povas vidi el la letero. Ĉio, kion mi planis por hodiaŭ, restos por morgaŭ. Se ili ne ŝanĝos militplanon, ankaŭ ĉe ni restos do ĉio kiel antaŭe.

Ĝuste li volis daŭrigi, kiam la pordegon, kiun post la servistino riglis neniu, nun iu piedfrapis, kaj Geréb kun brilantaj vangoj, feliĉe ensaltis tra ĝi, kiel iu, kiu finfine povas enmeti siajn piedojn sur la teron de la Promeso. Sed kiam li rimarkis la tutan armeon, li serioziĝis. Li pasis al Boka, kaj dum la ĝenerala atento levis sian manon al la ĉapo. Sur lia kapo estis la ruĝverda ĉapo de la Paŭlo-stratuloj.

Li salutis kaj diris:

– Sinjoro generalo, mi prezentas min.

– Bone – diris Boka sen ceremonio. – Al Richter vi estas postenigita, provizore kiel senrangulo. Poste mi vidos, kiel vi kondutos dum la tago de la

batalo, kaj tiam vi povos rericevi vian rangon.

Kaj li turnis sin al la armeo:

– Al vi ĉiuj plej severe mi malpermesas, ke vi al Geréb parolu pri la afero. Li volas reĝustigi sian eraron, kaj ni pardonos lin. Neniu fitraktu lin eĉ per unu vorto, lian eraron ne riproĉu.

Kaj ankaŭ al li mi malpermesas, ke li mem parolu pri tio, ĉar tio nun estas finita.

Poste fariĝis muta silento. La knaboj denove diris en si mem:

– Tamen saĝa knabo estas tiu Boka, li meritas, ke li estu generalo.

Kaj Richter tuj komencis klarigi al Geréb, kion li devas fari morgaŭ en la batalo. Boka parolis kun Csele. Kaj dum ili tiel parolis, la gardanto, kiu ankoraŭ nun rajdis super la palisaro, subite enĵetis sian dekstran piedon, kiun ĝis nun li elpendigis sur la straton. Lia

vizaĝo vestis teruran esprimon, kaj timigite li balbutis:

– Sinjoro generalo . . . venas la malamikoj!

Boka kvazaŭ fulmo saltis al la pordego, kaj rigardis ĝin. Ĉiu rigardis al Geréb, kiu staris mortpala apud Richter. Boka severe alkriis lin:

– Ĉu tamen vi mensogis? Ĉu denove vi mensogis?

Geréb pro surprizo ne povis respondi. Richter kaptis lian brakon.

– Kio estas tio? – kriegis Boka.

Tre malfacile ion balbutis Geréb:

– Eble . . . eble ili rimarkis min supre sur la arbo . . . kaj tiel ili volis min erarigi . . .

La gardanto elrigardis sur la straton, kaj poste desaltis la palisaron, kaj stariĝis en la vico ĉe la aliaj.

– Venas la ruĝĉemizuloj – li diris.

Boka iris al la pordego, kaj malfermis ĝin. Kuraĝe li stariĝis antaŭ la pordego, sur la strato. Vere venis la ruĝcemizuloj. Sed ili estis nur trio. Venis la du Pásztor-oj kaj Szebenics. Kaj kiam ili rimarkis Boka-n, Szebenics tiris malgrandan blankan standardon el sub sia jakto, kaj per ĝi donis signon al Boka. Jam de malproksime li kriis:

– Senditoj ni estas!

Boka reiris en la grundon. Iom li hontis antaŭ Geréb, ĉar tiom subite li prisuspektis lin. Li diris al Richter:

– Lasu lin. Venas nur senditoj, kun blanka standardo. Pardonu, Geréb.

Geréb, la kompatinda, ekspiris. Jam preskaŭ li falis en kaptilon senkulpe. Sed la gardanto estis riproĉata.

– Kaj vi – alkriis lin Boka –, bone rigardu, kio okazas, ankaŭ kiam vi krias fajron. Vi timema azeno! Kaj li komandis:

– Malantaŭen, ĉiu inter la sterojn. Kun mi restos ĉi tie neniue, krom Csele kaj Kolnay. Ekiru!

La armeo per soldataj paŝoj foriris, kaj baldaŭ malaperis malantaŭ la steroj, kun Geréb. Ĝuste tiam malaperis la lasta ruĝverda ĉapo, kiam la senditoj frapis sur la pordego. La adjutanto malfermis ĝin. Ili envenis. Ĉiu havis ruĝan ĉemizon kaj ĉapon. Ili venis senarmile, kaj Szebenics alten levis la blankan standardon.

Boka sciis, kio decas ĉi-okaze. Li prenis sian lancon, kaj apogis ĝin al la palisaro, por ke ankaŭ li ne havu armilon. Kolnay kaj Csele senvorte sekvis lian ekzemplon. Csele estis eĉ tiom fervora, ke ankaŭ la trompeton li metis sur la grundon.

La pli aĝa Pásztor antaŭen paŝis:

– Ĉu mi havas la honoron al la sinjoro militestro?

Csele respondis:

– Jes li estas la generalo.

– Ni venis estiel senditoj – diris Pásztor –, kaj mi estas la senditestro. Pro tio ni venis, ke en la nomo de nia militestro, Franĉjo Áts, ni deklaru militon al vi.

Kiam la nomo de la estro estis menciita, ĉiu sendito salutis. Pro ĝentilo ankaŭ la Paŭlo-stratuloj metis siajn manojn al la ĉapoj. Pásztor daŭrigis:

– Ni ne volas surprizi la kontraŭulojn. Ni venos precize je la duono post la dua. Tion ni volis diri. Ni petas respondon.

Boka sentis, ke tiu momento estas gravega. Iom tremis lia voĉo, kiam li respondis:

– La militdeklaron ni akceptas. Sed pri io ni devas decidi. Mi ne volas, ke de tio fariĝu tumultbatalo.

– Ankaŭ ni ne volas tion – diris Pásztor obtuze, kaj kiel kutime li klinis la kapon al sia brusto.

– Mi volas – daŭrigis Boka –, ke entute estu nur tri batalmanieroj. Sablobomboj, laŭregula lukto, kaj lancoduelo. Vi scias bone la regulojn, ĉu ne?

– Jes.

– Kies ambaŭ ŝultroj tuŝas la grundon, tiu estas venkita, kaj ne rajtas plu batali. Sed tamen estas permesate batali per la aliaj du manieroj. Ĉu vi konsentas?

– Jes.

– Kaj per la lanco estos permesate nek batali nek piki. Oni devas skermi.

– Bone.

– Kaj duope kontraŭ unu oni ne rajtas ataki. Sed taĉmentoj kontraŭ taĉmentoj rajtas ataki. Ĉu vi akceptas?

– Jes.

– Tiam mi havas nenion plu por diri.

Li salutis. Ankaŭ Csele kaj Kolnay starantaj kun kunfrapitaj piedoj, salutis. La senditoj reciprokis la saluton, kaj Pásztor denove ekparolis:

– Ankoraŭ ion mi devas demandi. Nia estro komisiis al ni demandi, kiel fartas Nemecsek. Ni aŭdis, ke li estas malsana. Kaj se li estas malsana, tiam ni havas la komision viziti lin, ĉar pasintokaze tre kuraĝe li agis ĉe ni, kaj tiajn malamikojn ni alte estimas.

– Li loĝas en la Rákos-strato, en la tria numero. Li estas tre malsana.

Tion sekvis muta saluto. Szebenics denove alten levis la standardon, Pásztor ekkriis:

– Ekiru! – kaj la senditoj elmarŝis tra la pordego. Sur la strato ili ankoraŭ aŭdis la trumpetsonon, per kiu la generalo vokis ĉirkaŭ sin la armeon, por ke li rakontu la okazintaĵojn.

Kaj la senditoj rapide marŝis al la Rákos-strato. Antaŭ la domo, en kiu loĝis Nemecsek, ili haltis. Sub la pordego staris knabineto, ili demandis al ŝi:

– Ĉu en ĉi tiu domo loĝas iu certa Nemecsek?

– Jes – diris la knabineto kaj kondukis ilin al la malriĉa partera loĝejo, en kiu loĝis Nemecsek. Apud la pordo estis ladtabuleto blue pentrita kun la jena surskribo: *Andreo Nemecsek, tajloro*.

Ili enpaŝis, salutis. Ili diris, pro kio ili venis. La patrino de Nemecsek, malriĉa blonda virino, kiu tre similis al sia filo – aŭ pli ĝuste dirite: al kiu tre similis ŝia filo – kondukis ilin en la ĉambron, kie la senrangulo kuŝis en la lito. Szebenics ankaŭ ĉi tie alten levis la blankan standardon. Kaj ankaŭ ĉi tie Pásztor antaŭen paŝis:

– Francjo Áts sendas al vi saluton, kaj li deziras resaniĝon.

La blonduleto, kiu pale, kun hirta kapo kuŝis sur la kuseno, pro tiu vorto sidiĝis en la lito. Li ridetis feliĉe, kaj la jeno estis lia unua demando:

– Kiam okazos la milito?

– Morgaŭ.

Pro tio li malĝojiĝis.

– Tiam mi ankoraŭ ne povos esti tie – li diris malgaje.

Sed la senditoj respondis nenion. Laŭvice ili manprenis kun Nemecsek, kaj la malhela sovaĝaspekta Pásztor emociite diris:

– Kaj pardonu min.

– Mi pardonas – diris mallaŭte la blonduleto, kaj li komencis tusadi. Li rekuŝiĝis sur la kusenon, kaj Szebenics ordigis sub lia kapo la kusenon. Poste diris Pásztor:

– Nu, nun ni foriras.

La knabo standardon portanta denove levis ĝin, kaj ĉiuj eliris en la kuirejon. Tie la patrino de Nemecsek plorante diris:

– Vi ĉiuj . . . vi ĉiuj estas tiom bonaj, bravaj knaboj . . . ke tiome vi amas mian kompatinda fileton. Tial . . . tial . . . vi ĉiiuj tri nun ricevos tason da ĉokolado . . .

La senditoj rigardis unu la alian. La ĉokolado estis alloga afero. Sed tamen Pasztor paŝis antaŭen, kaj nun foje li ne klinis sian kapon sur la bruston, sed levis sian belan brunan kapon, kaj fiere diris:

– Pro tio ni ne rajtas ricevi ĉokoladon. Ekiru! – Kaj ili elmarŝis.

(OKA PARTO)

27. SORTO DE FORPRENITA STANDARDO

BELEGA, printempa estis la tago de la milito. Matene pluvis, kaj en la lernejo dum la paŭzo la knaboj malĝoje elrigardis tra la fenestroj. Ili opiniis, ke la pluvo forbalaos la tutan militon. Sed ĉirkaŭ la tagmezo ĉesis pluvi, kaj sennubiĝis la ĉielo. Je la unua jam brilis la dolĉa printempa sunradio, sekiĝis la pavimo, kaj kiam la knaboj hejmeniris el la lernejo, denove estis varme, kaj freŝaj odorojn portis la venteto el la Buda-aj montoj.* Tia vetero estis la plej bela vetero por batalo, kian oni povas deziri. En la fortikaĵoj malsekiĝis la amasigita sablo, sed ĝis posttagmezo iom ĝi sekiĝis. Tial la bomboj estis pli uzeblaj.

Granda estis la kurado je la unua horo. Ĉiu kuregis hejmen, kaj la trikvaronoj post la unua jam la tuta armeo svarmis sur la grundo. Kelkaj ankoraŭ havis panon restintan el la tagmanĝo en la poŝo, kaj el ĝi ili manĝadis. Sed nun jam ne estis granda la ekscito kiel hieraŭ. Hieraŭ ili ankoraŭ ne sciis, kio okazos. Sed la apero de la senditoj forigis la eksciton, kies lokon okupis nun serioza atendado. Nun jam ili sciis, kiam oni venos, kaj kia estos la milito. En ĉiu bolis la militemo, kaj jam ili ŝatus esti en la ardo de la batalo. Sed en la lasta duonhoro Boka faros ŝanĝon en la militplano. Kiam la knaboj kolektiĝis, surprize ili vidis, ke antaŭ la fortikaĵoj 4-a kaj 5-a etendiĝas granda profunda fosaĵo. La pli timemaj tuj pensis, ke ĝin faris la malamikoj, kaj per demandoj ili atakis Boka-n:

– Ĉu vi vidis tiun fosaĵon?

– Jes.

– Kiu faris ĝin?

– Jano, hodiaŭ frumatene, je mia ordono.

– Por kio estas ĝi?

– Per tio estas ŝanĝita la militplano.

Li rigardis siajn notojn, kaj vokis la komandantojn de la batalionoj A kaj B:

– Ĉu vi vidas ĉi tiun fosaĵon?

– Jes, ni vidas ĝin.

– Ĉu vi scias, kio estas remparo?

Ili ne sciis tion.

– La remparo estas... – diris Boka –, estas por tio, ke la armeo kaŝu sin en ĝi, estu kaŝita de la malamikoj, kaj nur en la vera minuto ĝi komencu la batalon. La militplano ŝanĝiĝas, ĉar vi ne staros ĉe la Paŭlo-strata pordo. Mi konstatis, ke tio ne estas bona. Vi kun ambaŭ batalionoj kaŝos en la remparfosaĵo. Kiam tiu parto de la malamikoj envenos tra la pordego, la fortikaĵoj tuj

komencos la ĵet-atakadon. La malamikoj iros al la fortikaĵoj, ĉar ili ne vidos la remparon, ĉe la malsupra parto de la steroj. Kiam ili estos je kvin paŝoj de la remparo, vi elmetos viajn kapojn, kaj de tie subite ekatakos ilin per sablo. Dume la fortikaĵoj senĉese plu ĵetatakados. Tiam vi ekkuregos el la ramparo, kaj metos vin al la malamikaro. Vi ne pelos ilin tuj al la pordego, sed atendos, ĝis ni venkos la Maria-stratan parton, kaj nur tiam, kiam mi trompetsignaligos atakon, tiam pelu ilin al la pordego. Post la momento kiam la Maria-stratan parton ni premis en la kabanon, la soldataro de la fortikaĵoj 1-a kaj la 2-a kuregos en la ceterajn fortikaĵojn, kaj nia Maria-strata armeo venos por helpi vin. Do vi nur haltigos ilin. Ĉu vi komprenas?

– Jes.

– Kaj tiam mi signaligos la atakon. Tiam ni jam estos duoble tiom, ol ili, ĉar la duono de ilia armeo tiam estos jam en

la kabano. Kaj laŭ la leĝoj ĉe taĉment-
atakoj ne estas malregule, se ni estas pli
multaj. Nur ĉe persona atako ne estus
permesata batali du kontraŭ unu.

Kiam li diris tion, Jano iris al la
ramparo, kaj ordigis ĝin per kelkaj
pioĉtranĉoj. Poste ankoraŭ ĉaron da
sablo li verŝis en ĝin.

Dume la soldataro de la fortikaĵoj
vigle laboradis, tien kaj reen kuradis sur
la steroj. La steroj tiel estis faritaj, ke el
inter la ŝtipoj nur la kapo de la knaboj
estis videblaj. Ili ekklinis sin, malaperis,
jen revidebliĝis. Ili faris la sablajn
bombojn. Sur ĉiu fortikaĵa supro flirtigis
la vento ruĝverdan standardon, nur ĉe la
tria angulfortikaĵo mankis la standardo.
Tiu estis la mankanta standardo, kiun
Franĉjo Áts forportis. Al ĝia loko ili ne
metis alian, ĉar ili volis repreni ĝin en la
batalo.

Ankoraŭ ni povas ja rememori, ke tiu standardo trapasinta multajn travivaĵojn lastfoje estis ĉe Geréb. Unue ĝin forportis Franĉjo Áts. Kaj la ruĝĉemizuloj kaŝis ĝin en la botanikĝardeno fortikaĵo. De tie ĝin forportis Nemecsek, kies malgrandaj piedsignojn oni rimarkis en la polvo. Dum tiu memorinda vespero, kiam la blonduleto subite falis inter la ruĝĉemizulojn, la Pásztoroj tordis ĝin el lia mano, kaj ĝi estis remetita inter la tomahaŭkojn, en la sekretan arzenalon de la ruĝĉemizuloj. De tie laste Geréb forportis, por agi favore al la Paŭlostratuloj. Sed jam tiam diris Boka, ke ili ne bezonas reŝtelitan standardon. Honeste ili volas reakiri ĝin.

Do hieraŭ apenaŭ foriris el ilia regno la senditoj de la ruĝĉemizuloj, ekiris la senditoj de la Paŭlostratuloj kun la standardo al la botanik ĝardeno.

En la botanikgardeno ĝuste tiam estis granda strategia konferenco, kiam ili alvenis. Csele komandis la senditaron, kiu konsistis el Weisz kaj Csónakos. Ĉe Csele estis la blanka standardo, kaj Weisz portis la ruĝverdan standardon, kiu estis volvita en gazetpapero.

La gardantoj ekstaris antaŭ ili sur la ponto.

– Haltu, kiuj vi estas?

Csele tiris el sia jako la blankan standardon, kaj alten levis ĝin. Sed eĉ ne vorton li diris. La gardantoj sciis, ke tiaokaze kio estas la kutimo. Do ili kriis sur la insulon:

– Huja! Hopp! Fremduloj estas ĉi tie!

Pro tio Franĉjo Áts iris sur la ponton. Li jam sciis, kion signifas la blanka standardo. Li enlasis la senditojn sur la insulon.

– Ĉu vi venis kiel senditoj?

– Jes.

– Kion vi volas?

Csele antaŭen pasis:

– Ni reportis la standardon, kiun vi forprenis de ni. Jam ĝi estis ĉe ni, sed tiamaniere ni ne bezonas ĝin. Kunportu ĝin morgaŭ en la militon, kaj se ni povos forpreni de vi, tiam ni forprenos ĝin. Se ne, tiam ĝi restos la via. Tion sciigas nia generalo!

Li signis al Weisz, kiu tre serioze elpaperigis la standardon, kaj antaŭ la transdono kisis ĝin.

– Arzenalisto Szebenics! – kriis Áts.

– Li ne estas ĉi tie! – aŭdiĝis el la maldensejo.

Csele ekparolis:

– Ĵus li estis ĉe ni kiel sendito.

– Vere – diris Francjo Áts –, tion mi forgesis. Do venu la anstataŭa arsenisto.

Branĉoj de arbetoj disiĝis, kaj la eta, lerta Wendauer aperis antaŭ la estro.

– Transprenu la standardon de la senditoj – li diris -, kaj lokigu ĝin en la arsenalon.

Kaj li turnis sin al la senditoj.

– En la milito la standardon portos arsenalisto Szebenics. Tio estas mia respondo.

Csele denove volis levi la blankan standardon por signi la foriron, kiam denove ekparolis la ruĝcemizula estro:

– La standardon – li diris –, verŝajne Geréb reportis al vi.

Estis silento. Neniu respondis.

Ĉu demandis:

– Ĉu Geréb reportis ĝin?

Csele kunfrapis la kalkanojn:

– Pri tio mi ne havas komision! –diris soldate, poste li alkriis siajn soldatojn: – Atentu! Ek-iru!

Kaj ili forlasis la estron. Ne vane oni diris pri Csele, ke li estas dando, ne vane

estis Csele eleganta knabo, sed oni devas konfesi, ke tion li faris soldatmaniere. Li havis inklinon perfidi neniun al la malamikoj, eĉ ne perfidulon.

Kaj Franĉjo Áts en tiu minuto estis iom superita. Wendauer staris tie kun la standardo, kaj gapis. Poste kolere alkriis lin la estro:

– Kial vi gapas? Portu la standardon al sia loko!

Wendauer ŝteliris, kaj dume pensis: „Tamen estas bravaj knaboj ĉi tiuj Paŭlo-stratanoj! Jen, tiu jam estas la dua el ili, kiu superis la teruran Franĉjo Áts!”

Tiel revenis al ili la standardo. Kaj tial ne estis standardo sur la tria fortikaĵo.

[* Buda estas okcidenta parto de
Budapeŝto. Ĝi estas plenplena de
montoj.]

28. PEJZAĜO ANTAŬ BATALO

La gardantoj jam sidis sur la palisaro. Unu el ili sidis sur la Maria-strata palisaro, la alia sur tiu de la Paŭlo-strata. El inter la steroj, el la rapidanta, troagema, aranĝanta aro Geréb rapidis antaŭen. Li starigis sin antaŭ Boka, kaj kunfrapis la kalkanojn:

– Al sinjoro generalo mi humile anoncas, ke mi havas peton.

– Kion?

– Sinjoro generalo hodiaŭ ordonis, ke mi iru en la 3-an fortikaĵon, kiel fortikaĵ-arteliano, ĉar ĝi estas ĉeangula kaj plej danĝera. Kaj ankaŭ pro tio, ĉar malhavas la standardon, kiun foje mi jam portis ĉi tien.

– Jes. Kaj kion vi volas?

– Mi volas peti, ke mi povu iri al pli danĝera loko, ol tiu. Mi jam ŝanĝis kun Barabás, kiu estas ordonita en la

remparon. Li estas bona ĵetanto, li estos utila en la fortikaĵo. Kaj mi volas militi libere, el la remparo, en la unua vico. Bonvolu permesi.

Boka rigardmezuris lin:

– Tamen vi estas brava knabo, Geréb.

– Ĉu vi permesas?

– Jes.

Geréb salutis, sed restis tie, antaŭ la generalo.

– Nu, kion ankoraŭ vi volas? – li demandis al Geréb.

– Mi volas diri nur tion – respondis iom embarasite la fortikaĵ-arteliano –, ke mi ĝojis, kiam vi diris: „*tamen* brava knabo vi estas, Geréb.”

Boka silentis. Poste li diris: – Pro tio ne mi estas kulpa. Vi estas ties kaŭzo. Sed nun ne sentimentaliĝu. Returnen ekiru. Iru al via loko.

Kaj Geréb formarŝis. Ĝoje li rampis en la remparon, kaj tuj komencis fabriki bombojn el la melseka sablo. Kaj el la remparo rampis malpura figuro. Estis Barabás. Li kriis al Boka:

– Ĉu vi permesis?

– Jes! – rekriis la generalo.

Do ili ankoraŭ ne tre multe kredis al Geréb. Tio estas la sorto de tiu, kiu estis malfidela. Eĉ tiam li estas kontrolata, kiam li diras la veron. Sed la vorto de la generalo forigis ĉiun dubon. Barabás grimpis sur la angulfortikaĵon, kaj estis videbla de malsupre, kiam ĉe la estro de la fortikaĵo salutante li anoncis sin. Sed en la sekvinta minuto jam ambaŭ ekklinis siajn bubajn kapojn malantaŭ la fortikaĵon. Ankaŭ ili laboris. Piramidforme ili metis la bombojn.

Tiel pasis kelkaj minutoj. En la okuloj de la knaboj tiuj kelkaj minutoj ŝajnis

kelkaj horoj, kaj la senpacienceco tiome kreskis, ke aŭdiĝis tiaj krioj:

- Eble ili pripensis?
- Ili ektimis!
- Ili preparas insidon.
- Ili ne venos!

Kelkajn minutojn post la dua horo la adjutanto trarajdis ĉiujn militpostenojn per tiu ordono, ke finiĝu ĉiu bagatela peno, ĉiu starigu sin „kalkankunfrapita”, ĉar la generalo faros lastan kontrolon. Kaj kiam ĉe la lasta militposteno la adjutanto anoncis tion, ĉe la unua jam aperis Boka mute, severe. Unue li pririgardis la Maria-stratan armeon. Tie ĉio estis en ordo. La du batalionoj staris rigide, dekstre-maldekstre ĉe la granda pordego. La komandantoj antaŭen paŝis.

– Estas en ordo – diris Boka. – Vi scias vian devon, ĉu ne?

- Ni scias. Ni ŝajnigos forkuron.
- Poste . . . de malantaŭe.

– Jes, sinjoro generalo.

Poste li ekzamenis la kabanon. Li malfermis la pordon, kaj la grandan rustan ŝlosilon de ekstere li metis en la seruron. Eĉ li turnis ĝin en la seruro, ĉu en ĝi funkcias. Poste li pririgardis la tri unuajn fortikaĵojn. Po du soldatoj staris sur ĉiu fortikaĵo. La sablobomboj estis pretaj, metitaj piramidforme. En la tria fortikaĵo estis trioble tiom bomboj, ol en la aliaj. Ĝi estis la ĉeffortikaĵo. Ĉi tie tri artilerianoj kunfrapis la kalkanojn, kiam la generalo aperis. En la fortikaĵoj 4, 5 kaj 6 estis rezervbomboj.

– Ilin ne tuŝu – diris Boka –, ĉar la rezervo estas por tio, ke ni povu ĵetataki, se mi ordonas al la artilerianoj de la aliaj fortikaĵoj veni ĉi tien.

– Jes, sinjoro generalo.

En la kvina fortikaĵo tiom granda estis la ekscito kiam la generalo alvenis tie, ke la tro fervora artileriano alkriegis lin:

– Haltu, kiu vi estas?

La alia puŝis lin ĉe kokso. Kaj Boka kriis al li:

– Ĉu eĉ vian generalon vi ne rekonas? Azeno!

Poste li aldiris:

– Tian soldaton estus plej bone tuj mortpafi.

La ekscitita artileriano morte ektimis. Subite li eĉ ne enkapigis, ke tio estas ne tro verŝajna, ke oni lin mortpafos. Eĉ ankaŭ Boka ne atentis pri tio, ke nun li parolis malsaĝaĵon, kio okazis ĉe li nur tre malofte.

Li iris plu, kaj atingis la remparon. En la profunda fosaĵo kaŭris Geréb, kun feliĉa rideto sur la lipoj. Boka stariĝis sur la monteto de la remparo.

– Knaboj – li kriis entuziasme –, de vi dependas la milito! Se vi povos retenigi la malamikojn, ĝis la Maria-strata armeo finos kun ili, ni estos gajnintaj la

militon! Tion bone fiksi en la memoro!
Laŭta kriego respondis el la fosaĵo. La
kaŭrantaj figuroj ardiĝis. Ridindaj
figuroj ili estis, kiam en la remparfosaĵo
ili kriegis kaj flirtigis la ĉapojn, sen tio,
ke ili elstarus.

– Silenton! – kriis la generalo.

Kaj li iris al la mezo de la grundo. Tie
jam atendis lin Kolnay kun la trompeto.

– Adjutanto!

– Je via servo!

– Ni devas iri al tiu loko, de kie ni
povos vidi la tutan batalon. La
militestroj kutime rigardas la militon de
montetpinto. Do ni grimpos sur la
kabantegmenton.

En la sekva minuto ili jam staris sur la
kabano. La suno ekbrilis sur la trompeto
de Kolnay, kaj tio donis tre militan
aspekton al la adjutanto. La artilerianoj
el la fortikaĵoj montris unu al la alia:

– Rigardu . . . :

Kaj tiam aperis el la poŝo de Boka la teatra lorneto, kiu jam foje rolis en la botanika ĝardeno. Ĝian rimenon li pendigis sur la ŝultron, kaj en tiu momento nur per etaj apenaŭaj nuancaj eksterajoj li diferencis de Napoleono la granda. Li estis militestro, ververe. Kaj ili atendis.

Al historiologo decas preciza kronologio, do ni notu precize, ke ses minutojn poste aŭdiĝis trompetosono de la Paŭlo-strato. Kaj pro tiu sono oni komencis moveti sin.

— Ili venas! — oni donis de buŝo al buŝo. Boka iomete paliĝis.

— Nun! — li diris al Kolnay. — Nun decidiĝos la sorto de nia grundo.

Post kelkaj minutoj ambaŭ gardantoj desaltis la supron de la palisaro, kaj kurante klopodis al la kabano, sur kies supro staris la generalo. Antaŭ la kabano ili haltis kaj salutis.

– Venas la malamikaro.

29. LA UNUA ATAKO

– Reiru! – kriis Boka, kaj ambaŭ gardantoj rekuregis. Unu en la remparon, alia al la Mária-strata armeo. Boka levis la lorneton al siaj okuloj, kaj mallaŭte diris al Kolnay:

– Metu la trompeton al via buŝo.

Ankaŭ tio okazis. Poste Boka subite forprenis de siaj okuloj la lorneton, ruĝo verŝis lian vizaĝon, kaj per entuziasma voĉo li diris:

– Blovu!

Kaj eksonis la trompetsigno. Antaŭ la du pordegoj de la regno haltis la ruĝĉemizuloj. Sur ĝiaj arĝentpintaj lancoj fajreris la sunbrilo, en siaj ruĝaj ĉemizoj, ruĝaj ĉapoŝi ili aspektis, kvazaŭ ruĝaj diabloj. Ankaŭ ilia trompeto blovis alarmon, kaj nun la aero estis plena per ekscitiga trompetsono. Kolnay blovis:

„Tata . . . tra . . . trata . . .”, sonis konstante de la kabantegmento.

Boka nun serĉis Franĉjon Áts per la lorneto. Li ekkriis:

– Tie li estas . . . ĉe la Paŭlo-strato. . . . Ankaŭ Szebenics estas kun li . . . tie li portas la nian standardon . . . fortan laboron havos la Paŭlo-strata armeo!

Venantojn de la Mária-strato komandis la pli aĝa Pásztor. Ruĝan standardon ili flirtigis. Kaj sonegis la tri trumpetoj senĉese. Kaj la ruĝĉemizuloj staris ĉe la pordegoj en fermitaj batalvicoj.

– Ion ili planas –, diris Boka.

– Egale! – kriis la adjutanto, por momento ĉesigante la trumpetadon. Sed en la sekvinta minuto li jam plu blovis, plenplene: „Tata . . . tra . . . trara . . .”

Poste subite eksilentis la trumpetoj de la ruĝĉemizuloj. Venantoj de la Mária-strato eksplodeigis egan militkrion:

– Huja hopp! Huja hopp!

Kaj ili enkuregis tra la pordego. La niaj dum momento starigis antaŭ ili, kvazaŭ ili volus komenci la militon, sed jam en la sekvinta minuto per sovaĝa kuro ili ekkuregis, kiel ordonis la militplano.

– Brave! –kriis Boka. Poste subite li rigardis al la Paŭlo-strato. La armeo de Franĉjo Áts ne envenis tra la pordo. Staris la armeo kvazaŭ palisaro, antaŭ la malfermita pordo, sur la strato.

Boka ektimis:

– Kio estas?

– La ruzo –, diris Kolnay tremante. Kaj denove ili rigardis maldekstren. La niaj kuris, kaj la ruĝĉemizuloj kriegante ĵetis sin post ilin.

Nun Boka, kiu ĝis nun serioze , kvazaŭ ektime rigardis la senokupan divizion de Franĉjo Áts, subite tiaĵon faris, pri kio ĝis nun lia vivo ne havis ekzemplon. Li ĵetis alten sian ĉapon,

ekkriis, ekdancis sur la supro de la kabano, kvazaŭ li frenezigus, tiel, ke la putraĵo preskaŭ disfalis sub ili.

– Ni estas savitaj! – li kriis.

Li ĵetis sin al Kolnay, ĉirkaŭbrakis kaj kisis lin. Poste li ekdancis kun li. La adjutanto komprenis nenion. Surprize li demandis:

– Kio estas? Kio estas?

Boka montris tien, kie Franĉjo Áts staris kun sia armeo, senmove:

– Ĉu vi vidas?

– Jes.

– Nu, ĉu vi ne komprenas?

– Ne.

– Ho, vi malsaĝa . . . ni estas savitaj. Ni venkis! Kaj vi ne komprenas?

– Tute ne!

– Ĉu vidas, ke ili staras senmovaj?

– Tion certe mi vidas!

– Ili ne envenas . . . atendas.

– Mi vidas.

– Do kial ili atendas? Kion ili atendas? Ili atendas, ke la divizio de Pásztor estu preta en la Maria-strato. Kaj ili nur tiam atakos. Tion mi tuj rimarkis, kiam estis videbla, ke ili ne atakos samtempe! Ni havas la feliĉon, ke ili faris la saman militplanon, kiel ni. Tion ili volis, ke Pásztor elpelu la duonon de nia armeo, la Mária-stratan, kaj tiam la alian duonon ili atakos samtempe: Pásztor de maldekstre, Franĉjo Áts de antaŭe. Sed tion ili ne vidos! Venu!

Kaj ili jam ekgrimpis malsupren.

– Kien?

– Nur venu kun mi. Ĉi tie ni havas nenion por rigardi, ĉar ili ja ne moviĝos. Ni iru por helpi la Maria-stratan armeon!

La Maria-strata armeo belege faris sian aferon. Tien kaj reen ili kuradis antaŭ la maŝindomo, ĉirkaŭ la

morusarbo. Ruze ili agis, ĉar ili eĉ kriadis:

- Ve! Ve!
- Ni pereis
- Ni estas venkitaj!

La ruĝĉemizuloj kriegante pelis ilin. Nun Boka atentis nur tion, ĉu ili iros en la kaptilon. Ĉar la niaj malaperis malantaŭ la maŝindomo. La duono de la armeo rifuĝis en la veturilejon, la alia duono en la kabanon.

Pásztor donis la ordonon:

- Post ilin! Kaptu ilin!

Kaj la ruĝuloj kuregis post ilin, malantaŭ la maŝindomon.

- Blovu! – kriis Boka.

Kaj la trompeto esksonis, signante, ke la fortikaĵoj komencu la ĵetatakon. Kaj triumfa krio de akraj voĉoj venis el la unuaj tri fortikaĵoj. Obtuzaj sonoj aŭdiĝis.

La sablaj ĵetaĵoj ekflugis. Boka estis ruĝa kaj tremis tutkorpe.

– Adjutanto! – li kriis.

– Jen.

– Kuregu al la ramparo, kaj diru, ke ili atendu. Ili nur atendu. Se mi blovonordonos atakon, nur tiam ili komencu. Kaj ankaŭ la Paŭlo-strataj fortikaĵoj atendu!

– Kaj la adjutanto jam kuris. Sed ĉe la fortikaĵo li kuŝiĝis ventre kaj malantaŭ la monteto de la ramparo surventre rampante li iris antaŭen ĝis la remparo, por ke la malamikoj starantan ankoraŭ senmove en la pordego ne rimarku lin. Flustre li transdonis la ordonon al la unua knabo, kaj poste li, kiel venis surventre rampante reiris al la generalo.

– En ordo –li anoncis.

Malantaŭ la maŝindomo la aero estis plena per kriegoj. La ruĝĉemizuloj kredis, ke ili jam venkis. La tri fortikaĵoj

brave ĵetatakis ilin, kaj malhelpis, ke ili grimpu sur la sterojn. En la flankaj fortikaĵoj, en la fama tria fortikaĵo, Barabás senvestiĝinta ĝisĉemize batalis, kvazaŭ leono. Li faris nenion alian, nur celis la pli aĝan Pásztor-on. Unu post la alia pafonis la molaj sablobomboj sur la nigra kapo de Pásztor. Kaj kun ĉiu bombo ekkriis Barabás: Jen frateto!

– La mola sablo ŝutiĝis en la okulojn, buŝon de Pásztor, kiu kolerege ternadis.

– Atentu, mi venos! – li kriis laŭtege.

– Nur venu! – kriis Barabás, li celis kaj ĵetis. Denove pleniĝis per sablo la buŝo de la ruĝĉemizulo. Ega vivuo eksplodis sur la fortikaĵoj.

– Manĝu sablon! – kriis Barabás entuziazme, kaj per ambaŭ manoj li ĵetis la bombojn, ĉiujn al Pásztor. Kaj ankaŭ la aliaj du knaboj ne estis maldiligentaj. La angulfortikaĵo tiel laboris, ke estis ĝojo rigardi ĝin. Kaj la infanteria armeo

mute kaŭris en la veturilejo, atendente la ordonon por la antaŭenkuro. La ruĝĉemizuloj nun jam estis ĉe la malsuproj de la fortikaĵoj, kaj faris plej ardan batalon. Pásztor denove donis ordonon: – Ek! Sur la sterojn!

– Puf! – kriis Barabás, kaj trafis la nazon de la estro.

– Puf! – transprenis la devizon ankaŭ la aliaj fortikaĵoj, kaj sur la kapojn de la ruĝĉemizuloj ili ĵetis veran sablotorenton.

Boka kaptis la brakon de Kolnay.

– Estas elĉerpita la sablo – li diris –, mi vidas de ĉi tie. Jam ankaŭ Barabás jetas nur per unu mano, kvankam en la angulfortikaĵo estis trioble tiom . . .

Vere, kvazaŭ nun estus malfortiĝanta la ĵetatakado.

– Kio estos? – demandis Kolnay.

Boka nun jam estis trankvila:

– Ni venkos!

En tiu momento la dua fortikaĵo ĉesis la atakon. Verŝajne elĉerpiĝis la sablo.

— Jen la momento! — kriis Boka. — Kuregu en la veturilejon. Ili ataku!

Li mem saltis al la kabano. Li ĵetmalfermis la pordon kaj enkriis:

— Sturmo!

Kaj en la sama momento kuris antaŭen la du batalionoj, unu el la veturilejo, la alia el la kabano. Ĝustatempe ili alvenis. Unu piedo de Pásztor jam estis sur la fortikaĵo. Ili kaptis ĝin kaj tiris lin malsupren. La ruĝĉemizuloj nun embarasiĝis. Ili kredis, ke la kuranta armeo rifuĝis malantaŭ la sterojn, kaj ke la fortikaĵoj estas por ne enlasi la malamikojn inter sterojn. Kaj jen, subite malantaŭe atakis ilin tiuj, kiuj ankoraŭ iom pli frue kuris *antaŭ ili* . . .

Seriozaj militraportantoj, kiuj partoprenis verajn militojn diras, ke la plej granda danĝero de la milito estas la

embaraso. La militestroj centojn da kanonoj ne timas tiome, kiome eĉ etan embarason, kiu dum momento kutimas kreski al ĝenerala konfuzo. Kaj se la veran, kanonan, pafilan armeon malfortigas la embaraso, kiel povus ja eligi sin el tiu konfuzo kelkaj etaj infanterianoj vestitaj en ruĝaj gimnastikĉemizoj?

Ili ne komprenis la aferon. En la unua momento eĉ tion ili ne sciis, ĉu la malamikoj estas la samaj, kiuj antaŭ ne longe malaperis de ili. Ili kredis, ke ĝi estas nova armeo. Nur post kiam kelkajn ili rekonis, ili vidis, denove tiuj estas kontraŭ ili.

— De kie el sub la tero ili venis? — ekkriis Pásztor, dum du fortaj manoj kaptis lian piedon, kaj tiris lin de sur la fortikaĵo.

Nun ankaŭ Boka batalis. Li elektis iun ruĝĉemizulon, kaj komencis lukti

kontraŭ li. Dum la lukto Boka malrapide kaj lerte prenis lin al la kabano. La ruĝĉemizulo vidis en tiu momento, ke li ne sukcesos venki Boka-n. Do li ekpensis, kaj faligis Boka-n per la piedo. Sur la fortikaĵoj, kie oni priatentis tiun par-batalon, eksonis protesto:

– Honte!

– Li faris piedfaligon!

Boka falis pro la manovro. Sed jam en la sama momento li estis denove surplande. Li alkriis la ruĝulon:

– Vi faris piedfaligon! Tio rompas la leĝon!

Li signis al Kolnay, kun li dum momento ili portis la baraktantan ruĝulon en la kabanon. Boka ŝlosis la pordon post li. Spiregante li diris:

– Li estis malsaĝa. Se li luktus laŭleĝe, mi ne povus venki lin. Sed tiel rajtas duope batali kontraŭ li . . .

Kaj li rekuregis en batalvicon, kie jam disiĝinte po paro luktis la soldatoj. La malmultan sablon, kiu ankoraŭ restis en la du unuaj fortikaĵoj, uzis la artilerianoj por ĵeti ĝin sur la luktantaj malamikoj. La fortikaĵoj, kies frontoj estis ĉe la Paŭlo-strato, silentis.

Kolnay ĵus volis eklukti, kiam Boka alkriegis lin:

– Ne luku! Iru portu la ordonon, ke la soldatoj de la unua kaj dua fortikaĵoj transiru en la kvaran kaj kvinan fortikaĵojn!

Kolnay boris sin tra la vicoj de luktantoj, kaj portis la sciigon. De la du unuaj fortikaĵoj baldaŭ malaperis la standardoj, ĉar ankaŭ ilin kunportis la knaboj en la novan fronton.

Kaj unu post la alia sonis la trompet-signoj. Sed la plej laŭta sonis, kiam Pásztor, la terura, nevenkebla Pásztor, esis ĉirkaŭbrakita de Csónakos, kaj

portita al la kabano. Forpasis nur minuto, kaj Pásztor jam kun senpova furiozo frapbruis sur la muro de la kabano, sed de interne.

Pro tio eksplodis laŭta kriego. La armeo de la ruĝĉemizuloj sentis sian pereon. Ili tute konfuziĝis, kiam la estro malaperis el inter ili. Nun jam nur ili esperis, ke la divizio de Franĉjo Áts rebonigos ilian malvenkon. kaj la ruĝĉemizuloj unu post la alia estis trenitaj en la kabanon, dum konstante laŭtsonaj triumfkrioj, kiuj estis aŭdeblaj ankaŭ ĉe la Paŭlo-strata sojlo.

30 LA DUA ATAKO

Franĉjo Áts, kiu promenis tien kaj reen antaŭ la fronto, kun fiera rideto diris:

– Ĉu vi aŭdas? Baldaŭ ni ricevos la signalon.

Nome tio estis la konsento inter la ruĝĉemizuloj, ke Pásztor ekblovigos la trumpeton, kiam ili finos en la Mária-strato, kaj tiam Pásztor kaj Franĉjo Áts atakos samtempe. Sed tiam jam la eta Wendauer, kiu estis la trumpetisto de la armeo de Pásztor, frapbruis kun la aliaj en la kabano, kaj lia trumpeto ŝtupita per sablo trankvile, silente kuŝis en la tria fortikaĵo, inter la aliaj militrabaĵoj. . . .

Dum tio okazis ĉi tie, ĉirkaŭ la maŝindomo kaj kabano, Franĉjo Áts admonis siaj soldatojn:

– Nur estu paciencaj. Se ni ekaŭdos la trumpetsignon, antaŭen!

Sed la tre atendita trumpetsigno nur ne venis. La kriego, kriado konstante fariĝis malpli laŭta, eĉ sendube tiel aŭdiĝis, kvazaŭ ĝi venus de fermita loko . . . kaj kiam la du ruĝverdĉapaj batalionoj premis la lastan ruĝĉemizulon en la kabanon, kaj kiam pro tio eksplodis plej fortega triumfkrio, kiun la grundo ĝis nun aŭdis en sia vivo, ĉe la bataliono de Franĉjo Áts nervoza sinmovado estis rimarkebla. La pli juna Pásztor elpaŝis la vicon:

– Mi kredas – li diris –, pasis ia malbono.

– Kial?

– Ĉar tio ne estis ilia voĉo, tio estis fremda voĉo.

Franĉjo Áts orelumis. Vere, li ankaŭ tiel aŭdis, ke tio estas muziko de fremdaj gorgoj. Tamen li ŝajnigis trankvilon.

– Ne okazis al ili malbono. – li diris –, ili batalas mallaŭte. La Paŭlo-stratuloj kriadas, ĉar ili estas en danĝero.

En tiu momento, kvazaŭ tio okazus nur por refuti Franĉjon Áts, klare aŭdebla „vivu” eksonis de la Maria-strato.

– Ej, ha! – diris Franĉjo Áts –, tio estis vivuado.

La pli juna Pásztor diris ekscitite:

– Kiu estas en danĝero, tiu ne vivukrias. Eble ni ne devus kredi certe, ke la armeo de mia frato venkos. . . .

Kaj Franĉjo Áts, kiu estis saĝa knabo, nun jam sentis, ke li ne sukcesis pri sia kalkulo, ĉar nun jam li mem devos batali kontraŭ la tura armeo de la Paŭlo-stratuloj. Kaj lia lasta espero, la tre atendita trumpetsigno nur ne eksonis. . . .

Sed anstataŭ ĝi eksonis alia trumpetsigno. Sono de nekonata

trompeto, kiu estis adresita al la armeo de Boka. Ĝi signifis, ke la armeo de Pásztor ĝis la lasta homo estas kaptita, enŝlosita, kaj la atako nun komenciĝos de la grundo. Kaj efektive, post la trumpetsigno disiĝis la Maria-strata armeo, kaj ĝia unua parto ĉe la kabano, kaj ĝia alia parto apud la 6-a fortikaĵo aperis, en iom ĉifitaj vestaĵoj, sed kun brilanataj okuloj, en triumfanta bonhumoro, arditaj en triumfanta milito.

Nun jam certe sciis Franĉjo Árs, ke la armeo de Pásztor estis venkita. Dum unu aŭ du minutoj li rigide interrigardis kun la du ĵus venintaj batalionoj, kaj subite turnis sin al la pli juna Pásztor. Ekscitite li diris:

– Sed se ili estas venkitaj, kie ili estas? Se oni elpremis ilin en la straton, kial ili ne rapidas al ni?

Ili rigardis al la Paŭlo-strato, Szebenics kuregis eĉ ĝis la Mária-strato.

Nenie estis ili. Veturilo ŝargita per brikoj trairis la Mária-straton, kaj kelkaj pasantoj iris pro siaj aferoj.

– Nunie estas iu! – anoncis senespere Szebenics.

– Sed kio okazis al ili?

Kaj nur nun li ekmemoris pri la kabano.

– Oni enŝlosis ilin! – li kriis trankvilperdinte pro kolero.

– Oni venkis, kaj ŝlosis ilin en la kabanon!

Kaj nun – anstataŭ la ĵusa refuto – pruviĝis lia eldiro.

Obtuza bruo aŭdiĝis de la kabano. La enŝlositaj perpugne batis la tabulon. Sed vane. La kabaneto nun subtenis la Paŭlo-stratulojn. Ĝi lasis faligi nek sian pordon, nek sian flankon. Forte ĝi kontraŭstaris la pugnobatojn. Kaj la kaptitoj aranĝis en ĝi inferan koncerton. Per la kriego ili volis altiri la atenton de

Franĉjo Áts. Kompatinda Wendauer, de kiu oni forprenis la trumpeton, faris el siaj manon funelon, kaj per ĝi trumpetis per la tuta forto de sia gorĝo.

Franĉjo Áts turnis sin al la armeo.

– Knaboj – li kriis –, Pásztor malvenkis! Dependas de ni la savo de la ruĝĉemiza honoro! Antaŭen!

Kaj kiel ili staris en ununura larĝa vico, enmarŝis sur la grundon, kaj kurpaŝe atakis. Sed Boka nun jam denove staris kun Kolnay sur la kabantegmento, kaj la sub iliaj piedoj frapantan, bruantan, laŭtegan infermuzikon superante li kriis:

– Ekblovu la trueton! Sturmo! Fortikaĵoj ekbombardu!

Kaj la ruĝĉemizuloj kurantaj al la remparfosaĵo subite retiris sin. Laŭvice kvar fortikaĵoj komencis bombardi ilin. Dum momento kovris ilin la sablobombo, ili ne vidis.

– Rezervo antaŭen! – kriis Boka.

La rezervo antaŭen kuris, en la polvonubo, al la atakanta vico. En la remparfosaĵo ankoraŭ senfare kaŭris la infanteria armeo, kaj atendis, kiam ili sekvos. Kaj el la fortikaĵoj bombo post bombo ĵetiĝis la batalantoj, kaj pli ol unu el ili disfrakasiĝis sur la dorso de la Paŭlo-stratuloj.

– Faras nenion! – ili kriis. – Antaŭen!

Iĝis granda nubo el polvo. Kiam en la fortikaĵoj elĉerpiĝis la bomboj, plenmane ili ĵetadis la sekan sablon. Kaj meze de la grundo apenaŭ dudek paŝojn de la remparfosaĵo furiozis, svarmis la du armeoj, kaj el la polvonubo nur jen tie – jen ĉi tie elbrilis ruĝa ĉemizo aŭ ruĝverda ĉapo.

Sed tiu ĉi armeo jam estis laca, dum la armeo de Franĉjo Áts per ripozinta forto komencis la batalon. Kaj dum minutoj ŝajnis, kvazaŭ la batalantoj venus pli

proksime al la remporfosaĵo, kaj tio signifis, ke iliaj soldatoj ne povas haltigi la ruĝĉemizulojn. Ju pli proksimiĝas al la fortikaĵoj, des pli precize trafis la bomboj. Barabás denove okupis sin pri la estro. Nun li bombardis Franĉjon Áts.

– Faras nenion – li kriis. – Manĝu ĝin! Nur sablo!

Li staris sur la fortikaĵo, kvazaŭ rapidmana diableto, rikanante, forte ekkriante, dume fulmrapide kliniĝis por novaj kaj novaj bomboj. La rezervo de Franĉjo Áts vane kunportis sablon en saketoj, ili ne povis uzi ĝin, ĉar nun ĉiu homo estis bezonata en fronto. Do ili forĵetis la sakojn.

Dume entuziasmige, ekscitite, konstante sonis ambaŭ trompetoj: tiu de la Kolnay sur la kabano kaj tiu de la pli juna Pasztor en la svarmanta amaso. Nun jam ili estis nur dek paŝojn de la remparfosaĵo.

– Nu, Kolnay – kriis Boka –, nun montru, kion vi kapablas fari. Iru malsupren en la remparon, ne ĝenu vin la bomboj, kaj tie malsupre blovu por alarmo. Ekbombardu la remparfosaĵo, kaj kiam ĝia sabloprovizo estos elĉerpita, ĝi antaŭkuru!

– Haho! Ho! – kriis Kolnay, kaj saltis de la kabansupraĵo. Nun li jam ne rampis surventre, sed kun supretenita kapo kuris al la remparo. Boka kriis post lin, sed lian voĉon subpremis la frapbatado de la infero, bolanta sub liaj piedoj, kaj la konstanta trompetado, kriadado de la armeo de Franĉjo Áts. Li nur rigardis post lin, li rigardis, ĉu li povis porti la sciigon en la remparon, antaŭ kiam la ruĝĉemuizuloj rimarkos la sinkaŝantojn en la fosaĵo.

Fortika figuro eliĝis inter la batalantoj, kaj saltis al Kolnay. Li kaptis lian manon, kaj ekluktis kun li. Finite. Kolnay ne povis plenumi la ordonon.

– Mi mem iros! – kriis malsupren Boka, ankaŭ li desaltis la kabanon, kaj kuris al la remparfosaĵo.

– Haltu! – kriis al li Franĉjo Áts.

Li devus akcepti la batalon kun la malamika estro, sed per tio eble li riskus ĉion. Do li kuregis plu al la fosaĵo.

Franĉjo Áts post lin.

– Vi estas malkuraĝa! – li alkriis lin. – Vi forkuras de mi! Sed estu certa, mi atingos vin!

Kaj vere li atingis lin, ĝuste en tiu minuto, kiam Boka saltis en la remparon. Nur tiom da tempo li havis, ke li povu ekkrii:

– Komencu la ĵetatakon!

Kaj la kontraŭvenanta Franĉjo Áts en la sekva minuto ricevis samtempe eble dek freŝajn bombojn sur lian ruĝan ĉemizon kaj ruĝan vizaĝon.

– Diabloj vi estas! – li kriis – Ĉu nun vi atakas el sub la tero?

Sed tiam jam sur la tuta linio evoluis la artileria atako. La fortikaĵoj bombis de supre, la remparo de malsupre. Pluvegis la sablo, kaj en la bruon nun miksiĝis freŝaj voĉoj. Ankaŭ la remparo eksonis, kiu ĝis nun devis esti silenta. Boka opiniis alveninta la momenton por la lasta atako. Li mem stariĝis sur la rando de la remparo, ekprenis, kaj alten tenis la ruĝverdan standardon, kaj donis la lastan ordonon:

– Plena atako! Antaŭen!

Kaj vere el sub la tero venis nova armeo. Ŝturmpaŝe ili atakis, kaj zorge atentis pri tio, ke ili ne komencu duopan lukton. En fermitaj vicoj ili iris al la ruĝĉemizuloj, kaj premis ilin for de la remparo.

Barabás kriis desur la fortikaĵo:

– Ne estas sablo!

– Venu malsupren! Atako! – Boka respondis kurante, kaj manoj, piedoj

aperis sur la muroj de la fortikaĵoj, kaj malsupren grimpis la artilerio. Ĝi estis la dua fermita fronto, kiu paŝante sekvis la unuan.

Nun jam akra estis la batalo. La ruĝĉemizuloj sentante sian fiaskon, ne tre obeis la regulojn. La regulojn ili bezonis nur, dum ili kredis, ke ili venkos ankaŭ per laŭregula batalo. Sed nun ili forĵetis ĉiun fomalaĵon.

Tio estis danĝera. Eĉ tiel ili montriĝis pli persistaj, malgraŭ tio, ke nur duone tiom ili estis, kiom la Paŭlo-stratuloj.

– Al la kabano! – Kriegis Franĉjo Áts.
– Ni liberigu ilin.

31 NEMECSEK INTERPAŜAS

Kaj la tuta tumulto, kavazaŭ turnus sin, komencis antaŭen puŝiĝi al la kabano. Pri tio la Paŭlo-stratuloj ne kalkulis. Forglutis antaŭ ili la ruĝcemiza armeo. Same kiel iu martelas, kaj subite sentas, ke sub la batoj kurbiĝis la najlo, tiel kurbiĝis maldekstre la atakanta vico. Antaŭe Franĉjo Áts, sovaĝe kuranta, kun espero pri venko en sia voĉo:

– Post min!

Kaj en tiu minuto, kavazaŭ ili rulus ion antaŭ iliajn piedojn. Subite li haltis. Knaba fiĝureto saltis antaŭ lin de la kabano. Konsternite haltis la ruĝcemizula estro, kaj post li haltis, frapiĝis unu al la alia la batalanta armeo.

Knabeto staris antaŭ Franĉjo Áts, knabeto, kiu estis kaplongon pli mallonga ol li. Maldika, blonda kanabo

levis siajan manojn alten, proteste. Kaj knaba voĉo kriis:

– Haltu!

La Paŭlo-strata armeo, kiu jam ektimis pro la subita ŝanĝo, samfoje per laŭta voĉo ekkriis:

–Nemecsek!

Kaj la blonduleto, maldikosta, malsana kanabo en tiu minuto kaptis la grandan Franĉjon Áts, kaj per ega fortostreĉo, al kiu nur lia febro, lia pulsanta febro, lia senkonscio donis al lia kompatinda korpeto la forton, la surprizantan estron laŭregule ĵetis teren.

Poste ankaŭ li falis sur lin.

En tiu ĉi minuto ĉiu ordo ĉesis inter la ruĝĉemizuloj. Kvazaŭ oni detranĉus ilian kapon: kiam ilia estro falis, ankaŭ ilia sorto estis sigelita. La dumminutan embarason eluzis la Paŭlo-stratuloj. Ili kunbrakiĝis, faris grandan ĉenon, kaj prenis eksteren la ruĝĉemizan armeon.

Franĉjo Áts malrapide relevis sin, kaj kun kolera ruĝa vizaĝo, kun brilantan okuloj rigardis ĉirkaŭen. Li senpolvigis sian veston, kaj vidis, ke li restis sola. Lia armeo svarmis jam ĉirkaŭ la pordego, miksite kun la triumfantaj Paŭlo-stratuloj, kaj li staris ĉi tie sola, venkita.

Apud li sur la tero kuŝis Nemecsek.

Kaj kiam la lastan ruĝĉemizulon ili elpremis tra la pordego, kaj la pordegon ŝlosis post ili, ebriiga triumfo sidis sur la vizaĝoj. Laŭtis la vivuado. Kaj Boka kurante venis kun la slovako de la maŝindomo. Li alportis akvon.

Kaj nun ĉiuj kolektiĝis ĉirkaŭ la eta Nemecsek kuŝanta sur la tero, kaj morta silento ŝanĝis la ĵus muĝintan vivuadon. Franĉjo Áts staris aparte, kaj malĝoje rigardis la venkintojn. En la kabano ankoraŭ nun frapbruis la kaptitoj.

Sed ja kiu nun zorgis pri ili?

Jano zorge levis desur la tero Nemecsek-on kaj kuŝigis lin sur la monteton de la remparo. Poste ili komencis lavi per akvo liajn okulojn, frunton kaj vizaĝon. Kaj post minutoj Nemecsek malfermis siajn okulojn. Kun laca rideto li ĉirkaŭrigardis. Ĉiu silentis.

– Kio? – li demandis mallaŭte.

Sed ĉiu estis tiom korpremata, ke neniu pensis prirespondi tiun demandon. Sence ili rigardis lin.

– Kio? – li ripetis kaj sidiĝis sur la monteto.

Nun Boka iris al li:

– Ĉu vi fartas pli bone?

– Jes.

– Ĉu nenio doloras?

– Ne.

Li ridetis. Poste li demandis:

– Ĉu ni venkis?

Pri tio neniu silentis, sed ĉiu respondis. Samtempe sonis la krio sur ĉiuj lipoj:

– Ni venkis!

Neniu atentis pri tio, ke Franĉjo Áts ankoraŭ staris ĉe malsupro de stero, kaj serioze, kun malgaja kolero li rigardis la familian scenon de la Paŭlo-stratuloj.

Boka ekparolis:

– Ni venkis, kaj nun ĉe la fino preskaŭ okazis malbono; ke ne okazis malbono, tion ni povas danki al vi. Se subite vi ne aperus, kaj ne surprizus Franĉjon Áts, tiam oni liberigus la kaptitojn el la kabano, kaj mi ne scias, kio okazus.

La blonduleto kvazaŭ kolerais pro tio:

– Ne estas vere – li diras –, tion nun vi diras, por ke mi ĝoju, vi diras, ĉar mi estas malsana.

Kaj li tuŝetis sian frunton. Nun, ke revenis en lian vizaĝon la sango, denove

li estis ruĝa, estis videble sur li, ke bruligas, konsumas lin la febro.

– Nun – diris Boka –, tuj ni portos vin hejmen. Estis tre malsaĝe, ke vi venis ĉi tien. Mi ne povis imagi, kiel permesis tion viaj gepatroj.

– Ili ne permesis. Mi mem venis.

– Kiel?

– Mia patro foriris de la hejmo, li portis veston, por provo. Kaj mia patrino iris al la najbaro, por varmigi mian kuminsupon; ŝi ne ŝlosis la pordon, kaj diris, se mi bezonas ion, nur mi krii. Kaj tiam mi restis sola. Kaj mi sidiĝis sur la lito kaj aŭskultadis. Kaj mi aŭdis nenion, sed tamen mi tiel sentis, kvazaŭ mi aŭdus ion. Muĝis io en miaj oreloj, estis ankaŭ trumpetado, kriado. Mi aŭdis la voĉon de Csele, kvazaŭ li krius: „Venu Nemecsek, ĉar ni estas en danĝero!” Poste mi aŭdis, kiam vi kriis: „Ne venu Nemecsek, ne estas bezonata

por ni, ĉar vi estas malsana, ja vi povis veni, kiam ni kugloludis kaj amuziĝis, kaj nun vi ne venas, kiam ni batalas, kaj malgajnas la militon!” Tion vi diris, Boka. Mi aŭdis, kiam tion vi diris. Nu, kaj tiam mi rapide saltis el la lito. Kaj mi falis, kiam mi elsaltis, ĉar jam de tre longa tempo mi kuŝas, kaj mi tute malfortiĝis. Sed penege mi restaraĉis de la tero, kaj prenis mian veston el la ŝranko . . . kaj ankaŭ la ŝuojn, kaj rapide mi vestis min. Kaj jam mi estis vestita, kiam mia patrino envenis. Kiam mi ekaŭdis ŝiajn paŝojn, rapide mi saltis kun vestoj en la liton, kaj tiris sur min la kovrilon, tute ĝis mia buŝo, por ke ŝi ne vidu sur mi la veston. Tiam diris mia patrino: „Mi venis nur por demandi, ĉu vi bezonas ion?” Kaj mi diris: „Ne”, kaj ŝi denove eliris, kaj tiam mi forkuris de la hejmo. Sed mi ne estas heroo, ĉar mi ne sciis, ke tiom grava tio estas, ĉar mi nur envenis ĉi tien militi kun la aliaj, sed

tiam mi rimarkis Franĉjon Áts, tiam mi pensis, ke tial mi ne povas batali kun vi, ĉar li banigis min en la malvarma akvo, kaj tiam mi estis tre ĉagrena, kaj pensis: „Nu, Ernesto, nun aŭ neniam” – kaj mi fermis la okulojn kaj . . . kaj . . . alsaltis lin . . .

Kun tia ardo rakontis tion, la blonduleto, ke tute li laciĝis. Li ektusis.

– Ne parolu plu – diris Boka –, vi rakontos alian fojon. Nun ni portos vin hejmen.

Nun per helpo de Jano ili liberigis la kaptitojn unu post la alia el la kabano. Kiu ankoraŭ havis armilon, de tiu estis forprenita. Kaj laŭvice, malgaje, elpaŝadis ĉiu ĉe la Maria-strato. Kaj la nigra kamentubo nun kvazaŭ moke ŝprucadis, kraĉadis. Kaj siblis post ilin la vaporegilo, kvazaŭ ankaŭ ĝi estus amiko de la Paulo-strata armeo.

Franĉjo Áts restis lasta. Ankoraŭ li staris ĉe la malsupro de stero, kaj rigardis la teron. Kolnay kaj Csele alpaŝis lin kaj volis forpreni lian armilon.

Sed Boka diris al ili:

– Lasu la estron.

Kaj li stariĝis antaŭ Franĉjo Áts:

– Sinjoro generalo – li diris –, vi batalis heroe!

La ruĝĉemizulo malgaje rigardis lin, kvazaŭ li dirus: „Kion valoras por mi jam nun la laŭdo?”

Boka turnis sin kaj komandis:

– Salutu!

Kaj en la Paŭlo-strata armeo mutiĝis la babilado. Ĉiu levis sian manon al la ĉapo. Antaŭ ili staris rigide Boka, kun mano levita al la ĉapo. Kaj en la eta kompatinda Nemecsek ankaŭ vekiĝis la malrangulo. Malfacilege li stariĝis de la termonteto, kaj salutis. La kompatindulo

salutis al tiu, kiu estis la kaŭzo de lia grava malsano.

Kaj Franĉjo Áts reciproke la saluton, foriris. Lian armilon li kunportis. Li estis la sola, kiu povis ĝin kunporti. La aliaj armiloj: la famaj arĝentopintaj lancoj, la multaj arĝentobrilaj tomahaŭkoj kuŝis amase antaŭ la enirejo de la kabano. Kaj ĉe la tria fortikaĵo estis alfiksita la re-okupita standardo. Geréb reprenis ĝin de Szebenics dum la plej forta ardo de la milito.

32 MALĜOJA VENKO

– Ĉu Geréb estas ĉi tie? – demandis Nemecsek kun larĝe malfermitaj okuloj.

– Jes – antaŭen staris Geréb.

La blonduleto demandante rigardis al Boka. Kaj Boka respondis:

– Li estas ĉi tie, kaj reĝustigis sian eraron. Kaj ni redonos al li la ĉefleŭtenantan rangon.

Geréb ruĝiĝis.

– Dankon –, li diris.

Poste mallaŭte li aldiris:

– Sed . . .

– Kio estas tiu „sed”?

Geréb diris embarase:

– Mi scias, pri tio mi ne havas rajton, ĉar tio dependas de la generalo, sed . . . mi tiel pensas . . . mi tiel scias, ke Nemecsek ankoraŭ estas nur senrangulo.

Iĝis granda silento. Geréb pravis. En la granda ekscito ĉiu forgesis, ke tiu, al kiu jam la trian fojon povis danki ĉion, eĉ nun estas senrangulo.

– Vi pravas Geréb – diris Boka. – Kaj tuj mi aranĝos tion. Jen mi nomumas

Sed Nemecsek interrompis lin:

– Mi ne volas, ke vi nomumu min . . . ne pro tio mi agis tiel . . . ne pro tio mi venis ĉi tien . . .

Boka volis ŝajni severa. Li alkriis lin:

– Ne tio estas la ĉefa, pro kio vi venis ĉi tien, sed tio estas la ĉefa, kion vi faris, kiam vi jam estis ĉi tie. Jen mi nomumas Erneston Nemecsek kapitano.

– Vivu!

Tion kriis ĉiu samtempe. Kaj ĉiu salutis al la nova kapitano, eĉ ankaŭ la leŭtenantoj kaj la ĉefleŭtenantoj, eĉ la plej antaŭe staris mem la generalo, kaj tiel soldatmaniere li ĵetis sian manon al

la ĉapo, kvazaŭ li estas la senrangulo kaj la blonduleto la generalo.

Ili rimarkis, ke virineto vestita malriĉe malantaŭ ili trarapidis la grundon, kaj nun subite iris antaŭ ilin.

– Jesuo! – ŝi kriis. – Ĉu vi estas tie? Tuj mi sciis, ke vi venis ĉi tien!

Ŝi estis la patrino de Nemecsek. Ploris la kompatindulino, ĉar jam ĉie ŝi serĉis sian malsanan fileton, kaj ĉi tien ŝi venis nur pro tio, ke ŝi demandadu la knabojn pri li. La knaboj ĉirkaŭstaris kaj trankviligis ŝin. Kaj la kompatinda virino prenis lin, kaj sian tukegon ĉirkaŭmetis sur lian kolon, kaj portis lin al la hejmo.

– Ni akompanu ilin! – kriis Weisz, kiu ĝis nun diris eĉ ne unu vorton.

Tiu ideo plaĉis al ĉiu.

– Ni akompanu ilin! – kriis ĉiu, kaj jam ili preparis la ekiron. La rabaĵ-armilojn rapide ili ĵetis en la kabanon,

kaj la tuta gripo ĵetiĝis post la kompatinda virino, kiu premis al si la filon, por ke el la varmo de sia propra korpo ŝi donu al li iom, kaj rapide portis lin al la hejmo.

En la Paŭlo-strato ili vicigis duope, tiel ili iris post la patrino kaj la filo. Jam kovris ilin la vespero. Oni jam bruligis la lampojn, kaj el la vendejoj forta lumo radiis al la trotuaro. La homoj, kiuj sur la strato rapide iris pro siaj aferoj, ekhaltis por momento, kiam tiu stranga procesio preterpasis ilin. Antaŭe malgrasa, blonda virineto, kiu kun plorintaj okuloj iris rapide, premante al si knabeton, nur kies nazo vidiĝis el la tukego, kaj post ili armeo de soldatmaniere paŝantaj, duope viciĝintaj knaboj kun ruĝverdaj ĉapoŝoj sur la kapoj.

Estis tiuj, kiuj ridetis. Kelkaj stratbuboj laŭte priridis ilin. Sed nun ili tute ne atentis tion. Eĉ Csónakos, kiu kutimis venĝi aliokaze tian priridon tuj,

kaj plej fundamente, nun trankvile iris inter la aliaj, eĉ ne atentante la gajajn junmetiistojn. Tiu afero en aliaj okuloj estis tiom serioza kaj sankta, ke ĝin povis interrompi eĉ ne la plej gaja stratknabo de la tuta mondo.

Kaj la patrino de Nemecsek tute ne atentis la armeon. Sed ĉe la pordego de la Rákos-strata dometo ŝi devis halti, antaŭ ol ŝi enpaŝis tra ĝi, ĉar ŝia fileto rigidigis sin, kaj ne estis tera povo, kiu povus treni lin sub la pordegon. Li liberigis sin el la brakoj de la patrino, kaj starigis antaŭ la knaboj.

– Saluton –li diris.

Laŭvice ili manprenis kun li. Lia mano estis varmega. Poste li malaperis kun la patrino en la malhela subpordego. Pordo frapsonis en la korto, en fenestreto ekbrulis helo. Kaj iĝis silento.

La knaboj nur poste rimarkis, ke neniu el ili formoviĝis de la domo. Ili ne

ploris, nur rigardis, gapadis trans la korton, al tiu hela fenestro, malantaŭ kiu, la etan heroon oni nun rekuŝigis sur la liton. Fine iu ekĝemis malĝoje. Csele diris:

– Kio okazos?

Kaj tiam tri knaboj ekiris tra malhela strateto al la Ŭllői-strato. Nun jam ĉiu estis laca, lacigis ilin la milito. Malvarmeta vento vagis tra la strato, forta printempa vento, kiu elportis la malvarman spiron de la degelanta naĝo el la montoj.

Poste ekiris alia grupo malsupren al la Francisko-distrikto. Finfine neniu restis antaŭ la pordego krom Boka kaj Csónakos. Csónakos ĝene movadis sin, atendis, ke Boka ekiru. Sed ĉar Boka eĉ ne ekmovis sin, modeste li ekparolis.

– Ĉu vi venos?

Boka diris mallaŭte:

– Ne.

– Ĉu vi restos?

– Jes.

– Do . . . tiam saluton.

Kaj malrapide, ŝovpaŝade ankaŭ li foriris. Boka rigardis post lin, kaj vidis, ke li re-returnas sin. Poste li malaperis ĉe la angulo. Kaj la eta Rákos-strato, kiu modeste kuŝas apud la brua Üllői-strato, nun en mallumo, senbrue ripozis. Nur la vento tramuĝis ĝin, kaj frapis la vitrotabulojn de la gaslampoj. Pro la forta ventatako unu post la alia frapsonis ĉiu, kvazaŭ ili plu donus ian sekretan, tintsonan signon la tremantaj filtre flamantaj gasplamoj. En tiu minuto estis nenia homo en la strateto, krom generalo Johano Boka. Kaj kiam Johano Boka, la generalo ĉirkaŭrigardis sur la strato kaj vidis, ke li estas sola, jen tiome kunpremiĝis lia koro, ke Johano Boka, la generalo apogis sin al la

pordego, kaj amare, elkore, ververe ekploris.

Ankaŭ li sentis, sciis tion, kion neniu el ili kuraĝis eldiri. Ankaŭ li vidis, kiel pereas la senrangulo per malrapida, malĝoja forpaso. Li sciis, kio estas la fino, kaj li sciis, ke jam baldaŭ alvenos la fino. Nun lin ne tre interesis, ke li estas venkinta militestro, li ne bedaŭris, ke nun la unuan fojon li ne estis vireca, serioza, li ne bedaŭris, ke vekiĝis en li la infano, nur li ploradis, kaj konstante diradis:

– Mia amiketo . . . mia kara amiketo . . .
. mia kara bona kapitano . . .

Preterpaŝis homo kaj alparolis lin:

– Kial vi ploras, knabeto?

Sed li ne respondis. La homo ektiris siajn ŝultrojn kaj forlasis lin. Poste venis malriĉa virino kun granda korbo, ankaŭ ŝi haltis, sed diris nenion. Dum iom da tempo ŝi rigardis lin, poste ankaŭ ŝi

foriris. Poste venis malalta viro, kaj eniris la pordegon de la domo. De tie li rerigardis al Boka. Li rekonis lin:

– Ĉu estas vi, Johano Boka?

Boka alrigardis lin:

– Mi estas, sinjoro Nemecsek.

Li estis la eta tajloro, li portis veston sur la brako. Li estis en Buda, kien li portis por provi la duonpretan veston. Sed tiu homo jam komprenis Johanon Boka. Tiu ne demandis: „Kial vi ploras knabeto? – nek pririgardis, sed aliris lin, ĉirkaŭbrakis lian kapeton kaj komencis kunplori. Tiel, ke li vekis en Boka la generalon.

– Ne ploru, sinjoro Nemecsek, – li diris al la tajloro.

La tajloro viŝis siajn okulojn per la mansupro, kaj signis en la aero. kvazaŭ li dirus: „Ja ĉio jam estas vana, almenaŭ mi iom ploretis.”

– Dio benu vin, knabeto – li diris al la generalo. – Iru hejmen.

Kaj li eniris la korton.

Nun jam ankaŭ Boka viŝis siajn okulojn, kaj ekspiregis. Li ĉirkaŭrigardis sur la strato, kaj volis iri hejmen. Sed kvazaŭ io ne permesus al li. Li sciis, ke tio utilas nenion, sed tiel li sentis, kavazaŭ pro iu sankta, serioza devo, nun li devas resti, kaj solene gardostari antaŭ la domo, de sia mortanta soldato. Kelkajn paŝojn li faris antaŭ la pordego. Poste li transiris la alian flankon, kaj de tie rigardis la dometon.

Nun paŝoj eksonadis en la silento de la forlasita strato. „Laboristo iras hejmen” li pensis, kaj kun klinita kapo promenis sur la transa flanko. Li estis plena de ĉiaspecaj strangaj pensoj, pri kiuj ĝis nun eĉ neniam li pensis. La vivo kaj la morto vagis en lia kapo. Kaj neniam li povis orientiĝi en tiu granda demando.

La paŝoj sonis pli kaj pli proksime, sed aŭdiĝis, kvazaŭ tiu, kiu venas estus iom malrapidiginta la paŝojn. Singarde iris iu nigra ombro tute apud la domoj, kaj li haltis antaŭ la domo, kie loĝas Nemecsek. Li enrigardis tra la pordego. Eĉ por momento li eniris sub la pordegon, poste li elvenis. Li haltis. Li atendis. Poste li ekpromenis antaŭ la domo, kaj kiam la unuan fojon li venis sub gaslampon la vento disblovis la flankojn de lia jako. Boka rigardis tien. El la jako ekbrilis ruĝa ĉemizo.

Estis Franĉjo Áts.

Kaj nun rigide rigardis unu la alian la du estroj. En siaj vivoj la unuan fojon ili staris vid-al-vide. Tie ili renkontis unu la alian, antaŭ tiu malĝoja domo. La unuan alportis la koro, la alian la konscienco. Eĉ ne unu vorton ili diris unu al la alia. Ili nur rigardis unu la alian. Poste Franĉjo Áts ekiris, kaj plu rigardis tien, kaj reen antaŭ la domo. Longe, tre longe

li promenis. Ĝis la domzorganto venis el la malhela korto, por fermi la pordegon. Tiam Franĉjo Áts aliris lin, levis sian ĉapelon, kaj mallaŭte demandis ion de li. Aŭdiĝis ĝis Boka, kion respondis la domzorganto. Li diris:

– Malbone.

Kaj li ĵetfermis la grandan, malpezan pordegon. Tiu bruo vekis la silenton de la strato, sed poste ĝi formortis, kiel fulmotondro inter montoj.

Franĉjo Áts ekiris malrapide. Li iris dekstren. Kaj ankaŭ Boka jam devis iri hejmen. Laŭte fajfis la malvarma vento, kaj unu militestro iris dekstren, la alia maldekstren. Eĉ tiam ili diris eĉ ne vorton.

Kaj nun tute ekdormis la strateto en la freŝa printempa nokto, en kiu nun jam sola promenis, regis la vento, balancante la vitrojn de la lampoj, taŭzante la flavajn, brilantajn gasflamojn,

knarigante unu-du rustiĝintajn ventoflagojn. Ĝi blovis en ĉiujn fendojn. Eĉ ĝi blovis ankaŭ en tiun ĉambreton, kie ĉe la tablo sidis malriĉa, eta tajloro, apud lardo volvita en gazetpapero, mallaŭte vespermanĝante, kaj kie en eta lito spiregis eta kapitano kun varmegaj vangoj, brulantaj okuloj. Ĝi ekfrapis la fenestron, ekflirtigis la flamon de la petrollampo. La virineto kovris sian filon:

– Blovas la vento, mia fileto.

Kaj la kapitano kun malĝoja rideto, apenaŭ aŭdeble, preskaŭ flustre diris:

– Blovas de la grundo. Blovas de la kara grundo . . .

(NAŬA PARTO)

33. LA PROTOKOLO

KELKAJ paĝoj el la granda libro de la Mastiko-Klubo:

NOTO

„La hodiaŭa ĝenerala kunsido akceptis la sekvantajn decidojn kaj jen ni notas ilin en la grandan libron.”

1

Sur la 17-a paĝo de la granda libro estas noto, kiu sonas jene: ernesto nemecsek, per minuskloj. Tiu noto jen fariĝas malvalida. Ĉar tiu enskribo estiĝis pro eraro kaj jen la ĝeneralkunsido deklaras, ke la nomitan anon la klubo ofendis senkaŭze, kaj tion li honeste toleris, en la milito li partoprenis, kvazaŭ vera

heroo, kio estis historia fakto. Pro tio la klubo deklaras, ke la pasintfoja enskribo estas eraro de la klubo, kaj jen la protokolisto enskribas la nomon de la ano per majuskloj.

2

Jen mi enskribas ĝisfine per majuskloj:

ERNESTO NEMECSEK !

Leszik, protokolisto, p.m.

3

La ĝeneralkunsido de la Mastiko-Klubo unuvoĉe balotas dankon al nia Generalo Johano Boka, ĉar la hieraŭan militon li gvidis, kiel militestro en la historilibro kaj por la signo de nia estimo ni decidis, ke ĉiu ano de la Mastiko-Klubo devos hejme en la histori-libron sur la 168-a paĝo desupre

en la 4-a vico apud la nomo „Johano Hunyadi”[\[1\]](#) per inko alskribi „kaj Johano Boka”. Tion ni decidis, ĉar la militestro meritas tion de ni, ĉar se li ne farus tiom bone, tiam la ruĝĉemizuloj venkus nin. Kaj ĉiu devas en la ĉapitro „Mohács”[\[2\]](#)-a katastrofo super la nomon de ĉefepiskopo Tomori[\[3\]](#), ĉar li ankaŭ estis venkita, per krajono alskribi : „kaj Francisko Áts”.

4

Ĉar generalo Johano Boka malgraŭ nia protesto kaj perforte konfiskis la kluban havaĵon (24 krajceroj), ĉar ili aĉetis nur unu trumpeton por 1 floreno kaj 40 krajceroj, kvankam en la Röser-bazaro oni jam povas ricevi por 60 kaj 50 krajceroj, tamen ili aĉetis plimultekostan, ĉar ĝi havas pli fortan voĉon, kaj ni forprenis la trumpeton de

la ruĝĉemizuloj, kaj nun jam ni havas du trumpetojn, sed nun jam estas bezonata eĉ ne unu, kaj se tamen estas bezonata, do unu sufiĉos, do ni decidis, ke la klubo repetu la kluban havaĵon (24 kr.) kaj prefere la Generalo vendu la trumpeton, sed ni volas nian monon (24 kr.), kion li cetere promesis.

5

La kluba prezidanto, Paŭlo Kolnay, jen ricevas riproĉon de la anoj, ĉar li lasis sekigi la kluban mastikon. Ĉar la disputon mi devas protokoli, la disputon jen mi protokolas:

Prezidanto: Pro tio mi ne maĉis la mastikon, ĉar mi estis okupita pri la milito.

Ano Barabás: Ja, tio ne estas preteksto.

Prezidanto: Barabás ĉiam incitas min, kaj mi mallaŭdas lin, mi volonte maĉas

la mastikon, ĉar mi scias, kio estas honesto, kaj tial mi estas prezidanto, ke mi maĉu ĝin laŭ la statutoj, sed inciti mi bremsas min.

Ano Barabás: Mi incitas neniun.

Prezidanto: Sed vi incitas.

Ano Barabás: Sed ne.

Prezidanto: Sed jes.

Ano Baarabás: Sed ne.

Prezidanto: Bone, estu via la lasta vorto.

Ano Richter: Estimata klubo! Mi proponas, ke kontraŭ la prezidanto ni skribu riproĉon en la grandan libron, ĉar li preterlasis sian devon.

La anoj: Prave! Prave!

Prezidanto: Nur tion mi mencias, ke ankoraŭ ĉi-fojon pardonu min la klubo, almenaŭ pro tio, ĉar hieraŭ tiom bone mi batalis, kavazaŭ sovaĝa leono, kaj mi estis la adjutanto, kaj mi estis en la plej

granda danĝero, mi kuregis sur la remparon, kaj la malamikaro premis min sur la teron, kaj mi suferis pro la regno, do ĉu nun mi suferu ankaŭ aparte, ĉar mi ne maĉis la mastikon?

Ano Barabás: Tio estas alia afero.

Prezidanto: Sed ne estas alia.

Ano Barabás: Sed estas alia.

Prezidanto: Sed ne.

Ano Barabás: Sed jes.

Prezidanto: Bone, estu via la lasta vorto.

Ano Richter: Mi petas la akcepton de mia propono.

Klubo: Ni akceptas, ni akceptas.

Dekstraflanke: Sed ni ne akceptas.

Prezidanto: Ni balotu.

Baloto estas farita.

Prezidanto: Per trivoĉa plimulto la klubo eldiras, ke Paŭlo Kolnay,

prezidanto, ricevas riproĉon. Tio estas friponaĵo.

Ano Barabás: La prezidanto ne havas rajton blasfemi la voĉplimulton.

Prezidanto: Sed havas.

Ano Barabás: Seb ne havas.

Prezicanto: Sed havas.

Ano Barabás: Sed ne havas.

Prezidanto: Bone, estu via la lasta vorto!

Ne havante pli da punktoj de tagordo, la prezidanto fermis la kunsidon.

Subskribite de: Leszik, protokolisto, p.m.

Kolnay, prezidanto, p.m.

ankoraŭ nun mi diras, ke tio estas friponaĵo.

[1] Pronocu: Hunjadi (venkinta hungaara heroo)

[2] Prononcu: Mohaĉ

[3] Venkita hungara heroo

(DEKA PARTO)

34. APUD LA MALSANULLITO DE LA KAPITANO

En la Rákos-strata flava dormeto estis granda silento. Eĉ la loĝantoj, kiuj ĝenerale kutime kolektiĝis sur la korto por laŭta klaĉado, nun piedfingre preterpasis la pordon de tajloro Nemecsek. La servistinoj portis malantaŭen, tute al la fino de la korto la vestaĵojn, kaj tapiŝojn por senpolvigi ilin, kaj ankaŭ tie oni indulge manumis ilin, por ke la malsanulo ne aŭdu la bruon. Se la tapiŝoj kapablus admiri, nun ili admirus pro tio, ke anstataŭ la furiozaj bategoj ili estas traktataj per mildaj batetoj . . .

Kaj la loĝantoj enrigardis tra la vitropordo:

– Kiel fartas la knabeto?

Ĉiuj ricevis jenan respondon:

– Malbone, tre malbone.

La bonaj virinoj portis ion post io:

– Sinjorino, akceptu tiun ĉi bonan vinon . . .

Aŭ:

– Se mi ne ofendas vin, jen estas iom da sukeraĵo . . .

La malgranda blonda virino, kiu kun plorintaj okuloj malfermadis la pordon, dankis al la bonkoruloj la donacojn, sed ŝi ja ne povis uzi ilin. Eĉ ŝi diris al kelkajj:

– Ne manĝas la etulo, jam de du tagoj apenaŭ mi povas verŝi en lin kelkajn kulerojn da lakteto.

Je la tria horo venis hejmen la tajloro. Li estis en la magazeno, de kie li hejmen portis laboron. Atentante mallaŭte li eniris la kuirejon, kaj li demandis eĉ ne ion de sia edzino.

Li nur alrigardis ŝin. Kaj la edzino alrigardis lin. Kaj ili komprenis unu la

alian, la tajloro demetis la jakon, kiun li alportis sur la brako.

Poste ili ambaŭ iris piedfingre en la ĉambron, kie la knabeto kuŝis sur la lito. Ja tre aliformiĝis la iama gaja senrangulo, nun malĝoja kapitano de la Paŭlo-strato. Li malgrasiĝis, liaj haroj longiĝis, liaj vangoj estis kavaj. Li ne estis pala, kaj eble ĝuste tio estis malĝoja en la afero, ke liaj vangetoj ĉiam estis ruĝaj. Tio ne estis sana ruĝo. Tio estis radio de interna fajro, kiu de kelkaj tagoj seninterrompe bruligis lin.

Ili haltis apud la lito. Ili estis malriĉaj, simplaj homoj, kiuj jam travivis multajn malbonojn, malagrablojn, ĉagrenojn, do ili ne lamentis. Nur ili staris kun mallevitaj kapoj kaj rigardis la plankon. Poste mallaŭtege demandis la tajloro:

– Ĉu li dormas?

La virino eĉ ne kuraĝis respondi per vorto, nur per sia kapo ŝi signis jeson.

Ĉar nun jam la knabeto tiel kuŝis en la lito, ke eĉ tion ne estis eble scii: ĉu li dormas aŭ maldormas.

Modesta frapetado aŭdiĝis de ekstere, de la korta pordo.

– Eble doktoro –, flustris la virino.

Ŝia edzo irigis ŝin:

– Malfermu la pordon.

La virino eliris, kaj malfermis la pordon. Sur la sojlo staris Boka. Sur la vangoj de la virineto aperis malĝoja rideto, kiam ŝi ekvidis la amikon de sia filo.

– Ĉu mi povas eniri?

– Jes, knabeto.

Li eniris.

– Kiel li fartas?

– Neniel.

– Ĉu malbone?

Eĉ respondon li ne atendis, ankaŭ li eniris la ĉambron. La virino iris post li. Kaj nun ili tri staris apud la lito, kaj ili

tri diris nek unu vorton. Kaj dum ili staris apud la lito, kvazaŭ la eta malsanulo eksentus ilian alrigardon, kaj ke pro li ili silentas, silente, malrapide li malfermis la okulojn. Unue tre ĉagrene li alrigardis sian patron, poste sian patrinon. Sed kiam fine li rimarkis Boka-n, li ekridetis. Per apenaŭ aŭdebla voĉo li diris:

– Ĉu vi estas ĉi tie, Boka?

Boka paŝis pli proksime al la lito.

– Jes. Mi estas ĉi tie.

– Ĉu vi restos ĉi tie?

– Jes.

– Ĉu tute ĝis tiam, ĝis mi mortos?

Nun Boka ne sciis kion respondi. Li ridetis al sia amiko, poste kvazaŭ petante konsilon, rigardis malantaŭen al la virino. Sed tiam jam la virino staris sin turninta, kaj la pinton de sia antaŭtuko ŝi levis al la okuloj.

– Malsaĝaĵon vi parolas, mia filo –,
diris la tajloro, kaj akrigis sian gorgon. –
Khm! Khm! Malsaĝaĵon vi parolas.

Sed Ernesto Nemecsek nun tute ne
atentis, kion diris lia patro. Li rigardis
Boka-n, kaj signis per la kapo al sia
patro.

– Ili ne scias – li diris.

Nun jam ankaŭ Boka ekparolis:

– Certe ili scias. Pli bone ili scias ol vi.

Li ekmovis sin, iel tre malfacile,
grimpe li sidiĝis en la lito. Li ne toleris,
ke oni helpu lin. Sian figuron li levis en
la aeron, kaj diris serioze:

– Ne kredu al ili, kion ili diras, ĉar nur
ŝerce ili diras tion. Mi scias, ke mi
mortos.

– Tio ne estas vera.

– Ĉu vi diris: tio ne estas vera?

– Jes.

Severe li rigardis Boka-n:

– Ĉu eble mi mensogas?

Oni trankviligis lin, ke li ne koleru, ĉar neniu akuzas lin pri mensogo. Sed nun li estis severa kaj koleris, ke oni ne kredis lin. Li faris aŭtoritatan mienon, kaj deklaris:

– Mi donos mian honorvorton, ke mi mortos.

La domzorgantino enŝovis sian kapon tra la pordo:

– Sinjoro . . . la kuracisto estas ĉi tie.

La kuracisto envenis, kaj ĉiu respektive salutis lin. Tre severa maljuna viro estis la doktoro. Li diris eĉ ne unu vorton. Malafable li ekmovis sian kapon kaj senhezite iris al la lito. Li ekprenis la manon de la knabo, poste lian bruston kaj aŭskultadis. La virino ne povis elteni sen demando:

– Mi petas . . . sinjoro doktoro . . . ĉu li fartas pli malbone?

Nur nun ekparolis unufoje la kuracisto:

– Ne.

Sed tion li diris tre strange. Tion li diris sen rigardo al la virino. Poste li prenis sian ĉapelon, kaj ekiris. La tajloro serveme kuris por malfermi la pordon.

– Mi akompanas vin, sinjoro doktoro.

Kiam ili estis en la kuirejo, la doktoro perokule signis al la tajloro, por fermi la pordon de la ĉambro. La kompatinda tajloro konjektis, kion signifas, se la doktoro volas paroli kun li sen atestantoj. Li fermis la pordon. Nun kvazaŭ iom pli amikan mienon vestus la vizaĝo de la kuracisto.

– Sinjoro Nemecsek – li diris, vi estas viro, kun vi mi parolas sincere.

La tajloro klinis sian kapon.

– La knabeto ne postvivos jam la matenon. Eble eĉ ne la vesperon.

La tajloro eĉ ne ekmovis sin. Nur post kelkaj minutoj li komencis mute jesadi per sia kapo.

– Tial mi diris tion – daŭrigis la kuracisto –, ĉar vi estas malriĉa homo, kaj estus malbone, se la sortbato venus neatendite. Do . . . estos bone, se . . . se vi zorgos . . . vi zorgos pri tio . . . kio estas kutime zorgi tiuokaze . . .

Iom ankoraŭ li rigardis la tajloron, poste subite li metis sian manon sur lian ŝultron.

– Adiaŭ. Post unu horo mi revenos.

La tajloro jam ne aŭdis tion. Nur rigardis antaŭ si la purajn frotlavitajn brikojn de la kuirejo. Li eĉ ne rimarkis, ke la kuracisto eliris. Nur konstante tio turniĝis en lia kapo, ke li devas zorgi. Pri io li devas zorgi, kio estas kutime zorgenda tiaokaze. Kion aludis la kuracisto? Ĉu la ĉerkon?

Li duonsvene trenis sin en la ĉambron, kaj eksidis sur seĝon. Oni ne povis lin paroligi, vane iris al li lia edzino:

– Kion diris la doktoro?

Li nur blancis sian kapon.

Nun kvazaŭ gajo superŝutis la vizaĝon de la kanabeto. Li turnis sin al Boka:

– Johano, venu ĉi tien.

Li iris al li.

– Eksidu ĉi tien sur la randon de mia lito. Ĉu kuraĝas?

– Certe mi kuraĝas! Ja kial mi ne kuraĝus?

– Ĉar eble vi timas, ke mi povus morti, ĝuste kiam vi sidas sur mia lito. Sed pro tio vi ne devas timi, ĉar se mi antaŭsentos mian morton, tiam antaŭe mi diros.

Li eksidis apud li.

– Nu, kion vi volas?

– Do – diris la knabeto, ĉirkaŭbrakante lian kolon, kaj klinante sin al lia orelo, kvazaŭ grandan sekreton li dirus al li –, kio okazis al la ruĝĉemizuloj?

– Ili estas venkitaj.

– Kaj pospte?

– Poste ili hejmeniris en la botanik-ĝardenon, kaj aranĝis kunsidon. Ili atendis ĝis malfrua vespero, sed Franĉjo Áts ne venis. Poste ili enuis pro la atendado, kaj iris hejmen.

– Sed pro kio ne venis Franĉjo Áts?

– Ĉar li hontis, kaj li sciis, ke oni igos lin abdiki pri la estreco, ĉar li malgajnis la militon. Poste hodiaŭ post tagmanĝo denove ili aranĝis kunsidon. Tiun jam ankaŭ Franĉjo Áts ĉeestis. Hieraŭ nokte mi vidis lin ĉi tie antaŭ la domo.

– Ĉi tie?

– Jes. Li demandis la domzorganton, ĉu vi fartas bone?

Pro tio Nemecsek fariĝis tre fieraj. Li ne kredis al siaj oreloj:

– Ĉu li mem estis ĉi tie?

– Jes, li mem.

Tio plaĉis al li. Boka daŭrigis:

– Do mi diras, ili aranĝis kunsidon sur la insulo, kaj faris grandan bruon. Terura malpaciĝo estis, ĉar ĉiu volis igi Franĉjon Áts abdiki. Nur du knaboj estis kun li: Wendauer kaj Szebenics. Kaj la Pásztor-oj estis ege kontraŭ li, ĉar la pli aĝa Pásztor volis fariĝi la estro. Kaj tio estis la fino, ke Áts abdikis pri la estraro, kaj la pli aĝa Pásztor estis elektita anstataŭ li. Sed ĉu vi scias, kio okazis?

– Kio?

– Tio okazis, ke kiam fine ili silentiĝis, kaj la nova estro estis elektita, tiam iris sur la insulon la botanikĝardeno gardisto, kaj diris al ili, ke la sinjoro direktoro ne plu toleros tian bruon, kaj li

elĵetis ilin el la ĝardeno. Kaj la insulo estas ŝlosita. Oni metis pordon sur la ponton.

Pro tio elkore ridis la kapitano.

– Nu tio estas bona – li diris. – Kaj de kiu vi scias tion?

– Kolnay rakontis. Nun, kiam mi venis ĉi tien, mi renkontis lin. Li iris al la grundo, ĉar denove la mastiko-klubo havas ĝeneralan kunsidon.

Pro tiu vorto la knabeto grimacigis sian vizaĝon.

Li diris mallaŭte:

– Ilin mi ne ŝatas jam. Ili skribis mian nomon per majuskloj.

Boka rapidis trankviligi lin:

– Ili jam korektis ĝin. Eĉ ne nur korektis ĝin, sed la tutan nomon ili skribis en la granda libro per majuskloj.

Nemeĉek nee skuis sian kapon:

– Tio ne estas vera. Nur tial vi diras al mi, ĉar mi estas malsana, kaj vi volas konsoli min.

– Tute ne tial mi diras. Tial mi diras, ĉar tio estas vera. Mi diras je mia honoro, ke tio estas vera.

La blonduleto levis siajn maldikajn fingretojn en la aeron:

– Nun vi donas eĉ vian honorvorton pri la mensogo, por min konsili.

– Sed . . .

– Ne parolu!

Li alkriis lin. Li, la kapitano, la generalon! En la vera senco de la vorto li alkriis lin, kio en la grundo estus terurega krimo, sed ĉi tie ne estis tio. Boka ridetante toleris tion.

– Bone – li diris –, se vi ne kredas min, baldaŭ vi mem vidos tion. Apartan honor-dokumenton ili faris por vi, kaj baldaŭ ili estos ĉi tie kun ĝi. Ili portos ĝin al vi. Venos la tuta klubo.

Sed la blonduleto eĉ nun ne kredis:

– Kiam mi vidos, tiam mi kredos!

Boka levis sian ŝultron. Li pensis en si mem: „Estas pli bone, ke li ne kredas, li havos pli multe da ĝojo, kiam li ekvidos ilin.

Sed pro tiu afero li ekscitis la malsanulon. Tre ĉagrenis la kompatindulon tiu maljusto, kiun la mastiko-klubo faris kontraŭ li. Li incitis sin mem.

– Vidu – li diris –, kion ili faris al mi, tio estas malbela.

Boka jam ne kuraĝis paroli, timante, ke li eĉ pli ekscitos lin. Eĉ kiam Nemecsek demandis lin: – Mi pravas, ĉu ne?

Li jesis:

– Vi pravas.

– Kvankam – diris Nemecsek, kaj li sidiĝis sur la kuseno –, kvankam ankaŭ por ili tiel mi batalis, kiel por la aliaj, ke

por ankaŭ por ili restu la grundo, kaj mi bone scias, ke batalis ne por mi, ĉar mi jam neniam revidos la grundon.

Li eksilentis. Li cerbumadis pri tiu terura penso, ke li jam ne vidos plu la grundon. Li estis infano. Volonte li forlasus ĉion sur la tero, nur la grundon, la „karan grundon” li ne devus forlasi.

35 LA MORTO DE LA KAPITANO

Kaj kion dum la tuta tempo de lia malsano ne okazis al li, nun pro tiu penso larmoj venis el liaj okuloj. Sed ne la malĝojo plorigis lin, sed la senpova kolero kontraŭ tiu grandega io, kio ne permesas, ke ankoraŭ unu fojon li iru en la Paŭlo-straton, apud la fortikaĵojn, apud la kabanon. Nun li ekmemoris pri la maŝindomon, veturilejo, la du grandaj morusarboj, desur kiuj li deŝiradis foliojn por Csele, ĉar Csele havis hejme grandan kulturadon de silkoraŭpoj, kaj tiuj bezonis la foliojn de morusarboj, kaj Csele estis dando, kaj Csele domaĝis ĉifonigi sian bonan veston per la arbogrimpado, kaj Csele pro tio lin sendis sur la arbon, ĉar li estis senrangulo. Li rememoris pri la gracia ferkamentubo, kiu gaje pafpafadis kaj ŝprucis la neĝblankajn vapornubetojn al la sennuba ĉielo, kaj kiu rapide, dum

momento neniĝis. Kaj kvazaŭ ĝis ĉi tie aŭdiĝus la konata, akra sono, kiun faris la vaporsegilo, kiam ĝi iras al la ŝtipo, kaj dispecigas ĝin.

Ruĝiĝis liaj vangoj, ekbrilis liaj okuloj. Li ekkriis:

– Mi volas iri sur la grundon!

Kaj ĉar neniu respondis al la ekkrio, li ripetis ĝin, sed nun jam pli spiteme, per pli postulema voĉo:

– Mi volas iri sur la grundon!

Boka ekpremīs lian manon:

– Vi venos, dum la sekvonta semajno, kiam vi estos resaniĝinta, denove vi venos.

– Sed ne! – li kontraŭdiris. – Nun mi volas iri tien! Nun tuj! Vestu min, kaj mi metos sur mian kapon la Paŭlo-stratan ĉapon.

Li ŝovis sian manon sub la kusenon, kaj kun triumfanta vizaĝo prenis de tie

kunpremitan ruĝverdan ĉapon, de kiu eĉ por minuto li ne disiĝis.

Li metis ĝin sur sian kapon.

– Vestu min!

Lia patro diris malĝoje:

– Kiam vi resaniĝos, Ernesto!

Sed nun jam ne estis eble reteni lin. Kiel lia malsana pulmo povis, li kriis:

– Mi ne resaniĝos!

Kaj ĉar tion li diris ordonvoĉe, neniu kontraŭdiris lin.

– Mi ne resaniĝos! – li kriis. – Vi mensogas al mi, ĉar mi pli bone scias, ke mi mortos, ke mi mortos, kaj tie mortos, kie plaĉas al mi! Mi volas iri sur grundon.

Ja, pri tio eĉ paroli oni ne povis. Ĉiuj rapidis al li, volis konvinki lin, ili klarigis al li:

– Nun ne eble . . .

– La vetero estas malbona . . .

– La sekvontan semajnon . .

Kaj ankaŭ nun revenis la malĝoja frazo, kiun jam apenaŭ ili kuraĝis diri en liajn saĝajn okulojn:

– Kiam vi resaniĝos.

Sed ĉiun ilian vorton li refutis. Kiam ili parolis pri la malbona vetero, varme, hele brilis la suno en la korteto, la viviga, la forradia suno, de kiu ĉio ricevas vivon, kaj de kiu nur ĝuste Ernesto Nemecsek ne povis rericevi la vivon.

Kaj la febro kvazaŭ superŝutis la knabeton. Freneze li svingis la brakon, li estis ruĝa, liaj delikataj naztruoj larĝiĝis. Kaj li oratoris:

– La grundo – li kriis –, ĝi estas tuta regno! Vi ne scias tion, ĉar vi ankoraŭ neniam militis por la patrujo!

Ekstere oni frapis. La virino eliris.

– Mi petas vin – ŝi diris al ŝia edzo –, sinjoro Csetneky estas ĉi tie.

La tajloro iris en la kuirejon. Sinjoro Csetneky estis ĉefurba oficisto, kiu siajn vestojn farigis ĉe Nemecsek. Kiam li ekvidis la tajloron, nervoze li diris:

– Kio estas pri mia du-butonvica bruna vesto?

De interne aŭdiĝis la malĝoja oratoraĵo:

– Sonegis la trumpeto . . . kaj polvoplena estis la grundo . . . Antaŭen! Antaŭen!

– Mi petas – diris la tajloro –, se plaĉas al vi nun via sinjora moŝto povas ĝin provi, sed mi devas peti vin, ke ĉi tie en la kuirejo bonvolu . . mil pardonon . . . ĉar mia fileto estas tre malsana . . . li kuŝas interne . . .

– Antaŭen! Antaŭen! – aŭdiĝis el la ĉambro raŭke krianta infanvoĉo.

– Post min! Plena atako! Ĉu vi vidas tie la ruĝĉemizuloj? Antaŭe iras Franĉjo

Āts kun arĝenta lanco . . . nun baldaŭ li
ĵetos min el la akvon!

Sinjoro Csenkey ekatentis:

– Kio estas?

– Kriadas la kompatinduleto.

– Se li estas malsana, kial li kriadas?

La tajloro ektiris sian ŝultrojn.

– Eĉ li jam ne estas malsana, mi petas .
. . li jam finos . . . pro febro parolas la
kompatinda . . .

Kaj li portis el ĉambro la brunan
veston, kiu havis du vicojn da butonoj,
kiu per blankaj fadenoj estis kudrita por
provo. Kiam li malfermis la pordon,
aŭdiĝis:

– Silentu en la remarfosaĵo! Atentu!
Nun ili venas . . . jam ili estas ĉi tie!
Trumpetisto, ekblovu la trumperon!

Li faris funelon el siaj manoj:

– Trata . . . trata . . . tratata!

Kaj li kriis al Boka:

– Vi ankaŭ trumpetu!

Kaj ankaŭ Boka devis fari funelon el siaj manoj, kaj nun jam ambaŭ trompetis: unu la laca, raŭka, malforta voĉo, kaj la alia sana voĉo, sed kiu sonis tre malĝoje. La gorĝon de Boka jam sufokis larmoj, sed tamen li eltenis, virece li eltenis, kaj tiel faris, kvazaŭ ankaŭ por li estus ĝojo, ke li trumpetas.

– Mi bedaŭras – diris sinjoro Csetneky, dum li senvestigis sin ĝis ĉemizo –, sed mi tre bezonas la brunan veston.

– Trata! Trata! – aŭdiĝis el la ĉambro.

La tajloro helpis al li surpreni la jakon. Kaj li komencis paroli mallaŭte:

– Ĝi ĝenas min ĉe la subbrako.

– Jes, mi petas.

Trata!Trata!

– Tiu butono estas tro alta, ĝin kudru pli malsupren, ĉar mi ŝatas, se la gladaĵo bele sterniĝas sur la brusto.

– Jes, sinjora moŝto.

Plena atako! Antaŭen!

– Ĝiaj manikoj ŝajnas esti iom mallongaj.

– Mi ne opinias . . .

– Sed rigardu ĝin bone. La manikoj de ĉiuj jakoj vi faras mallonga, tio estas via kulpo.

„Tio tute ne estas mia kulpo!” – pensis la tajloro, kaj per kreto signis la manikojn de la jako.

Kaj interne konstante pli kaj pli kreskis la bruo.

– Haha! – kriis la infanvoĉo –, ĉu vi estas ĉi tie? Nun vi staras antaŭ mi! Finfine mi kaptis vin, vi terura estro! Nu nun, nu nun! Ni vidu, kiu estas pli forta?

– Metu en ĝin vaton –diris sinjoro Csetneky. – Al la ŝultroj kaj al la brusto iom, de dekstre-maldekstre.

– Puf! Mi ĵetis vin al la tero!

Sinjoro Csetneky deprenis la brunan jakon, kaj la tajloro helpis al li surpreni tiun, en kiu li venis.

– Kiam ĝi estos preta?

– Postmorgaŭ.

– Bone. Sed laboru super ĝi, ke denove ne nur post semajno mi ricevu ĝin. Ĉu vi havas nun ankaŭ alian laboron?

– Bedaŭrinde mia filo estas malsana, sinjora moŝto.

Sinjoro Csetneky ektiris la ŝultrojn:

– Tio estas tre malĝoja afero, mi tre bedaŭras, sed mi diras, la veston mi bezonas kaj tre urĝe mi volas ĝin. Tuj eklaboru.

La tajloro ekĝemis:

– Do mi eklaboros.

– Bonan tagon! – diris sinjoro Csetnekey kaj gaje li foriris. El la pordo ankoraŭfoje li rekriis:

– Sed tuj eklaboru.

La tajloro prenis la belan brunan jakon, kaj pri tio li pensis, kion diris la kuracisto. Li devas zorgi, pri kio estas kutime zorgi tiaokaze. Do bone, li tuj eklaboros. Kiu scias por kio li bezonas la monon, kiun li ricevos por ĉi tiu bruna jako. Eble tiun kelkaj florenoj migros al la lignaĵisto, al tiu lignaĵisto, kiu faros malgrandajn ĉerkojn. Kaj sinjoro Csentneky fiere streĉos sin en la apud-Danuba promenejo en sia nova vesto.

Li reiris en la ĉambron, kaj tuj eklaboris. Nun jam li eĉ ne rigardis al la lito, nur rapide kaptadis la kudrilon, fadenon, por ke baldaŭ li finu la laboron, ĉar la laboro estis tre urĝa. Sinjoro Csetneky bezonis ĝin, kaj eble ankaŭ la lignaĵisto.

Sed nun jam la etan kapitanon ne estis retenebla. Li sin klinis antaŭen, kaj

sidiĝis sur la lito. Lia longa dormoĉemizo atingis liajn maleolojn. Sur lia kapo petole estis surmetita la ruĝverda ĉapo. Li salutis. Nun jam li parolis stentore, kaj lia rigardo balanciĝis en la nenion:

– Humile mi anoncas sinjoro generalo, mi ĵetis sur la teron la estron de la ruĝĉemizuloj, mi petas rangaltigon! Tiel rigardu min, ke nun mi estas kapitano! Mi militis por la patrujo, kaj mortis por la patrujo! Trara! Trara! Trumpetu Kolnay!

Per unu el siaj manoj li kroĉis sin al la litkapo:

– Ĵetataku, fortikaĵoj! Haha! Tie estas Jano! Atentu Jano! Vi ambaŭ fariĝos kapitano, Jano! Kaj vian nomon oni ne skribos per minuskloj! Fi! Vi estas malbonkoraj knaboj! Vi enviis min, ĉar Boka amis min, kaj ĉar mi estis la amiko, kaj ne vi! La tuta mastiko-klubo

estas malsaĝaĵo! Mi eksiĝos! Mi eksiĝos el la klubo!

Mallaŭte li aldiris:

– Mi petas tion protokoli.

Kaj nun la tajloro apud la malalta tablo nek vidis, nek aŭdis. Vigle laboris liaj ostaj fingroj sur la ŝtofo de la jako, brilis la kudrilo, la fingringo. Eĉ por la tuta mondo li ne rigardis la liton. Li timis, se li rigardus tien, tuj foriĝos lia emo de ĉio, li ĵetos al la tero la delikatan jakon de sinjoro Csetneky, kaj ĵetos sin apud lian fileton.

Nun la kapitano sidiĝis en la lito, kaj silente rigardis la lankovrilon.

Boka mallaŭte demandis:

–Ĉu vi estas laca?

Li ne respondis. Boka kovris lin. Lia patrino ordigis sub lia kapo la kusenon:

– Nun restu trankvila. Ripozu!

Li rigadis al Boka, sed ĉe lia rigardo estis videble, ke li ne vidas lin. Li faris mirantan vizaĝon. Li diris al li:

– Patro . . .

– Ne, ne – diris sufokvoĉe la generalo –, ne mi estas la patro . . . ĉu vi ne konas min? Mi estas Johano Boka.

Per laca voĉo, nekompreneble diris post li la malsanulo:

– Mi . . . estas . . . Johano . . . Boka . . .

Nun estiĝis longa silento. La knabeto fermis siajn okulojn kaj longe, forte ekĝemis, kvazaŭ ĉiu doloro de ĉiu malĝoja homo premiĝus en lian etan animon.

Estis silento.

– Eble li ekdormis – flustris la blonda virino, kiu jam apenaŭ povis stari sur siaj piedoj pro la multaj tranoktadoj.

– Ni lasu lin – respondis Boka flustre.

Ili sidiĝis flanke, sur eluzita verda divano. Nun ankaŭ la tajloro ĉesis labori, li metis la brunan jakon sur sian genuon, kaj klinis la kapon sur la malaltan tablon. Ĉiu silentis. Kaj regis dormema silento, eĉ la flugadon de la muŝojn oni povis aŭdi.

Tra la fenestroj infanvoĉoj filtriĝis el la korto. Kvazaŭ multaj infanoj estus ekstere, mallaŭte parolante unu kun alia. Kaj subite konata vorto frapis la orelon de Boka. Nomon li aŭdis, kiun flustre diris iu:

– Barabás.

Li ekstaris, kaj piedfingre eliris la ĉambron. Kiam li malfermis la vitropordon de la kuirejo kaj elpaŝis sur la korton, ekvidis konatajn vizaĝojn. Aro da Paŭlo-strataj knaboj staris time proksime ĉe al pordo.

– Ĉu vi estas?

– Jes – flustris Weisz. – Estas ĉi tie la tuta mastiko-klubo.

– Kion vi volas?

– Ni portis por li honor-dokumenton, en kiu estas skribite per ruĝa inko, ke la klubo petas pardonon de li, kaj ke en la granda libro ni skribis lian nomon per majuskloj. Ankaŭ la granda libro estas ĉi tie. Kaj ankaŭ la tuta senditaro estas ĉi tie.

Boka balancis la kapon:

– Ĉu vi ne povis veni pli frue?

– Kial?

– Ĉar li nun dormas.

La anoj de la senditaro alrigardis unu la aliajn.

– Pro tio ni ne povis veni pli frue, ĉar estis granda disputo, kiu estu la prezidanto de la senditaro. Kaj daŭris duonhoron, ĝis ni elektis Weisz-on.

La virino aperis sur la sojlo.

– Li ne dormas – ŝi diris –, li deliras.

La knaboj staris rigide. Ĉiu estis konsternita.

– Eniru knaboj – diris la virino –, eble rekonsciiĝos la kompatinduleto, se li ekvidos vin.

Kaj ŝi malfermegis la pordon antaŭ ili. Ili enpaŝis laŭvice, ĝene, estimplene, kvazaŭ ili enirus tra preĝejpordo. Jam ekstere antaŭ la sojlo ili deprenis la ĉapelojn. Kaj kiam post la lasta knabo mallaŭte femiĝis la pordo, jam ili ĉiuj staris sur la sojlo de ĉambropordo, mute, dece, kun larĝe malfemitaj okuloj. Ili rigardis la tajloron, la liton. La tajloro eĉ sian kapon ne levis, li kuŝigis ĝin sur siajn brakojn kaj silentis. Li ne ploris. Nur li jam estis tre laca. Kaj en la lito kun malfermitaj okuloj kuŝis la kapitano, malfacile, profunde spirante, lia mallarĝlipa buŝo estis malfermita. Sed nenion li rekonis. Nun jam eble li

vidis tiajn aferojn, kiujn per teraj okuloj ne eblas vidi.

La virino ŝovis la knabojn antaŭen:

– Iru al li.

Malrapide ili ekiris al la lito. Sed ili iris malfacile. Unuj kuraĝigis la aliajn:

– Iru vi.

– Iru vi antaŭen.

Barabás diris:

– Vi estas la prezidanto de la senditaro.

Kaj Weisz malrapide iris al la lito. Ankaŭ la aliaj ŝteliris malantaŭ li. La knabeto eĉ ne rigardis ilin.

– Paloru. – flustris Barabás.

Kaj Weisz komencis per tremanta voĉo:

– Nemecsek . . .

Sed Nemecsek ne aŭdis tion. Li spiregis kaj rigide rigardis al la muro.

– Nemecsek! – ripetis Weisz, kaj jam ploro estis en lia gorĝo. Barabás flustris en liajn orelojn: – Ne ploraĉu.

– Mi ne ploraĉas – respondis Weisz, kaj li ĝojis, ke eĉ tion li povis diri senplore. Poste li firmigis sin.

– Altestimata sinjoro kapitano! – li komencis la parolon, kaj tiris el sia poŝo skribaĵon. – Jen ni aperis ĉi tie . . . kaj mi kiel prezidanto . . . jen en la nomo de la klubo . . . ĉar ni eraris . . . kaj ni ĉiuj nun petas vian pardonon . . . kaj en ĉi tiu honor-dokumento . . . ĉi tie estas skribita la tuto . . .

Li turnis sin. Jam du larmoj brilis en liaj okuloj. Sed la oficialan tonon, ilian plej grandan ĝojon, li ne forlasus eĉ por ĉiu trezoro de la mondo.

– Sinjoro protokolisto – li flustris –, bonvolu doni la kluban libron.

Leszik serveme donis ĝin. Weisz timeme metis ĝin sur la randon de la

lito, kaj foliumis en ĝi tiun paĝon, kie troviĝas la „Noto”.

– Rigardu – li diris al la malsanulo –, ĝi estas tio.

Sed la okuloj de la malsanulo iom post iom fermiĝis. Ili atendis. Poste Weisz denove diris:

– Rigardu ĝin.

Li ne respondis. Nun ĉiu iris pli proksime al la lito.

La virino temante faris al si vojon inter la knaboj. Ŝi klinis sur sian filon.

– Vi – ŝi kriis per fremda, miranta, tremanta voĉo al sia edzo: – li ne spiras.

Ŝi klinis sian kapon sur lian bruston.

– Vi! – ŝi kriis nun jam laŭte, nenion atente. – Li ne spiras!

La knaboj sin tiris malantaŭen. Ili staris en la angulo de la ĉambro, premiĝinte unu apud la alia. La kluba

libro falis de la lito, malfermite, kiel Weisz foliumis ĝin.

La virino nun jam kriegis:

– Vi! Liaj manoj estas malvarmaj!

Kaj en la granda, sufoka silento, kiu sekvis ĉi tiujn vortojn, estis aŭdeble, ke la tajloro, kiu ĝis nun mute, senmove sidis sur la tabureto, sian kapon klinante sur la brakojn, subite ekploregis. Li ploris mallaŭte, apenaŭ aŭdeble, kiel kutimas la seriozaj, plenkreskulaj homoj. Kaj liaj ŝultroj ek-ektremis pri la ploro. Kaj la kompatindulo eĉ nun atentis pri la bruna jako de sinjoro Csetneky, ĉar li glitigis ĝin desur siaj genuoj, por ke liaj larmoj ne falu sur ĝin.

Kaj la virino ĉirkaŭbrakadis, kisadis la mortintan knabeton, poste ŝi surgenuiĝis antaŭ la lito, sian kapon ŝovis en la malgrandan kusenon, kaj ankaŭ ŝi ekploris. Kaj Ernesto Nemecsek

sekretario de la mastiko-klubo, kapitano de la Paŭlo-strata grundo en eterna silento, murblanke, kun fermitaj okuloj kuŝis surdorse en la lito, kaj nun jam estis certe, ke li vidas kaj aŭdas nenion, kio okazas ĉirkaŭ li, ĉar por la vido kaj aŭdo de kapitano Nemecsek venis la anĝeloj, kaj portis lin tien, kie nur tuj aŭdas dolĉan muzikon kaj vidas brilan pompon, kia estis kapitano Nemecsek.

— Ni venis malfrue —, flustre diris Barabás.

Boka staris en la mezo de la ĉambro, kaj klinis sian kapon. Ankoraŭ antaŭ nelonge, antaŭ kelkaj minutoj, kiam li sidis sur la rando de la lito, apenaŭ li povis retenigi la ploradon. Kaj nun mire li sentis, ke ne venas larmoj en liajn okulojn, ke li ne povas plori. Poste li ĉirkaŭrigardis, kun nemezurebla malpleno en la animo. Li ekvidis la knabojn retiriĝantajn en la angulo. Antaŭe Weisz, kun la honor-dokumento

enmane, kiun Nemecsek jam ne povis vidi.

Li iris al ili.

– Do, iru hejmen, knaboj.

Kaj tiuj kompatindaj knaboj, preskaŭ ĝojis pro tio, ke ili povas foriri de ĉi tie, el tiu ĉi fremda ĉambreto, kie kuŝas mortinta sur la lito ilia kamarado. Unu post la alia ili ŝteliris el la ĉambro en la kuirejon, el la kuirejo en la sunbrilan korton. Lasta restis Leszik. Vole li restis lasta. Kiam jam ĉiu estis ekstere, piedfingre li iris al la lito, kaj mallaŭte prenis la kluban libron de la planko. Li alrigardis la liton kaj la etan silentan kapitanon.

Poste ankaŭ li eliris post la aliajn en la sunbrilan korton, sur kies malfirmaj etaj arboj birdoj pepis, junaj gajaj paseretoj. Ili rigardis al birdojn, staris en korto. La tutan aferon ili ne komprenis. Mire ili rigardis unu la alian, kiel tiuj, kiuj

rigardas ian tre nekompreneblan, tre fremdan aferon, kiun nun ili vidis la unuan fojon en la vivo.

36 LA MORTO DE LA GRUNDO

Je vesperiĝo Boka ekiris sur la straton. Li devus lerni, ĉar la morgaŭo estos malfacila tago. Estis granda latina leciono. Kaj jam delonge li ne respondis, kaj li sciis certe, ke sinjoro profesoro Rácz vokos lin. Sed li ne havis emon por lerni. Li flankenŝovis la libron kaj la vortaron, kaj foriris el la hejmo.

Sencele li vagadis sur la strato. Li evitis la Paŭlo-straton kaj la konatan ĉirkaŭaĵon. Doloris lia koro pro tiu penso, ke li devas revidi la grundon dum la hodiaŭa malĝoja tago.

Sed kien ajn li iris, ĉie io rememorigis lin pri Nemecsek.

La Üllői-strato . . .

Tie ili tri paŝadis kun Csónakos, kiam unue ili iris en la botanik-ĝardenon, por tie fari esploron.

La Köztelek-strato . . .

Li rememoris, kiam foje, tagmeze, post alveno el la lernejo ili staris meze de tiu stratero, kaj Nemecsek tre serioze rakontis, kiel prenis de li la kugletojn la Pásztor-oj dum la antaŭa tago en la Muzeo-ĝardeno. Kaj Csónakos iris al la `t a b a k f a b r i k o`, kaj nazspiris tabakpulveron de la ferkadro de la kelfenestro. Kiel ili ternis.

La ĉirkaŭaĵo de la muzeo . . .

Ankaŭ de tie li returnis sin. Kaj li sentis, ke ju pli li evitas la grundon, des pli tiras lin tien iu dolora sento. Kaj kiam poste subite li decidis iri sur la grundon, sen evitvojo, rekte, kuraĝe, tiam ia facilo flugis sur lian animon. Li rapidis, por kiom eble plej baldaŭ atingi ĝin. Kaj ju pli proksime li sentis sin al ilia regno, des pli granda estis lia trankvilo, kiu superŝutis lian koron. En la Mária-strato jam tiom klare li sentis

tion, ke li ekkuris, por kiom eble plej baldaŭ esti tie. Kaj kiam en la konstante malheliĝanta vesperiĝo li atingis la angulon, kaj ekvidis la bone konatan palisaron, lia koro ekfrapis. Li devis halti. Nun jam nenio rapidigis lin, nun jam li estis tie. Per malrapidaj paŝoj li proksimiĝis al la grundo, kies pordeto estis malfermita.

Antaŭ la pordo, apoginte sin al la palisaro pipfumadis Janó. Kiam li ekvidis Boka-n, rikante li signis al li:

– Nji batis ilinj!

Boka per malĝoja rideto respondis. Sed Janó ardiĝis:

– Nji batis ilinj . . . Nji batis ilinj . . .
Nji batis ilinj . . .

– Jes – diris mallaŭte la generalo.

Poste li haltis antaŭ la slovako, dum iom da tempo li silentis, poste li diris:

– Ĉu vi scias, Jano, kio okazis?

– Kio?

– Mortis Nemecsek.

La slovako ekatentis. Li elbuŝigis la pipon.

– Kiu estas Nemecsek? – li demandis.

– La blonduleto.

– Aha! – diris la slovako, kaj reenbiŝigis la pipon.

– Komjpatinjda!

Boka eniris tra la pordo. Nun silente ripozis antaŭ li la granda, malplena peco da urba tero, kiu jam estis atestanto de multaj gajaj horoj. Malrapide li trairis ĝin, kaj atinigis la remparfosaĵon. Sur la remparo ankoraŭ estis videblaj la postsignoj de la milito. La sablo estis plena per piedsignoj. Kelkaj partoj de la sablomonteto ruiniĝis, kiam la knaboj rampis el la fosaĵo.

Kaj malhele, nigre staris unuj apud la aliaj la ŝtupoj kun la fortikaĵoj sur la suproj, kies flankoj estis plene

superŝutitaj per ilia propra aparta polvo:
per sablo.

La generalo eksidis sur la
sablomonteton, kaj sian mentonon li
apogis sur la manplatojn. Nun regis
silento sur la grundo. La ferkamentubeto
tiutempe, vespere malvarmiĝis kaj
atendis la matenon, kiam laboremaj
manoj denove subbruligos ĝin. Ankaŭ la
segilo ripozis, kaj la dometo dormis
inter la burĝonantaj sovaĝaj
vinberlianoj. De malproksime, kvazaŭ
en sonĝo, aŭdiĝis ĝis tie la bruo de la
urbo. Veturiloj kuregis, homoj kriis jen
tie – jen tie, kaj el malantaŭa fenestro de
najbara domo, kie eble estis kuirejo kaj
kie jam brulis lampo, gaja kantvoĉo
flugis al li. Servistino kantis.

Boka ekstaris, kaj de flanke aliris la
kabanon. Li haltis ĉi tiu loko, kie
Nemecsek ĵetis teren Francjon Áts, kiel
iam Davido Goliaton. Li kliniĝis al la
tero, kaj tiel serĉis la karajn piedsignojn,

kiuj samtiel malaperis el la sablo, kiel lia amiketo malaperis el ĉi tiu tera mondo. Estis piedpremita en ĉi tiu loko la tero, sed piedsignojn li ne vidis en ĝi. Kvankam li rekonas la piedsignojn de la malgrandaj piedoj de Nemcsek, ja ili estis tiom malgrandaj, ke eĉ la ruĝĉemizuloj miris, kiam en la botanik-ĝardeno sablo ili ekvidis la postsignojn de liaj ŝuoj, kiuj estis eĉ pli malgrandaj ol tiuj de Wendauer. Dum tiu memoriga tago . . .

Ĝemante li iris plu. Li iris al la tria fortikaĵo, kie la blonduleto unuan fojon ekvidis Franĉjon Áts. Kiam tiu alrigardis kaj alkriis lin:

– Ĉu vi timas, Nemecsek?

La generalo estis laca. Lian korpon-animon torturis tiu ĉi tago. Li ŝanceliĝis, kvazaŭ estus trinkinta fortan vinon. Penege li grimpis sur la duan fortikaĵon, kaj kaŝis sin en ĝi. Tie almenaŭ neniu

vidis, embarasis lin, li povis pensadi pri la karaj memoroj, kaj eble li elplorus sin, se ja li povus plori.

Voĉojn portis la vento al li. Li rigardis malsupren de la fortikaĵo, kaj ekvidis du malhelajn figurojn antaŭ la kabano. En la malhelo li rekonis ilin pro iliaj voĉoj.

La du knaboj mallaŭte parolis unu kun la alia.

– Barabás – diris unu el ili –, do nun ni estas ĉi tie, kie kompatinda Nemecsek savis nian regnon.

Ili silentis. Poste aŭdiĝis:

– Barabás, ni repaciĝu nun ĉi tie, sed por eterne, kaj vere; tio ja ne havas sencon, ke ni kolero unu kontraŭ la alia.

– Bone – diris Barabás kortuŝite –. mi repaciĝos kun vi. Ja pro tio ni venis ĉi tien.

Denove estis silento. Mute ili staris unu kontraŭ la alia, kaj ambaŭ atendis,

ke la alila komencu la repaciĝon. Finfine Kolnay ekparolis:

– Do, saluton.

Barabás kortuŝite respondis:

– Do, saluton.

Ili manprenis. Dum longa tempo ili silentis tiel, man-en-mano. Poste ili diris eĉ ne vorton, nur ĉirkaŭbrakis unu la alian.

Eĉ tio okazis. Eĉ tiu miraklo okazis. Boka de supre, el la fortikaĵo rigardis ilin, sed li ne malkaŝis sin. Ankaŭ li volis resti sola, kaj ankaŭ tion li pripensis, kial li embarasu lin.

Poste la du hometoj mallaŭte parolante ekiris al la Paŭlo-strato. Brabás diris:

– Por morgaŭ ni havas multe da leciono.

– Jes – diris Kolnay.

– Por vi estas facile –ĝemis Barabás –, ĉar vi respondis hieraŭ. Sed mi jam

delonge ne respondis, kaj certe venos mia okazo dum la proksimaj tagoj.

Kolnay diris:

– Atentu, ĉar el la *dia caput* ni devas ellasi de la deka vico ĝis la dudektria. Ĉu ĝi estas notita en via libro?

– Ne.

– Do, sed vi nur ne lernu tion, kion ni devas ellasi. Mi iros nun al vi, kaj prinotos vian libron.

– Bone.

Jen, iliaj kapoj jam okupas sin pri la leciono. Ili rapide forgesis. Se Nemecsek mortis, tamen sinjoro profesor Rácz vivas, ĉefe ankaŭ ili vivas.

Ili forpaŝadis, malaperis en la malhelo de la vespero. Kaj nun fine Boka restis tutsola. Sed li ne havis trankvilon en la fortikaĵo. Kaj cetere la tempo jam estis malfrua. De la Jozef-bulvarda preĝejo mola sonorilsono alfluis.

Li grimpis malsupren el la fortikaĵo, kaj haltis antaŭ la kabano. Li vidis reveni Janó-n al sia kabano el la Paŭlo-strata pordeto. Sian voston svingante, flarante kuris apud li Hektor. Li atendis ilin.

– Nju? – diris la slovako. – Ĉu sinjorido nje iras hejmen?

– Sed mi jam iras – respondis Boka.

La slovako denove rikanis:

– Hejme bona varma vespermanĝo.

– Bona varma vespermajĝo – ripetis Boka mekanike, kaj pri tio li pensis, ke en la Rákos-strato, ĉe la kompatinda tajloro ankaŭ nun altabliĝas la du hometoj por vespermanĝi: la tajloro kaj sia edzino. Kaj en la ĉambro brulas kandeloj. Kaj estas tie la bela bruna jako de sinjoro Csetneky.

Kaj tute hazarde li ĵetis rigardon en la kabano. Li ekvidis strangajn ilojn apogitajn al la lignomuro. Rondan,

blankriĝan ledtabulon li vidis, tiaspecan diskon, kion la fervojgardantoj kutimas teni ĉe la teniloj, kiam la rapidvagonaro preterkuregas la gardodomon. Kaj ankoraŭ tri piedan kreaĵon, sur kies supro estis kupra tubeto. Kaj palisojn blanke pentritajn . . .

– Kio estas tio? – li demandis.

Janó enrigardis:

– Ĉu tio? Tio apartenas al sinjoro injĝenjiero.

– Al kiu injĝenjiero?

– Al konstru-injĝenjiero.

La koro de Boka terure ekfrapis:

– Ĉu konstru-injĝenjiero? Kion li volas ĉi tie?

Jano ekfumis sian pipon:

– Onji konstruos.

– Ĉu ĉi tie?

– Lunde venjos laboristoj, faros
grundojn . . . fosos kelo . . . funjdamento
...

– Kio! – kriis Boka. – Ĉu domon oni
konstruos ĉi tie?

– Domojn – diris indiferece la
slovako –, grandajn trietaĝajn domojn . .
. al kiu apartenas la grundo, tiu
konjstruigos la domojn.

Kaj li iris en kabanon.

Kun Boka turniĝis la mondo. Nun jam
venis larmoj el lia okuloj.

Li ekrapidis, poste ekkuregis la la
pordego. Li rifuĝis de ĉi tie, de tiu peco
da malfidela tero, kiu per tiom da
sufero, per tiom da heroeco ili defendis,
kaj kiu nun malfidele forlasos ilin, por
ke grandan loĝdomon ĝi akceptu sur
sian dorson, por eterna tempo.

El la pordego ankoraŭfoje li rerigardis.
Kiel iu, kiu forlasas sian patrujon,
poreterne. Kaj en tiu granda doloro, kiu

pro tiu penso premis lian koron, nur iometa, nur tre malgranda konsolo miksiĝis. Se jam kompatinda Nemecsek ne povis ĝisvivi, ke li akceptu la pardonpetantan senditaron de la mastiko-klubo, almenaŭ li ne ĝisvivis, ke oni forprenas de li sian patrujon, por kiu li mortis.

Kaj la sekvan tagon, kiam la tuta klaso en muta, solena silento sidis sur sia loko, kaj sinjoro profesoro Rácz kun seriozaj pasoj, malrapide, solene iris sur la katedron, por ke de tie en granda silento per mallaŭta voĉo li rememoru pri Ernesto Nemecsek, kaj alvoku la tutan klasgrupon, ke morgaŭ posttagmeze je la tria horo, ĉiu en nigra, aŭ almenaŭ en malhela vesto kolektiĝu en la Rákos-strato, Johano Boka serioze rigardis antaŭ si, sur la benkon, kaj la unuan fojon komenciĝis klarigi en lia

simpła infananimo konjekto pri tio, kio
estas vere la vivo, kies batalantoj, jen
gajaj servistoj estas ni ĉiuj.

FINO